

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ [www.esperanto.net/al](http://www.esperanto.net/al)

## **BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO**

**Nr. 114, aŭgusto 2014**

**Niaj proverboj**

**Ne ekzistas senkulpa homo en la mondo, la saĝulo ne aldiras filon "Ne eraru!", sed konsilas lin erari kiel eble plej malmulte**

**Adreso de redakcio:** *p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; [bselimi@gmail.com](mailto:bselimi@gmail.com))*

**Kunlaborantoj:** *Shaban Hasani 00355682080677, [shabanhasani@gmail.com](mailto:shabanhasani@gmail.com); Gjergji Gusho: 0035583222326, [gjergji\\_gusho@yahoo.com](mailto:gjergji_gusho@yahoo.com); Agim Peraj: (00355694472430, [agimperaj@yahoo.it](mailto:agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj: (00355684030613, [s\\_beqiraj@yahoo.com](mailto:s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli: 00355682587699, [sokolinehat@gmail.com](mailto:sokolinehat@gmail.com); Engjell Gusho: 00355692350111, [engjellgusho@yahoo.fr](mailto:engjellgusho@yahoo.fr); Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, [luanjaupi@hotmail.com](mailto:luanjaupi@hotmail.com); Enkela Xhamaj: 00355685135105, [xhamajkl@yahoo.com](mailto:xhamajkl@yahoo.com); Martha Otto, 00355697946646, [martha.otto@gmail.com](mailto:martha.otto@gmail.com)*

### **La enhavo**

**Ni kaj UEA, ILEI, AIS**

Kotizo ĉe ILEI

Ni kondolencas: Forpasis s-ro Boĵidar Leonov

La 47-a Konferenco de ILEI en Montevideo

La 69-a UK en Bonaero

Projekto por enkonduko de Esperanto en la lernejojn

**Nia propagando**

La tago de Esperanto en televizio

Tria tutmonda Konferenco pri Esperanto

Filmoj kun subtitoloj en Esperanto

Esperanto kiel lingva ponto

Esperanto ĉe UNO

Pakto de anglemuloj

### **EI la leteroj**

Ei Svedio, Brazilo, Serbio, Nepalo, ka

### **Informaĵoj**

Publika alvoko el brazila eldonejo

### **Politiko**

Analiza novaĵletero de Ian Fantom

### **Scivolemaĵoj**

Sekreto de longviveco

Filmo kun esperantaj subtitoloj

### **Ni perfektigu nian lingvon**

La finaĵoj

Bildvortoj

Vortludoj

### **Artikoloj**

Fatbardha Demi

Paiva Netto

### **EI la revuoj esperantistaj**

La Gazeto

### **Beletraĵoj**

Poeziaĵoj de Sali Bashota

Romano de Adem Demaĉi

Rakonto de Dritero Agolli

Vojaĝimpresoj

---

**Ni kaj UEA, ILEI, AIS**

## Kotizo por ILEI

Dankon por via mesaĝo.  
Bv sendi 6 EUR al nia konto 'ilek-a' ĉe UEA.

Sajmir Beqiraj, la nia kasisto

Fejfi,  
Temas pri 6 retaj membrecoj.  
La kotizo por retaj kotizoj en B-lando kjustime estas 5 EUR, sed ĉar Albanio estas tre malriĉa lando, laŭ mi 1 EUR sufiĉas.  
Tamen surpapera kotizo restas 10 EUR.

Amike,  
Vilĉjo Harris  
ILEI Kasisto

## Ni kondolencas

Malĝojega novaĵo envere estas la forpaso de amiko nia komuna amiko Boĵidar.  
Mi konis lin almenaŭ ekde la jaro 1998, en Bydgoszcz, kie studadis ankaŭ dekoj da albanaj studentoj.  
Ekde komenco prof Boĵidar sin montris tre afabla, helpema kaj komunikiga kun niaj gestudentoj kaj kun mi persone.

Poste mi partoprenis du sinsekvajn jarojn la seminariojn organizitajn de la universitato de Karlovo rektorata de prof Boĵidar (2010, 2011) kie ankaŭ mi prelegis sed plej grave konatiĝis pli intime kun la familio de nia karmemora Boĵidar. La etoso kreita de li tie estis tre amikeca kaj la tagoj pasigitaj tre interesaj.

Kun Boĵidar mi pasigis semajnon neforgeseblan ankaŭ en Sarajevo (2010) kie la bosniaj samideanoj aranĝis sciencon konferencon tre interesan kaj mi dividis ĉambron kun la profesoro.  
Modesta, klera, prudenta, senlaca, sindediĉema al Esperanto profesoro Boĵidar restos porĉiam ankaŭ en mia memoro.

Elkorajn kondolencojn al lia familio kaj ĉiu nia samideanaro pro tiu granda perdo nia.

Albana ILEI-sekcio



## Simpozio en Montevideo esploris “lingvan justecon en praktiko”

Lingva diskriminacio, la sorto de minoritataj lingvoj, la utiligo de la reto por subteni indiĝenajn lingvojn, kaj lastatempaj iniciatoj por plivastigi la kapablon legi kaj skribi en latinamerikaj landoj — jen kelkaj el la temoj traktitaj en unutaga esperantlingva simpozio en Montevideo, Urugvajo, la 24-an de julio 2014. La aranĝo okazis kadre de la 47a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kaj origine celis allogi hispanlingvajn fakulojn el la proksimaj universitatoj, kiel sugestas la temo: “Lingva justeco en praktiko: Latinamerikaj spertoj kaj tendencoj.” En la fino, tamen, ĉiuj kontribuantoj parolis Esperanton — kio ne malhelpis la nivelon de la kontribuoj, el kiuj pluraj estis elstare interesaj.

La simpozion malfermis d-ro Mark Fettes, la prezidanto de UEA, per kelkaj bonvenigaj vortoj. Laŭ li, la simpozio estos “okazo pensi kune pri tre ampleksa kaj kompleksa demando” el la diversaj vidpunktoj de esperantistoj kaj latinamerikanoj; “ĝi estas do perfekta maniero inaŭguri jaron, kiu markos la 60jariĝon de nia kunlaboro kun Unesko.” Post li la podion prenis d-ro Duncan Charters, usona profesoro kun vasta sperto pri lingvoinstruado kaj interkultura edukado en hispanlingvaj kuntekstoj. Rapide kaj lerte li skizis kvin aspektojn de lingva diskriminacio en Latinameriko, ekde la konataj problemoj de indiĝenaj lingvoj ĝis la malpli konata movado por eduki ĉiujn latinamerikanojn al pasiva kompreno de la “alia” lingvo—la hispana por portugallingvanoj, la portugala por hispanlingvanoj. Ne mankis kritika rigardo al la diskriminaciaj efikoj de la angla lingvo, kiu restas malmulte uzata en la kontinento kaj ofte funkcias ekskludige en sciencaj konferencoj.

Urugvajano s-ro Eduardo Trápani vigle kaj konvinke rakontis pri la iniciatoj de la reprograma projekto Mozilla, kun kiu li kunlaboras jam dekon da jaroj por esperantigo de ĝiaj produktoj. Laŭ li, la nova sukceso de la projekto, krei rete bazitan poŝtelefonsistemon por tre malmultekostaj aparatoj, faros grandan kontribuon al la disponigo de interretaj rimedoj al la indiĝenaj popoloj de Latinameriko. Pri indiĝenaj popoloj parolis interalie ankaŭ s-ino Maritza Gutiérrez González, kunlaboranto de Radio Havano kaj sperta instruisto, kiam ŝi rakontis pri la vasta efikeco de “Mi ja povas!” instruprograme el Kubo por baza alfabetigo kiu atingis jam tri milionojn da latinamerikanoj, ne nur en la hispana sed ankaŭ en pluraj indiĝenaj lingvoj.

La parolon reprenis d-ro Fettes por disvolvi argumenton bazitan sur liaj esploroj kiel profesoro pri edukado en kanada universitato Simon Fraser. Ekirante de konsideroj pri lingva justeco en Kanado, li prilumis la profundan kaj subtilan influon de “ŝtatocentra pensado” en niaj konceptoj de lingvo kaj justeco, kaj venis en la fino al la funkciado de Esperanto kiel “kosmopolita propedeŭtiko”—t.e. kiel rimedo kiu “helpas trejni la vidkapablon kaj la imagkapablon” per la sperto de komunikado “neŭtrale homa.”

Necesis iom da matematikaj konoj por sekvi la prelegon de d-ro Bengt-Arne Wickström, el Humboldt-Universitato, Berlino, pri “La daŭra travivebleco de minoritataj lingvoj en la moderna mondo.” Li prezentis simplan sed tre pensinstigan modelon de lingvo-elektado, lingvo-lernado kaj lingvo-transdono, kiu montris ke minoritata lingvo povas stabile pluvi, nur se sufiĉaj familioj, en kiuj unu el la gepatroj estas “grandlingvano,” konscie elektas kultivi dulingvecon en siaj infanoj.

Urugvajna d-rino Sandra Burgues Roca, en vigla kaj riĉe ilustrita prelego, skizis la ŝanĝiĝantan rolon de diversaj lingvoj en “la transmisio de la medicina kono tra la historio,” finante per la konstato, ke relative novaj esploroj konvinke montras la pozitivan efikon de lingvolernado al la cerba sano. Kontraste, la lingvopolitikaj esploroj pri Eŭropa Unio de d-ro Michele Gazzola reliefigis la *mankon* de lingvokonoj ĉe multaj eŭropaj civitanoj, aparte ĉe la plej malriĉaj sociaj tavoloj. El tio li konkludis, ke ĉiuj proponoj forlasi la oficialan multlingvismon de EU por alternativa sistemo, kun unu ĝis tri oficialaj lingvoj (el la angla, franca kaj germana), estas neeviteble diskriminaciaj kaj ekskludemaj.

Post aktiva kaj amuza dumpaŭza prezento de “erologio” de Rob Moerbeek, la simpozio finiĝis per simpla kaj elokvanta prezento de s-ro Ismael Ávila el Brazilo pri sia

laboro por enretigi la faman rektmetodan kurson *Saluton!* de Audrey Childs-Mee. Ĉar ĝi estas alirebla por ĉiuj, sendepende de la lingvo de la uzantoj, la kurso celas esti paŝo al pli justa kaj egaleca aliro al E-lernmaterialoj por ĉiuj retanoj.

Tra la tuta simpozio, publiko el ĉ. 30 homoj atente sekvis, faris bonajn demandojn, kaj ĝenerale montris sian aprezon por la kvalito kaj vario de la programo. Taŭgaj eroj el la diversaj prezentoj aperos en *Internacia Pedagogia Revuo*.

**Raportis: Mark Fettes, Prezidanto de UEA.**

## **Dua AMO-seminario dementis mitojn, ek-skizis inform-strategion por vasta kontinento**

La 9an kaj 10an de julio, trideko da aktivuloj el Kanado kaj Usono, plus vizitantoj el Australio, Ĉinio, Japanio kaj Tajvano, partoprenis dutagan Seminarion por Aktivula Maturigo en marborda urbeto Sidnejo (Brita Kolumbio, Kanado). La seminario traktis la temon "Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Nord-Ameriko," sub gvido de d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA.

En la programo estis pluraj prezentoj kaj diskutsesioj por la plena seminario, kaj diversaj laborgrupoj pri specifaj temoj, celgrupoj, kaj agmetodoj. La varia ritmo kaj enhavo de la sesioj sukcesis teni la atenton de la partoprenantoj, kaj kondukis al viglaj kaj foje profundaj interŝanĝoj de ideoj. Fine de la seminario naskiĝis kvar laborgrupoj, pri evoluigo de teknikaj rimedoj, utiligo de sociaj retoj, respondado al tiklaj demandoj, kaj la enkadrigo de la informa laboro en la pli vastaj streboj al daŭripova evoluo. Ĉiu grupo celas plukonstrui sur ideoj kaj diskutoj el la seminario por pretigi konkretajn konsilarojn kaj informrimedojn en la venontaj monatoj.

En prezento kiu malfermis la seminarion, Fettes atentigis, ke informado estas pli efika kiam ĝi tuŝas la sentojn/emociojn de la homoj. Kvankam oni ne neglektu raciajn argumentojn por Esperanto, pli prioritata estas la komunikado de kernaj valoroj – ekzemple, ke esperantistoj estas malfermitaj, inkluzivemaj, scivolemaj, kleriĝemaj, kun alta sento de persona respondeco. Li resumis esplorojn pri valororientiĝoj en Usono kaj Kanado, montrante la kompleksecon de la situacio, sed emfazante, ke kreskas konscio kaj akceptemo pri la multlingveco de la mondo. Laŭ li, la informado pri Esperanto klare metu ĝin en tiun kuntekston - do montru, ke esperantistoj mem estas multlingvaj, multspecaj homoj kiuj komprenas kaj ŝatas la homan diversecon.

En plia pensiga kontribuo, Grant Goodall dementis kelkajn ŝatatajn mitojn de nia movado. Laŭ li, la nuntempa lingvoinstruado estas grandparte sufiĉe sukcesa, almenaŭ kiam haveblas trejnitaj instruistoj, kaj la nereguleco de lingvoj ne donas tiel grandajn problemojn por la lernado, kiel esperantistoj emas imagi. Kvankam usonaj lingvoinstruistoj dividas kelkajn el niaj kritikoj pri la troregado de la angla, multaj el ili vidas simile grandan problemon en la disvastiĝo de la hispana kiel "dua lingvo por ĉiuj" en usonaj lernejoj. Tiel necesas en kontaktoj kun lingvoinstruistoj emfazi nian konvinkon, ke ĉiuj lingvoj estas instruindaj kaj lernindaj. Goodall ankaŭ esprimis skeptikon pri la argumentoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kvankam li agnoskis, ke indas fari pliajn esplorojn pri ĝi.

Laborgrupo pri ĵurnalista intervjuado kondukis al plia laborgrupo pri la "plej tiklaj" demandoj, kiujn oni devas foje respondi pri Esperanto. Paralele, laborgrupoj pri sociaj retoj kaj la kreado de aŭdvidaj inform-materialoj (videoj k.a.) kreis bonan bazon por posta laborgrupo pri la celgrupo "universitataj studentoj." Tiujn laborojn gvidis Mark Fettes, Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Derek Roff, Chuck Mays kaj Nicholas Woods ("Nikvo"), kun kontribuoj de multaj seminarianoj.

Kelkajn el la ideoj de Fettes esploris kaj pluevoluigis plia laborgrupo sub gvido de Tamara Anna Koziej. Dum diskuto pri kernaj valoroj, la grupo konstatis, ke necesus reipensii la aspekton kaj

enhavon de la bazaj informiloj kaj retpaĝoj de la nordamerikaj asocioj por pli bone komuniki tiujn valorojn al ĝenerala publiko. Ekzemple, oni povus kolekti mallongajn personajn atestojn kaj rakontojn pri la kleriga kaj interpersona valoro de Esperanto, de homoj el diversaj aĝoj, regionoj, etnecoj, ktp, por vive illustri la buntecon kaj inkluzivecon de la movado. Poste la sama grupo traktis la koncepton de daŭripova evoluo, konstatante la bezonojn de bazaj informiloj kiuj koncize kaj en simpla lingvaĵo klarigas la rilaton inter socia/ekonomia evoluo, naturo, kulturo, lingvoj kaj Esperanto.

En diskuto pri celgrupoj, evidentiĝis ke ni ne scias sufiĉe pri la fonoj, motivoj, interesoj kaj kapabloj de la nordamerikanoj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Tial naskiĝis projekto de enketo inter pluraj grupoj – membroj, informpetantoj, lernu-uzantoj, NASK-studentoj – por kolekti kaj analizi tiajn informojn. Kun subteno de la estraroj de Esperanto-USA kaj Kanada E-Asocio, kaj fakaj konsiloj de Ĵenja Amis (magistra studento pri merkatico), malgranda teamo realigos tiun projekton en la venontaj monatoj. Se tio montriĝos utila, oni proponos ĝin kiel modelon por aliaj landaj asocioj.

Tra la du tagoj, multaj kontribuoj estis filmitaj de Chuck Mays kaj Derek Roff, kaj daŭras kolektado kaj redaktado de la diversaj tekstoj kaj prezentoj kiuj naskiĝis antaŭ kaj dum la seminario. Tiel AMO-2 alportas pliajn riĉaĵojn al la rikolto el AMO-1. Baldaŭ pretiĝos komuna retejo por kolekti kaj disponigi tiujn diversajn materialojn.

**Raportis: Mark Fettes**

## **Resumo de la parolado de la Prezidanto de UEA en la Solena Fermo**

Laŭ la stilo, kiun li unuafoje montris en Rejkjaviko antaŭ unu jaro, la Prezidanto, Mark Fettes, alpaŝis antaŭ la publiko kun spontana ferma parolado. En deko da minutoj, li sukcesis vekti la entuziasmon kaj reagemon de la kongresanoj. Ni ĉi tie do ne laŭvorte sed laŭsence redonas lian prezenton.

Unue, li parolis pri la trajtoj de la finiĝanta Kongreso.

“Ĝi estis relative malgranda kaj do pli intima kongreso ol kutime. Ĝi estis ankaŭ amerika kongreso — nia unua kongreso, post 110 jaroj, en hispanlingva Sud-Ameriko, kaj nur la tria en Sud-Ameriko entute. Tiun amerikecon oni vere forte sentis en la kunsido pri amerika agado, kie ĉeestis multaj homoj el entute 12 landoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko. Tie okazis viglaj diskutoj, en kiuj partoprenis tute novaj esperantistoj apud la veteranoj, kaj regis la sento, ke vere malfermiĝas nova kaj promesplena epoko por Esperanto en Ameriko.

“Ĝi estis ankaŭ, kiel ĉiam, tre internacia kongreso. Imagu, ke ĉi tie kolektiĝis homoj el 57 landoj, malgraŭ tio, ke temas nur pri plurcento da homoj. Mi estas certa, ke neniu alia movado sukcesus kunvenigi homojn el tiom da landoj en tiel malgranda skalo. Kaj jam tuj de la komenco regis pozitiva, eĉ entuziasma etoso, same aŭ eĉ pli bona ol en kongresoj multe pli grandaj.

“Kiel pluraj homj jam diris al mi, ĝi estis ankaŭ enhavriĉa kongreso. Malgraŭ tio, ke estis iom mapli da programeroj ol kutime—kaj la Kongresa Libro de Lillo estos eble duoble pli dika ol tiu ĉi—ili tamen estis ofte sufiĉe altnivelaj. Ne temas nur pri la klerigaj programoj kiel IKU kaj la kongresa temo, sed ankaŭ pri la seminarioj kaj

Komitataj Forumoj de UEA, en kiuj partoprenis multaj kongresanoj. Okazis pli da strategiaj diskutoj en ĉi tiu kongreso, ol en iu ajn alia, kiun mi ĉeestis, kaj do ĝi faris gravan kontribuon al antaŭenigo de la Strategia Laborplano de UEA.”

Elstariginte kelkajn pliajn kongreserojn (la futbal-matĉon, la Internacian Artan Vesperon...), la prezidanto turnis sin al nova temo: la 60-jariĝo de la Unesko-rezolucio.

“Se vi legos la tekston de la resolucio—kaj mi rekomendas tion, ĝi troviĝas interalie en la Jarlibro—vi vidus, ke Unesko agnoskis Esperanton ne pro iu fora vizio de ideala mondo, en kiu ĝi rolas kiel dua lingvo por ĉiuj, sed pro tio, ke ĝi jam funkcias kaj konkrete, reale kontribuas al la celoj kaj idealoj de Unesko.

“Kiel do ni marku la sesdekjariĝon de tiu resolucio? Laŭ mi, ĝuste per elstarigo de la realaj atingoj de Esperanto sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo en la lastaj sesdek jaroj. Pensu, ke tio estas preskaŭ duono de la vivo de nia lingvo. En tiuj jardekoj, Esperanto multe disvastiĝis ekster Eŭropo, kreiĝis granda parto de ĝia originala kaj tradukita literaturo kaj aliaj kulturaj produktoj, kaj ĝi trovis kelkajn tute novajn uzkampojn. Ni havas multon, pri kiu ni povas fieri, kaj surbaze de tiu fiero kaj nia kono de niaj atingoj, ni povas pli memfide kaj atentokapte turni nin al niaj samideanoj tra la mondo kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton, sed kiuj estas jam esperantistoj laŭ siaj valoroj, laŭ sia spirito.

“Ĉiuj popoloj havas sian novjaran feston. Por ni, ĝi estas la UK, kiu ĉiam okazas proksime de la Tago de la Unua Libro, la 26a de julio. Do, nun komenciĝas nova jaro por ni esperantistoj—la Jaro “Montevideo 60,” aŭ mallonge simple la Montevidea Jaro, kies kulmino estos la 100a Kongreso en Lillo. Ni uzu la okazon en ĉiuj landoj kaj regionoj de la mondo por konsciiĝi pri la atingoj de tiuj lastaj sesdek jaroj, kaj por inde prifesti ilin per kulturaj, fakaj kaj klerigaj aranĝoj.

“Mi do instigas vin pripensi tion, kiam vi revenos hejmen. UEA publikigos informojn pri la Jaro en sia retejo, kiujn ni daŭre aktualigos tra la venontaj monatoj, kaj kie vi povos trovi konsilojn, materialojn, kaj novaĵojn pri agadoj ligitaj al la Jaro en aliaj landoj kaj mondopartoj. Ankaŭ en la revuo *Esperanto* aperos artikolserio por marki la Jaron, prezentante la historion de niaj rilatoj kun Unesko kaj la sukcesojn de la movado sur ĝiaj diversaj agadkampoj.

“Do, jen unu konkreta maniero kontribui al la Jaro: fariĝu Membro-Abonanto de UEA! Kun pli da membroj, ni havos pli da rimedoj por adekvate subteni la Jaron, por kontribui al la evoluigo de la movado tra la mondo, kaj por porti niajn renovigatajn Universalajn Kongresojn pli digne kaj forte en ilian duan jarcenton!”

Pretigis MF/SMG

## **Projekto por enkonduki Esperanton en niajn lernejojn**

Ekde kelkaj monatoj nia asocio klopodas sentemigi nian minsterion pri edukado por enkonduki Esperanton en kelkajn mezlernejojn. Jen parto de nia korespondo kun la respondeculino pri la lingvoj ĉe la ministerio, s-ino Tatiana Vucani.

Letero al s-ino Mireille Grossjan



Dankon, kara.

Enkadre de niaj enlandaj klopodoj por enkonduki Esperanton en la lernejoj, ni intersxanĝis leterojn kun la respondeculoj ĉe nia ministrejo pri edukado. Unue ni proponis ilin enkonduki la Internacian Lingvon kiel projekton--piloto en kelkaj bazlernejoj sed tion la ministrejo nunpornun ne povas entrepreni ĉar okazos reformiĝoj en tiu sistemo. Cetere oni informis nin ke eblas enkonduki Esperanton en kelkaj mezlernejoj de la lando je profilo lingvema. Tiucele oni bezonus diplomitajn instruistojn kaj la koncernan instruilaron. Ni sugestis ke tio povus estiĝi helpe de UEA-ILEI, do sperta instruisto fremda povus gvidi intensan E- kurson kun grupo de instruistoj albanaj de la fremdlingvoj, difinitaj de la ministrejo dum ni diru 2-8 semajnoj, post kiu oni liveru oficiale la koncernajn atestilojn. Tiuj instruistoj poste aranĝos la lecionojn de Esperanto en siaj mezlernejoj dum unu jaro. La lernolibro de E. por albanoj disponeblas je sufiĉa kvanto, same oni povus multoblīgi aliajn instruilojn (gramatikilojn) disponeblaj pretigitaj delonge de ILEI. La kurso povus okazi ankaŭ rete sed la ekzemenoj devus okazi surloke aŭ en iu lando ekster Albanio.

Ni petis la ministrejon certigi eĉ modestan akomodigon de la invitotaj instruistoj.

Ni demandas: ĉu eblas, en kazo de definitiva aprobo far la ministrejo, trovi taŭgajn kaj rajtigitajn instruistojn de IL inter niaj movadanoj kiuj entreprenus tian laboron, ni diru la sekvantan lernojaron?

Ni tenos vin en kontakto pri la evoluo de la negocioj niaj kun la ministrejo.

Elkore Bardhyl, sekretario de la albana esperanto-asocio.

Respondo de Tatiana (en la albana)

Përshëndetje Z. Selimi,

Ju falënderoj për librin dhe materialet mjaft interesante.

Në pervojne time këtu ne MAS kam qene shumë herë në kontakt lidhur me çështjen e mësimit te Espernatos, por gjithmonë problemi ka qenë kuadri mësitor për të cilin hapsira ligjore është e kufizuar dhe materialet mësimore. ( libri nxënësit dhe i mësuesit apo moduli përkatës)

Prej vitesh kemi tentuar ta fusim në një nga shkollat tona të specializuara për gjuhë, por për shkaqet e mësiperme nuk kemi arritur ta realizojmë.

Une fillimisht po ju dergoj me e-mail këtë propozim dhe me pas Ju vleresoheni perpara se të kalojmë ne një shkresë zyrtare.

Ne kemi 6 gjimnaze me orientim gjuhesor në shkallë vendi. Keto gjimnaze sigurojnë hapsirë kurrikulare, tek kurrikula me me zgjedhje te lirë, e cila përfshin zgjedhje nga shkolla edhe me baze moduli.

Ne këtë hapsire kurrikulare mendoj se nga këto shkolla do te kete interes, por duhet prezantuar dhe biseduar per idene. Kjo eshte e relizueshme dhe une mund t'ju ndihmoj.

Lidhur me Ciklin e Ulet sinqerisht me duket e veshtire sepse fillimisht jemi ne proces reformimi dhe se dyti nuk ka hapsira per zgjedhje te lire per nje semester ne kete cikel aktualisht.

Gjith te mirat

---

Tatjana Vuçani

Expert

*Pre-University Education Department*

*Ministry of Education and Sport*

*Rruga e Durrësit Nr 23, AL-1001, Tirana*

*Albania*

E-mail: [Tatjana.Vucani@arsimi.gov.al](mailto:Tatjana.Vucani@arsimi.gov.al)

[vucanit@hotmail.com](mailto:vucanit@hotmail.com)

OfficeTel: [+355 4 22 32455](tel:+35542232455)

Mob: [+355 692100298](tel:+355692100298)

Trovita la instruisto



## Respondo de Sophia Korody

Karaj gekolegoj,

verŝajne mankas al mi parto de via korespondado kun Bardhyl, sed mi provas respondi:

Jes, la du-semajna somera kurs-oferto estos tre taŭga kaj por perfektigi lingve kaj por lerni pri instruado, metodiko kaj aliaj temoj gravaj por estonta instrulaboro.

Ĉu temas jam parolantoj de Esperanto? En kiu nivelo ili estas?

Antaŭ kelkaj jaroj ni organizis similan intensan kursaron por niaj ĝemelurbaj koleginoj, pluraj el kiuj post tiuj du someraj semajnoj en septembro komencis instrui Esperanton en siaj lernejoj (kaj tio ĝis nun seninterrompe daŭras).

Mi mem havas t.n. mentoran diplomon, tio estas, ke mi plenumis post-universitatajn studojn de la plej fama, plej renoma hungara universitato ELTE kaj fariĝis instruisto/trejnistoj por estontaj instruistoj. Laŭ tiama kontrakto kun ELTE (kaj ankaŭ kun aliaj universitatoj) - en la gimnazio, kie mi instruis plentempe -, mi fariĝis la gvidanto (mentoro) de la universitataj studentoj, kiuj pasigis instrupraktikan semestron en la lernejo sub mia gvido kaj ricevis de mi la atestilon postulatan de la universitato pri plenumita instrulaboro. Mi plenumis tiun taskon dum multaj jaroj, en ĉiu semestro por pluraj studentoj kaj en la angla lingvo kaj en Esperanto.

Se miaj informoj iel kongruas kun viaj planoj, povos helpi, ni volonte korespondados pri la detaloj, serĉos solvon.

Kun multaj salutoj,  
Zsafia

## Traduko en la albana:

Po, nje kurs dyjavor veror do ishte shume i pershtatshem edhe per persosje gjuhesore edhe per te mesuar te japesh mesim, per metodike dhe tema te tjera te rendesishme per punen e ardhshme mesimdhene.

A behet fjale per mesues qe e flasin Esperanton? Ne cilin nivel jane ata?

Para disa vitesh, ne kemi organizuar nje cikel kursesh intensive per koleget tona te qyteteve te binjakizuara, shume prej te cilave, pas atyre dy javeve, ishin ne gjendjen qe ne shtator te nisnin mesimdhene e Esperantos ne shkollat e veta (dhe kjo qe atehere pa nderprerje vijon)

Une vete e kam diplomen e mentorit, dmth kam kryer studime pasuniversitare te universitetit me te njohur hungarez ELTE dhe jam bere mesuese/ trajnere per mesuesit e ardheshem. Sipas marreveshjes se atehereshme me ELTE (po ashtu me universitetet e tjera) ne gjimnaz, ku une jepja mesim me kohe te plote, u bera udheheqese (mentore) e studenteve universitare, qe kaluan nje simester praktike pedagogjike ne shkollat nen udheheqjen time dhe moren nga une nje Deshmi qe kerkohej nga universiteti per punen e kryer mesimdhene. Kete detyre e kreu per shume vjet, ne cdo simester per shume studente edhe ne gjuhen angleze edhe ne Esperanto.

Ne se informatat e mia perputhen me planet tuaja e mund te ndihmojne, ne me deshire do korrespondojme per hollesite e do kerkojme nje zgjidhje.

Shume pershendetje


Szafia Korody

## Nia propagando

## La Tago de Esperanto en TV Korça, Albanio

Je 26-an de julio 2014, kiel estis antaŭanoncite, s-ro Engjell Gusho, delegito de UEA, parolis en TV Korça dum kelkaj minutoj pri la historio de Esperanto kaj aparte pri la Tago de Esperanto. Li prezentis la enhavon de la unua libro de Esperanto, la defiojn kiujn alfrontas la internacia helplingvo hodiaŭ kaj la antaŭecoj de Esperanto por la interreta komunikado, por la edukado, por la tria generacio, ks.

**Nehat Sokoli**



**Noto:** vi povas spekti la elsendon enkaŭ en youtube: <http://youtu.be/RReLOT0MEhQ>

## Tria Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto

Jam frue de la dudeka jarcento ariĝis instruistoj en la movado; en 1910 aperis instruista bulteno, kies nomo estis *Internacia Pedagogia Revuo*, same kiel nun; la graveco de instruado de la lingvo estis bone komprenata. Grava tasko estis akiri de registaroj kaj edukministerioj rekonon por la tiam nova lingvo, kaj tiel akiri lokon en naciaj aŭ lokaj studplanoj.

La juna movado ludis fortan helpan rolon ene de la neŭtrala Svislando dum la Unua Mondmilito, kun agado de pluraj renomaj pioniroj. La kaŭzo de tio estis la proksimeco de la sidejo de la Ruĝa Kruco kaj de la Centra Oficejo de UEA. Postmilite, tiuj plue ludis esencan rolon en la rekonstruo kaj fortigo de la movado, des pli pro la klopodoj tie starigi kaj funkciigi la Ligon de Nacioj.

En 1922 realiĝis la aŭdaca plano anonci la Unuan Tutmondan Konferencon pri la Instruado de Esperanto. La Respubliko kaj Kantono de Ĝenevo invitis la registarojn de la mondo komisiis esplorojn pri la kvanto kaj stato de instruado de la lingvo en siaj teritorioj. La konferenco okazis en Ĝenevo tiujare. Dua simila Konferenco okazis en Prago en 1927. Por pliaj informoj vidu *Esperanto en Perspektivo* de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro.

ILEI opinias, ke alvenis oportuna momento okazigi la trian tian konferencon en 2015. La prezidantino de ILEI raportas:

“Invito iris de eta Ŝtato, konkrete de la Respubliko kaj Kantono de Neuchâtel, Svislando, al ĉiuj Ŝtatoj de la mondo. En la kantono Neuchâtel troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbo La Chaŭ-de-Fonds, kie troviĝas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urboj okazos la Kolokvo. (En la franca : “Conférence”; en Esperanto “Kolokvo”, ĉar ILEI okazigas ĉiun jaron Konferencon)

La datoj estas 13a ĝis 16a de majo 2015, do en la jubilea jaro UNESKO-ESPERANTO Montevideo 60.

ILEI estas la organizanto. La Kolokvo okazas sub la aŭspicioj de Svisa Esperanto-Societo kaj Universala Esperanto-Asocio. Naskiĝis laborgrupo por pripensi la enhavon de tiu grava kunveno. Ĝi konsistas el Duncan Charters, Mark Fettes, Mireille Grosjean kaj Humphrey Tonkin.

Celoj de la Kolokvo

- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni kaj instrui
- Agnoskoj de Eo en la diversaj instrusistemoj, diplomigo pri Eo, estontaj paŝoj por evoluigi kaj firmigi tiun aspekton.
- Instruista trejnado : kiel plibonigi ĝin kaj diplomi novajn instruistojn.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko) ilo al enkonduko por lingvoinstruado
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri sekvoj de la lernado de Esperanto kiel elemento en politiko de multlingvismo. Evoluigi strategiojn ĉirilate.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri sekvoj de la lernado de Esperanto en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo, malfermado de la mondo al infanoj
- Kiel kaj kiom Eo povas kontribui al la jarmilaj celoj de Unesko kaj UN en la kampoj de alfabetigo kaj daŭripova evoluo ?
- Diversaj pedagogimovadoj (Freinet kaj aliaj) en rilato kun Eo
- Interŝanĝo de spertoj
- Renkontiĝo kun lokaj fakuloj

Ni povas supozi, ke ne venos ŝtatestroj aŭ edukministroj. Sed eble partoprenos kulturaj ataŝeoj, kiuj la tutan jaron laboras en la svisa ĉefurbo Berno. La Kolokvo estos anoncita en la Universitato kaj la publiko, gestudentoj kaj aliaj, havos senpagan aliron al la prelegoj. La salono enhavas 440 sidlokojn.

Multaj esperantistoj kaptos la okazon veni al Svislando por ekscii pri la nuntempa evoluo de la instruado de Esperanto kaj pri la estontaj ebloj”.

Mireille Grosjean, Prez de ILEI

**Dezirantoj kunlabori, partopreni - bv. starigi kontakton rekte kun ILEI!**

[ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com)

aŭ vidu ĉe < [www.ilei.info](http://www.ilei.info) > aŭ < [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info) >

## EDIZIONI EVA

Via Annunziata Lunga 29 - I 86079 Venafro IS

Tel. e fax 0865.90.99.50

e-mail: [edizionieva@edizionieva.com](mailto:edizionieva@edizionieva.com)

[www.edizionieva.com](http://www.edizionieva.com) - P. IVA 00845060946

### **Karaj Samideanoj,**

Ĵus Aperis, ĉe Eldonoj Eva, la libro “Kiu konis sinjoron Bosko Nedelkoviĉ” (paĝoj 256 17x24, € 16,00. Temas pri netipa romano, kiun verkis 17 diversaj aŭtoroj, kies verkojn fajilis kaj kunmetis Giuseppe Campolo, pseŭdonime “Samideano”. Tradukis ĝin en Esperanto dekdu eminentaj esperantistoj.

La romano estas miriga en ĉiu ĉapitro, en ĉiu paĝo, kun apartaj personoj, forte karakterizitaj kaj ĉiam interesaj. Tratempe kaj tralokaj flugadoj, fervora imagokapablo kaj salto en la superrealon, orkestras specon de esprima sorĉo, en etoso de pajna spiriteco, kiu naskas vere poeziajn vortojn.

Ĉi tie la kanonon de Croce pri la stila unueco oni defias kaj konfirmas samtempe. En la romano estas enmetitaj la rakontoj de ja dek kvin malsamaj aŭtoroj, kun ilia tuta aparta vario; kaj tamen, ili estas majstre kunigitaj per iu fadeno, kiu kudras fantazie kaj lerte, kaj iĝas ununura rakonta korpo solida kaj ekzempla, riĉa kaj originala. Kvazaŭ la realo estus eksplodinta en siaj senkoheroj kaj poste estus rekunigita demiurge en iu nova kosmo. Iu literatura eksperimento riska sed perfekte suk-cesa, kun emocio, kvazaŭ triobla mortosalto. GiuseppeCam-polo, kiu estas ĝia magia plektanto, ne estas nova en tiuj ĉi surprizoj fascinaj, kaj, ne nur el la literatura vidpunkto, hete-rodoksaj.

Admirinda kiel, en la plekto rigore rakonta kaj en la plaĉaj dialogoj, estas harmoniigitaj, kun ekvilibraj kaj delikataj liri-kaj tonoj, prikonsideroj, kiuj tuŝas, kun kritika, areojn, kujn ni difinus sociaj, filozofiaj, metafizikaj; kaj tio sen ombro de retoriko, de trivitaj esprimoj, sed kun rafinita stila virtuoismo. Eĉ tie, kie, pro mensa dispeciĝo, li transpasas en areojn, kiujn kutime oni konceptas abstrakte kaj nebule, atingas nin vizioj de aliaj konsciencaj spacoj kaj supermondoj en efektivaj kinosekvencoj, kun specialaj artifiko.

Tiuj kiuj deziras ricevi la libron povas mendi ĝin al ni kaj fari kreditigon al Edizioni Eva, Via Annunziata Lunga 29 - 86079 Venafro (IS), laŭ IBAN IT94 X076 0115 6000 0009 8034 804, aŭ alimaniere. En Italujo ni sendos la libron sen aldoni sendokostojn. Por ekspedado eksterlande aldonu al la prezo nur 2 eŭrojn, kiel parta kontribuajo en la poŝta afranko. Salutojn.

### ***Esperanto - kultura ponto inter homoj***

Esperanto denove pruvis ke ĝi estas vere ponto kiu konektas homoj el la tuta mondo. Banjalukaj esperantistoj la 04-an de julio gastigis du konatajn esperantajn aktorojn kaj kantistojn, Sasxa Pilipovix el Serbio kaj George Handzlik el Pollando. Sub la titolo “*Esperanto - kultura ponto inter homoj*”, ili prenis parto el la teatraĵo “*Ne lasu min sola*”, kiu parolas pri viroj kiel viktimoj de geedza vivo. Sasxa al spektantaro parolis pri lia plej interesajn agadojn kaj renkontiĝojn kun famaj ŝtatistoj kaj famuloj, kaj aparte substrekis renkontiĝon kun la kuba prezidento Fidel Castro en Havano dum la Universala Kongreso la 1990.jaro. Li ankaŭ emfazis kunlaboradon kun Miĉo Vrhovac el Banja Luka

en teatraĵo *"Dek tagoj de kapitano Postnikov,"* en kiu li estas precipe fiera kaj kiu estas bone ricevita en la Esperantujo.

Ambaŭ aktoroj diris ke ili multe donis al Esperanto, sed ili ankaŭ multe ricevis de Esperanto, kaj sendis la mesaĝon, ke uzante Esperantan reton oni povas bonege prezenti sian urbon kaj sian landon. La sama mesaĝo estis sendita ankaŭ dum partopreno en la matena programo de Radio Televido de la Respubliko Serba.

Interesa rakonto estas spektanta de ĉirkaŭ 25 esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, kiuj ĝuis dum la spektaklo kaj ankaŭ poste dum la koktelo parolante kun aktoroj. Dum koktelo naskiĝis novajn ideojn por kunlaboro, kaj unu el ili estas kunlaboro infanaj teatroj el Banja Luka kaj teatro el Bielsko-Biała. Sincere ni esperas ke sukcesos en tiu inte

### **Miĉo Vrhovac**

vicprezidanto de e-societo

LA MONDO

Banja Luka, R. Serba

Bosnio-Hercegovino



### **Legio de la Bona Volo prezentas rekomendojn okaze de tutmonda debato pri daŭripova elvolviĝo**

Inter la tagoj 30a de junio kaj 11a de julio okazis la ĉi-jara eldono de la Altnivela Kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok/UN), en la novjorka sidejo de UN. Legio de Bona Volo (LBV) ĉiujare partoprenas tiun gravan eventon.



## "Solidareco kaj homaj rajtoj en la mondo"

Legu la artikolon de la prezidanto de LBV, Paiva Netto, speciale senditan al partoprenantoj en la renkontiĝoj de Ekosok. Via komento pri tiu artikolo estas kore atendita!

## Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Dum la okazo, la teamo de la Departamento pri Esperanto de LBV (el Brazilo) okazigis agrablan renkontiĝon kun Neil Blonstein, UN-representanto por UEA. Spektu la filmeton!





# Demokratio

## komenciĝas ĉe la pinto de la lango

Kie ne ekzistas lingva justeco, tie ne povas ekzisti demokratio.

*“Kiu trudas sian lingvon, tiu trudas sian pensmanieron“ (Claude Hagège)*

En 1961, konfidenca konferenco okazis en Kembriĝo kun reprezentantoj de Britio kaj Usono cele al trudo de la angla kiel unika lingvo ĉie en la mondo.

La efikoj de tiu entrepreno de formatigo de la cerboj, neniam pritraktata en la amaskomunikiloj, estas nun tre percepteblaj ĉie en la mondo.

Diversaj verkoj pritraktas tiun temon, aparte :

“Linguistic Imperialism“ (1992) kaj “Linguistic Imperialism Continued“ (2010), de profesoro Robert Phillipson, kiu okupis diversajn funkciojn sine de British Council.

## Politiko

Analiza novaĵletero de la grupo 'Keep Talking', kaj la Veromovado de Berkshire, Britio, por marto-majo 2014 (2014-06-02)

### Mondomilito? Aŭ ĉu eliros la vero?

La pugnobatado inter Usono kaj Rusio fariĝis senganta. Ni estas en krizo kiu povus unuflanke finiĝi per Mondomilito Tria, aŭ, aliflanke, signi la turnopunkton en la leviĝo de la kaŝa nazia mafio, kiu nun dominas la Okcidentan politikan scenon.

Ukrainio subiris en staton de enlanda milito, instigita kaj kuraĝigita de NATO kaj la Eŭropa Unio. La propaganda milito inter Rusio kaj Usono estas pli intensa ol iam ajn en viva memoro. Eĉ la Kuba Misil-Krizo verŝajne estis malpli minaca ol la nuna malkaŝa antagonismo inter Moskvo kaj Vaŝingtono. Sed estas du grandaj diferencoj.

En la tempo de la Kuba Misil-Krizo, ni ĉiuj kutimis al la sovetia propagando-maŝino, sed nun la okulfrapaj mensogoj, tordoj kaj inversigoj de la vero venas de niaj propraj gvidantoj de la Okcidento. Unu rusa kolego skribis en politika retpoŝta grupo, ke kompare kun [la nuna Okcidenta] 'libero', la sovetia propagando estis brila ekzemplo de kompleteco, justeco kaj **vereco en sia informado. Mi samsentas.**

### \* Usono en malbona stato por ankoraŭfoje militi

La alia diferenco estas, ke kvankam la usona milit-elspezo estas proksimume kvaroble tiom de ties plej proksima rivalo, Ĉinio, kaj duoble tiom kiom elspezas ĉiuj el la BRIC-landoj kune, kaj pli ol triono de la tuta milita elspezo de la mondo



([http://en.wikipedia.org/wiki/List\\_of\\_countries\\_by\\_military\\_expenditures](http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_military_expenditures)), la usonaj militservoj, laŭ usona veterano de la Vjetnamia Milito, Gordon Duff, estas "malfortigitaj, kaj nekapablaj batalaj en pluaj militoj". "Dum Usono parolas pri ekmilitado en Eŭropo, tiuj kiuj sekvas la veran staton de la usonaj militaj fortoj, aktive deĵorantaj, rezervuloj kaj veteranoj, scias, ke temas pri nenio alia ol vaka parolado. Pli ol dekduo da jaroj da militado lasis la usonan militan hompovon elĉerpita, fizike kaj mense, kaj 'politike' ", li skribis en la retejo de la irana Press TV (<http://www.presstv.ir/detail/2014/05/05/361410/us-unable-to-fight-more-wars/>). Li raportis, ke tuta generacio de la usona militistaro estas morta, mortanta, aŭ handikapita, kaj ke malpli da usonanoj pretas kredi, volonte kaj blinde sekvi, voleme morti pro tio kion nun pli kaj pli da homoj klare vidas kiel militojn por Wall Street.

#### \* **Gorbaĉov: Intenca ruinigo de Perestrojko kondukis al la nuna krizo en Ukrainio**


La vastiĝo orienten de NATO kontraŭagas la Okcidentajn certigojn donitajn al sovetia prezidento Miĥajl Gorbaĉov en la tempo de Glasnost kaj Perestrojka, kaj nun, dudek jarojn poste, Gorbaĉov ankoraŭ koleregas, kiam oni demandas al li pri tiu epizodo (<http://www.spiegel.de/international/world/nato-s-eastward-expansion-did-the-west-break-its-promise-to-moscow-a-663315.html>). Li opinias, ke la origina kaŭzo de la nuna kriza situacio en Ukrainio kaj Krimeo kuŝas en la "intenca ruinigo de Perestrojko kaj en la senpensa kaj aventurema disigo de Sovetunio", aludante al interkonsento subskribita malfrue en 1991 de la tri ĉefoj de la internaj respublikoj de Sovetunio - Boris Jelcin de la Rusa Federacio, Stanislav Ŝuŝkeviĉ de Beloruso kaj Leonid Kravĉuk de Ukrainio, kiu permesis al eksaj sovetiaj respublikoj fariĝi sendependaj ŝtatoj ene de sovetuniaj administrataj landlimoj, lasante Krimeon ene de Ukrainio (<http://rt.com/politics/gorbachev-ukraine-cold-war-crisis-802/>). Ŝajne Boris Jelcin ricevis subtenon de la usona Free Congress Foundation [Libera Fondaĵo de Kongreso] ([http://www.carnegiecouncil.org/studio/multimedia/20120425/intro.html/\\_res/id=sa\\_File1/Introduction\\_Playing-for-Power.pdf](http://www.carnegiecouncil.org/studio/multimedia/20120425/intro.html/_res/id=sa_File1/Introduction_Playing-for-Power.pdf)). Tariq Ali asertas, ke Jelcin "akceptis pli-malpli ĉion faritan de la Okcidento", reciproke kun Okcidenta subteno por siaj agoj (<http://rt.com/op-edge/ukraine-russia-nato-enlargement-577/>). Kiam oni scias tiun historion, Putin devas esti rigardanta la malstabiligon en Kievo kun maltrankvilo, ĉar tio povus nun ege facile esti ripetita en Moskvo.

Salutas Ian  
Keep Talking  
[ian@fantom.org.uk](mailto:ian@fantom.org.uk)

## **Scivolemaĵoj**

### **Sekreto de longviveco**

+--



Viglaj maljunuloj de Gongŝjan-gubernio, Henan-provinco



La 120-jara Hu Jūanĉing de Hubej-provinco ricevis ateston "Sana Maljunulo" kaj donacon porcelana longvivulo.



En ĝardeno por maljunuloj en Ĉenghaj-gubernio de Gŭangdong-provinco



La 80-jara Sun Üejhe ĉe la fino de 3 000-metra kurado

Ĉinaj sciencistoj malkovris iom post iom la sekreton de longviveco -- bona animstato, konvena medio, racia nutrado, necesa korpoekzerco kaj preno de mikroelementoj.

La Tria Censo en 1982 de Ĉinio montris, ke maljunuloj super 65 jaroj nombras pli ol 77.83 milionojn, inter kiuj virinoj konsistigas 53.5 procentojn. 3 765 maljunuloj atingis la aĝon de 100 jaroj. Plejparto de tiuj grandaĝaj maljunuloj loĝas en limaj regionoj, montaro kaj kamparo. 860 centjaruloj vivas en Ŝinĝjang, 441 en Gŭangdong kaj 405 en Gŭangŝji. Esplorante lokojn kie vivas multaj longvivuloj kaj tiujn maljunulojn, specialistoj trovis kelke da komunaj faktoroj.

Rilate korstaton kaj karakteron: Esplorado en Pekino, Ĉangŝa, Ĉangĉun k.a. montris, ke plejparto de la longvivuloj estas vastanimaj, modestaj, serenaj, optimismaj kaj fidoplenaj al la vivo. En Hubej, nur 4 el la 88 longvivuloj estas malsocietemaj.

Rilate nutradon: La centjaruloj de la landinterno prenas por si manĝaĵojn malmultkaloriajn, malaltgrasajn, malaltproteinajn kaj ankaŭ grandkvantajn legomojn. La longvivuloj de Ŝinĝjang ofte prenas maldelikatajn grenojn kaj sin izolas de malbonaj ŝatoj, kvankam ili prenas ĉefe laktaĵojn, ŝaf- kaj bovviandojn.

Rilate medion: En Ŝinĝjang kaj Gŭangŝji estas multaj montaroj kun alteco de 50011 500 metroj, kie abundas pluvo kaj konvena temperaturo. Tie la aero estas freŝa, akvo pura, kio tre favoras al longviveco.

Rilate laboradon kaj korpoekzercon: Naŭ dekonoj de la centjaruloj tutjare faras fizikan laboron, multaj estas laboremaj eĉ en la aĝo super cent jaroj.

Specialistoj rimarkis, ke mikroelementoj strikte rilatas longevivecon. Ĝenerala analizo montras, ke la haroj de la centjaruloj estas selenozaj, manganozaj kaj samtempe kadmiomankaj. La ĉefa faktoro kuŝas en tio, ke la greno de ilia loko entenas riĉan kvanton da seleno, fero kaj aliaj mikroelementoj, kio helpas preventi koronarian kormalsanon kaj tumoron. Ankaŭ la tero kaj akvo de ilia loko entenas mikroelementojn, kiuj utilas al prevento de malsano kaj malfruigo de seniliĝo.

Antaŭ nelonge finiĝis la Sesa Simpozio de Suda Ĉinio kaj la Tria Simpozio de Ĝuangŝji de Maljunula Medicino. Multaj specialistoj diris ĉe la simpozioj, ke estas necese krei longvivigan medion por ke plejparto de la homoj povu vivi pli longe.

(Redaktoroj: Liu Caisheng kaj Liu Zijia)

## **Filmo kun esperantaj subtitoloj**

Grupo de Arĥitektoj kaj Inĝenieroj bazita en Usono publikigis por la unua fojo unu el siaj videoj kun Esperantaj subtitoloj. La video, kiu daŭras kvin minutojn, analizas la kolapson de la Norda Turo de la Monda Komerca Centro, kun fizikista komentario. Tiu estas unu el la plej lastatempaj aldonoj al kolekto de 711 videoj en 28 lingvoj celitaj al publika informado ĝis nun publikigitaj de la grupo 'Architects and Engineers for 9/11 Truth' [Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por la Vero de 9-11], kiu vokas por publika enketo (<http://ae911truth.org>). Kiam mi proponis min por aliĝi al ilia tradukteamo por Esperanto, la gvidanto, Wibren Visser, entuziasmis, dirante, ke li antaŭe ne pripensis Esperanton. Lingvaj reviziantoj estas Renato Corsetti (Italio), Johan Derks (Nederlando / Serbio), kaj José Mário Marques (Brazilo). La video titoliĝas 'North Tower Exploding by Ray Chandler – Esperanto', kaj ĝi troveblas ĉe: <https://www.youtube.com/user/ae911truth/videos>.

# Ni perfektigu la lingvon

De Josenilton, Brazilo

## LA OFICIALAJ AFIKSOJ DE ESPERANTO

**Afikso** estas morfemo, kiu situas antaŭ aŭ post radiko de vorto, derivanta novan vorton bazitan sur la ideo de la radiko.

La afiksoj havas propran sencon aŭ signifon, kaj ili influas en la signifo de la radiko.

Se afikso aperas antaŭ la radiko, ĝi estas nomata prefikso.

Se afikso aperas post la radiko, ĝi estas nomata sufikso. [La sufikso staras inter la radiko kaj la gramatika finiĝo.]

PREFIKSO – RADIKO – SUFIKSO - FINIĜO
--------------------------------------

En la vorto **malfortulo** (*mal-fort-ul-o*), **mal-** estas la prefikso, **fort** estas la radiko, **ul** estas la sufikso kaj **o** estas la gramatika finiĝo.

En la vorto **gemaljunuletoj** (*ge-mal-jun-ul-et-o-j*) la morfemoj **ge** kaj **mal** estas la prefiksoj, la morfemo **jun** estas la radiko, la morfemoj **ul** kaj **et** estas la sufiksoj kaj la morfemoj **o** kaj **j** estas la gramatikaj finiĝoj.

## LISTO DE LA OFICIALAJ SUFIKSOJ

-IN-

femalo {*viro – virino; knabo – knabino; kato – katino.*}

-AĈ-

ne bona kvalito {*horloĝo el Svisio – horloĝaĉo de kontrabando.*}

-AD-

Kontinuo, daŭreco {*li kuras hodiaŭ – li kuradas en la tagoj de la semajno.*}

-AĴ-

konkreta afero farita el la radiko {*nova – novaĵo (ĵurnala informo); sukero – sukeraĵo (ekzemple bombono).*}

-AN-

membro, loĝanto {*membro de klubo estas klubano; loĝanto de Parizo estas parizano.*}

-AR-

grupo, kolekto {*lernantoj - lernantaro (aŭ klaso); steloj - stelaro (aŭ konstelacio).*}

-ĈJ-

karesa maniero nomi viron {*patro – paĉjo; filo – fiĉjo; Petro - Peĉjo.*} [Rimarko: la sufikso -ĉj-kutimas "manĝi" pecon de la radiko. ☺En *paĉjo* la sufikso "manĝis" la literojn *t* kaj *r* de *patro*. En *fiĉjo* ĝi manĝis la literon */* de *filo*.].

-EBL-

povas esti; estas probable {*la libro de Maria estas facile legebla (aŭ povas esti facile legata).*}

-EC-

kvalita stato de la radiko {*la beleco de Ana estas impresa; la feliĉeco ne estas de tiu ĉi mondo.*}

-EG-

aŭgmentativo {*domo – domego (aŭ tre granda domo); bela – belega (aŭ tre bela).*}

-EJ-

loko {*la lernantoj studas en la lernejo; la religiuloj preĝas en la preĝejo.*}

-EM-

inklino {*la hundo de Klaŭdia ŝatas mordi. Ĝi estas mordema. Georgo babilas multe. Li estas babilema.*}

-END-

devas esti {*La aŭtomobilo de Ivo funkcias malbone. Ĝi bezonas riparon. Ĝi estas riparenda.*}

-ER-

fragmento, tre malgranda parto de tutaĵo {*fajro – fajrero; fazeolo; mono – monero; – fazeolero (grajno de fazeolo)*}

-ESTR-

ĉefo, direktoro, komandanto, administranto, prezidanto {*ŝipo – ŝipestro; aviadilo – aviadilestro; urbo – urbestro; la urbestro de Pekino estas Wang Anshun.*}

-ET-

diminutivo {*kato – kateto; libro – libreto; Monako estas tre malgranda lando. Ĝi estas landeto.*}

-ID-

filo {*filo de koko estas kokido; filo de homo estas homido.*}

-IG-



fari, ke alia {*la ĉefo laborigis la subulon; la serĝento marŝigis la soldatojn.*}

-IG-

fari, ke si mem; ŝanĝi sian propran staton {*Karla beliĝis, por promeni kun Antono; Stefano riĉiĝis (li gajnis tre multan monon).*}

-IL-

instrumento {*skribi per skribilo; tranĉi per tranĉilo; balai per balailo; transporti per transportilo; metroo estas moderna transportilo.*}

-IND-

meritas, valoras la penon {*valoras la penon lerni Esperanton – Esperanto estas lerninda; la temo de la abortigo meritas esti diskutata – la temo de la aborto estas diskutinda.*}

-ING-

vazo aŭ instrumento por gardi parton de objekto {*plumo – plumingo; glavo – glavingo; skribilo – skribilingo*}

-ISM-

doktrino, movado, sistemo, agmaniero {*budhismo, kubismo, kapitalismo, patriotismo.*}

-IST-

adepto, profesiulo {*budhisto, esperantisto, desegnisto, dentisto.*}

-NJ-

karesa maniero nomi virinon {*patrino – panjo; filino – finjo.*}. [Rimarko: la sufikso -nj- kutimas "manĝi" pecon de la radiko. ☺ En *panjo* ĝi manĝis la literojn *t, r, i* kaj *n* de *patrino*. En *finjo* ĝi manĝis la literojn *l, i* kaj *n* de *filino*.].

-OBL-

multipliko {*la duoblo de 2 estas 4; la trioblo de 3 estas 9.*}

-ON-

divido, frakcio {*la duono de 2 estas 1; la triono de 3 estas 1.*}

-OP-

en grupo kun certa nombro da membroj {*la kuristoj trejnas kvarope (en grupo da 4 homoj); la boksistoj luktas duope (en paroj).*}

-UJ-

vazo, sako aŭ instrumento por gardi tutan objekton {*oleo – oleujo; salo – salujo; mono – monujo.*}. [Rimarko: kelkaj arboj uzas la sufikson -uj-. Ekzemple: arbo de pomo: pomujo (aŭ pomarbo); arbo de mango: mangujo (aŭ mangarbo). Kelkaj landoj uzas aŭ la sufikson *UJ* aŭ la finiĝon *IO*: greka lando: Grekujo (aŭ Grekio); franca lando: Francujo (aŭ Francio).]

-UL-

homo karakterizita de la adjektiva radiko {*forta – fortulo (forta viro); diligenta – diligentulo (diligenta viro).*}

-UM-

nedifina sufikso indikanta diversajn situaciojn {*fari plene – plenumi; ĉirkaŭvolvi per la brakoj – brakumi.*} Ne multaj vortoj uzas la sufikson –um-.

#### LISTO DE LA OFICIALAJ PREFIKSOJ:

GE-

li kaj ŝi, ambaŭ seksoj {*patro kaj patrino estas gepatroj, frato kaj fratino estas gefratoj.*} [La prefikso *ge-* estas uzata pri malgranda grupo. Ni ne diras *geitaloj*, sed diras *gelernantoj* (en klaso de lernantoj kaj lernantinoj).]

BO-

peredziĝa parenceco {*bofilo, bofilino, bofrato, bofratino, bopatro, bopatrino. Se Sonja estas la edzino de Sergio, logike Sergio estas bofilo de la gepatroj de Sonja. En la familio Rompŝtonoj Fredo estas la edzo de Vilma kaj Pearl estas la patrino de Vilma kaj la bopatrino de Fredo. En la familio de Jesuo, Ana estis la patrino de Maria kaj la bopatrino de Jozefo.*}

ĈEF-

la plej bona; la plej elstara; homo kun povo decidi super la kolegoj {*ĉefpastro; ĉefanĝelo; ĉefministro; la Papo Francisko estas la ĉefpontifiko; Tokio estas la ĉefurbo de Japanujo (aŭ Japanio).*}

DIS-

fragmentiĝi en ĉiujn direktojn; iri en diversajn direktojn {*La meteoro super Rusio disrompiĝis en multajn pecetojn (aŭ dispeciĝis).*}

EK-

1. komenco de ago {*Karla ekstudis (komencis studi) antaŭ dek minutoj.*} 2. subita ago {*Karmena ekvidis blaton. Ŝi ekkriis “Helpon!”*}

EKS-

ne plu havanta la profesion, okupon, postenon {*eksprofesoro; Joseph Ratzinger estas la ekspapo.*}

MAL-

antonimo, kontraŭo de adjektivoj kaj adverboj {*En la nigraj-blankaj filmoj de la serio “La Dikulo kaj la Maldikulo”, Oliver estas la dika viro kaj Stan estas la maldika viro.*}

MIS-

nekonvene, erare aŭ malĝuste farata {*misfari; miskompreni.*}

PRA-

tre malnova, tre primitiva, kun tre antaŭa parenceco {(ekzemple, la tre malnovaj tempoj estas la *pratempoj*), tre antaŭa parenco (ekzemple, la patro de la avo estas *praavo*)}

RE-

1. *ripeti, fari denove* {reskribu la respondon; Ni esperu, ke Paul McCartney rekantos sian belan repertuaron.} 2. *reveni, iri returnen* {Post la abdiko, la eksimperiestro Petro la Dua revenis al Portugalujo (aŭ Portugalio).}

## RIMARKOJ

### 1. KELKAJ UNUSILABAJ VORTETOJ FUNKCIAS ANKAŬ KIEL PSEŬDOPREFIKSOJ. Ekzemploj:

**Sendube** (sen dubo)

**Neimagebla** (ne estas imagebla)

**Aliri** (iri al)

### 2. MULTAJ KONATAJ INTERNACIAJ PREFIKSOJ ANKAŬ ESTAS UZATAJ EN ESPERANTO KAJ APARTENAS AL LA RADIKO. Ekzemple:

**Anti-** (*antidoto, antikristo, antinomio, antipatio, antipodo, antisemito, antisepto* ktp.)

**dia-** (*diabeto, diademo, diafana, diafragmo, diagnozo, diagonalo, dialogo, diametro* ktp.)

**epi-** (*epilepsio, epilogo, episkopo, epistolo, epitafo, epiteto* ktp.)

**eŭ-** (*eŭfemismo, eŭgeniko, eŭkaristio*)

**peri-** (*periferio, perihelio, perimetro, periskopo, peristilo, peritoneo* ktp)

### 3. MULTAJ VORTOJ HAVAS DU AŬ TRI PREFIKSOJN AŬ DU AŬ TRI SUFIKSOJN.

Ekzemploj:

**KINEJARO** (KIN-EJ-AR-O) = grupo aŭ placo de kinejoj proksimaj unuj de la aliaj (ĝenerale en butikumcentroj (aŭ butikumaro (butik-um-ar-o)). En multaj grandaj butikumcentroj estas kinejaro kun multaj kinejoj.

**MALJUNULINETO** (MAL-JUN-UL-IN-ET-O) = malgranda aŭ malalta muljuna virino

### 4. MULTAJ VORTOJ ESTAS FORMITAJ SEN RADIKO. ILI HAVAS NUR AFIKSOJN.

Ekzemploj:

- ETULINO (ET-UL-IN-O) = MALALTA VIRINO
- AROPE (AR-OP-E) = EN GRUPO
- ANIĜI (AN-IĜ-I) = MEMBRIĜI, FARIĜI MEMBRO
- GEULARO (GE-UL-AR-O) = GRUPO DE VIROJ KAJ VIRINOJ

### 5. ANKAŬ LA AFIKSOJ SOLAJ POVAS FORMI VORTOJN.

Ekzemple:

- EBLE MORGAŬ PLUVOS.
- JOZEFO ESTAS ANO DE LA ASOCIO.
- LA "ETA PRINCO" ESTAS LIBRO DE ANTOINE DE SAINT-EXUPÉRY.
- LA UJO DE LA KAFO ESTAS PLENA.

# Kiom da horoj vi necesas studi por paroli flue fremdajn lingvojn?



2200 horoj




2000 horoj



1500 horoj



1000 horoj



150 horoj

Instituto pri Kibernetika Pedagogio  
de la Universitato de Paderborn  
(Germanio) por francalingvanoj

Antaŭ ol vi parolas, pasigu viajn vortojn tra tri pordoj. Je la unua pordo, demandu vin mem: "Ĉu tio estas vera?" Je la dua demandu: "Ĉu tio estas necesa?" Je la tria pordo demandu: "Ĉu tio estas afabla?".

*~ Sufiisma Dirajo ~*









## Mi fartas ....



tre bone  
(very well)



bone  
(well)



malbone  
(unwell)



tre  
malbone  
(very unwell)

## Mi estas ....



feliça  
(happy)



malfeliça  
(unhappy/sad)




laca  
(tired)



malsana  
(sick)

de nighstar/noktema mayfair





**Хлеб - Pano**



**Вода - Akvo**



**Молоко - Lakto**

Puisque le cheboeuf est au menu, voici une leçon d'espéranto qui convient pour tout animal, vu que le substantif, le féminin, la descendance, l'adjectif, l'adverbe et les mots dérivés se forment selon le même principe.

<b>cheval</b>	<b>ĉevalo</b>	o = substantif
<b>chevaux</b>	<b>ĉevaloj</b>	j = pluriel
<b>jument</b>	<b>ĉevalino</b>	in = féminin
<b>poulain</b>	<b>ĉevalido</b>	id = descendant
<b>pouliche</b>	<b>ĉevalidino</b>	id + in = descendant féminin
<b>étalon</b>	<b>virĉevalo</b>	vir = mâle
<b>haridelle</b>	<b>ĉevalaĉo</b>	aĉ = péjoratif
<b>écuyer</b>	<b>ĉevalestro</b>	estr = substantif
<b>palefrenier</b>	<b>ĉevalisto</b>	ist = profession
<b>éleveur</b>	<b>ĉevalbredisto</b>	bred/i = élever
<b>haras</b>	<b>ĉevalbredejo</b>	ej = lieu
<b>maquignon</b>	<b>ĉevalvendisto</b>	vend/i = vendre
<b>concours hippique</b>	<b>ĉevalkonkurso</b>	konkurso = concours
<b>course de chevaux</b>	<b>ĉevalkurado</b>	ad = action continue
<b>troïka</b>	<b>ĉevaltrio</b>	trio = trio
<b>piste cavalière</b>	<b>ĉevalvojo</b>	voj = voie
<b>du cheval</b>	<b>ĉevalaĵo</b>	aĵ = chose concrète
<b>écurie</b>	<b>ĉevalejo</b>	ej = lieu
<b>hennir</b>	<b>ĉevalbleki</b>	blek/i = crier
<b>crottin</b>	<b>ĉevalfeko</b>	feko = excrément
<b>crin</b>	<b>ĉevalharoj</b>	haroj = poils
<b>peau de cheval</b>	<b>ĉevalfelo</b>	felo = peau d'animal
<b>brosse de pansage</b>	<b>ĉevalbroso</b>	broso = brosse
<b>chevalin (e)</b>	<b>ĉevala</b>	a = adjectif
<b>à cheval</b>	<b>ĉevale</b>	e = adverbe
<b>mettre en selle</b>	<b>surĉevaligi</b>	ig/i = rendre, faire devenir...
<b>sauter à cheval</b>	<b>surĉevaliĝi</b>	iĝ/i = devenir
<b>équestre</b>	<b>ĉevalrajda</b>	rajd/i = monter à cheval



**Miaj amikoj loĝas en diversaj partoj de la mondo, pro tio mi bezonas uzi iun neŭtralan lingvon.**



**Pro tio mi parolas Esperanton.**

## Fruktoj - Фрукты



Pomo



Traŭbo



Piro



Frago



Persiko



Ananaso



Oranĝo



Ĉerizo



Akvomelono



Banano



Kivo



Pruno

# Животные - Bestoj



Papilio



Kamelo



Anaso



Leono



Serpento



Kato



Ĉevalo



Muso



Fiŝo



Elefanto



Tigro



Hundo

## HELPOSIGNOJ

.	punkto	*	steleto aŭ asterisko
,	komo	“ ”	citiloj
:	dupunkto	'	apostrofo
;	punktokomo	/	suprenstreko
...	tripunkto	-	dividostreko
( )	krampoj	—	haltostreko
?	demandosigno	!	krisigno



**Kiun lingvon parolas la birdoj?**



**La **UZ** bekan.**

**Kiun lingvon parolas la birdoj?**



**La **UZ** bekan.**

\*\*\*\*

# kvar sezonoj

\*\*\*\*



printempo



somero



aŭtuno




vintro





Pomo



Fenestro



Rozo



Krajono



Suno



Plumo



Arbo



Ĉapelo



Birdo



Leono



Libro



Hundo



## El la leteroj

El Svedio

Nia amikino s-ino Birgitt ekde kelkaj jaroj lernas la albanan. Sxi ĉiam konsultiĝas kun ni pri diversaj eroj de la albana lingvo. Jen lasta mesaĝo:

2014-06-07 21:32 GMT+02:00 Birgitta Anevik <[birgittaanevik\\_cls@hotmail.com](mailto:birgittaanevik_cls@hotmail.com)>:

Kara Bardhyl, mi esperas, ke mi ne ghenas vin. Sed mi ne povas demandi iun alian pri la albana lingvo.

Estas malfacile scii, kiun verbon oni trovas en tekstoj (skribadoj), ĉar kelkfoje la formo estas preskau

neebla trovi en vortaroj. Mi skribas ekzemplon:

Mi vidas - Chu mi skribu shikoj, shoh au sheh? Chu shihem estas alia verbo?

Kiel mi skribu: Mi vidis, mi vidos?

Amike

Birgitta

## daŭrigo

Ne shohim, shikojme  
Ju shihni, shikoni  
Ata, ato shohin, shikojne

## Preterito

Une pashe  
Ti pe  
Ai, ajo pa

Ne pame  
Ju pate  
Ata, ato pane

## Futuro

Une do te shoh, shikoj  
Ti do te shohesh, shikosh  
Ai, ajo do te shohe, shikoje

Ne do te shohim, shikojme  
Ju do te shihni, shikoni  
Ata, ato do te shohin, shikojne

Kiel neregula nacia lingvo ankaŭ la albana toleras tiajn formojn diverajn. Mi precizigas: la verbo verbi en la perezento aspektas:

Une (mi) shoh. Sed estas uzata ankaŭ Une (mi) shikoj. Cetere shikim estas vidado Dum la vorto sheh estas por la dua kaj tria persono ; Ai (Ajo) Li, sxi, vidas

La vorto shihem signifas mi vidas min, aŭ mi vidiĝas

Jen la kompletaj formoj de la verbo vidi

## Prezento

Une shoh (shikoj)  
Ti sheh, shikon  
Ai, ajo sheh, shikon

Alia letero:

Saluton kaj dankon pro la informo!  
Chu EU faras ion por helpi la junulojn?

Alia afero.

Nun mi opinias, ke oni/mi devas esti tute freneza por lerni la albanan! En Svedio estas kutime fari poentajn promenojn

kaj aliajn ludojn dum esperanto-kunvenoj. Pasintan sabaton mi estis en somerdometo ekster Gotenburgo de esperantisto

(Sten Svenonius el Malmo) kune kun esperantistoj el la gotenburga klubo. Kiel kutime ni inter alie faris tian promenon.

Char mi havas multajn bildojn hejme, kie mi skribis la nomojn en esperanto, mi pensis skribi ankaŭ la albanajn vortojn.

Sed tio estis tre malfacila afero. (Mi havas Albanian/English Dictionary, Svensk/Albanskt Lexikon, Fjalor Shqip-Suedisht,

Handwörterbuch Albanisch (Albanisch/Deutsch kaj Deutsch/albanisch). Chiuuj tiuj libroj estas nekompreneble grandaj,

dikaj kaj pezaj.) Bedaurinde la vortaroj Svenska/Albanska kaj Shqip/Suedisht ne estas bonaj, malgrau la grandado! Mankas

vortoj kaj trovighas multe da eraroj.

Nu, unue mi serchis nomojn de printempaj floroj. Post multe da laboro mi trovis: thundérz, anemoné e kaltér, anemoné e bardhé.

Eble la albana flauro estas tute alia ol la sveda? Pro tio vi ne havas nomojn de samaj floroj?

La vetero estas terure varma, kaj mi ne emas pli serchi en la vortaroj.

Vespere mi devas promeni en mia ghardeno serchi limakojn, kiuj la lastajn jarojn invadis nian landon. Ili manghas chion!

Morgau mi iros al Gotenburgo por iom prepari por la kursojn (21-25 julio) kune kun Folke Wedlin kaj Inga Johansson.

Miaj pensoj estas iom malklaraj pro la nekutima varmo!

Kore

---

## El Brazilo



Saluton kara,

Kiel vi fartas

kun granda plezuro mi salutas vin kaj deziras bonsanon kaj pacon che via familio. Mi havas alian peton al vi kara, tio ke dum tiu chi semajno mi multe propagandas pri mia agado en Esperanto pri la ekologiaj temoj, pro tio mi sendas al vi ligilon kaj petas vin aperigi unu aŭh aliaj de niaj novajhoj pri la grava temo, che via facebook pagho aŭh blogo kiel infmajho al viaj geamikoj, aŭh alie en intereto, laŭh via ebleco char estas gravaj informoj cele al la defendo de la vivo chu ne karulo.

Mi antaŭhdankas kore. <http://www.boavontade.com/eo/dauripova-elvolvigo>

ghis poste!

Kara,

mi estas surprizitaj kaj preskau sen vortoj.

Sed almenau mi ne restu sen danko, danko al via rapida reago, diligenta daurema laboro por la afero Esperanto.

Kiu amaso da informoj! Kiom multaj paghoj!

Legi kaj prilabori tion, eble bezonos multan tempon, sed certe indos.

Intertempe mi nur povas sendi al vi korajn kaj amikecajn salutojn kun danko

## El Serbio

Instige de nia diskuto en la pasinta klubokunveno mi cerbumis pri la kauzoj de la senespereco inter ni, esperantistoj.

La longjaraj esperantistoj en la klubo donis ekzemplojn de floreganta movado, pli ol en okcidenta Europo antau la dua mondmilito. Ekzemple oni veturis per tri specialaj vagonoj, fine alkrochitaj al la trajno al Zagrebo por festi iun daton au mitingi. Estis aliaj ekzemploj, kiujn mi ne klopodu priskribi, char mi ne bone memoras.

Mi sugestis, ke eble tio estis pro komunismo ("socialismo" mi devas diri, sed okcidenteuropanoj ne faras tiun distingon), kiu helpis akiri la organizajn kaj financajn rimedojn.

La klubanoj neis tiun influon de socialismo, verŝajne – mi pensis poste – ĉar ili komprenis, ke mi pensis nut pri negativaj aspektoj de socialismo. Vere, mi ne scias, ĉu la Titoa socialismo ludis pozitivan rolon aŭ negativan.

Fakto estas, ke ne nur en Serbujo, sed ankaŭ en ekzemple Bulgarujo la movado viglis enorme.

Tradicie – en okcidentaj landoj – oni ĉiam skribis, ke Esperanto estis alloga en orienta Eŭropo, ĉar ĝi donis "fenestron" al la ekstera mondo. Ĝustas kiom koncernas Bulgarujon, mi supozas, sed Jugoslavujo?

Oni trajnis al Zagrebo, kie la homoj parolis la saman lingvon, kun nuancoj. Do ne estis motivo "solvi la lingvan problemon". Mia sugesto estas, ke unuflanke la socialismaj aŭtoritatoj kondukis kulturpolitikon multe pli aktivan ol en okcidentaj landoj, por kontentigi kaj silentigi la homojn, sed ankaŭ pro la "interna ideo" de edukado al internaciismo.

Nuntempe oni ne plu trajnas al Sarajevo. Ekzistas pluraj kazoĵ. Multaj havas rilaton kun la evoluo de la potencrilatoj inter la lingvoj kaj imperiaj kulturoj, sed tio ne influis la rilaton Sarajevo-Beogrado. Tial jena demando:

Kiuj valoroj en la socialismo jes influis tiun rilaton kaj estus retenindaj por preventi, ke nun regas ne nur senesperceto, sed eĉ defetismo rilate Esperanton?

Ĉu la Bulgara socialismo havis la samajn valorojn kaj, se ne, kial tamen tie Esperanto estis relative populara?

Mi esprimas min malbone. Ankaŭ mi ne difinas, kio estas Esperanto. Por mi: la principo, ke homoj ĉie en la mondo komuniku sur egala bazo.

Mi estas scivola, ĉu povas esti ĝi diskuto pri tio.

Johan Derks

La opinioj de amiko Johan sxajnas al mi interesaj kaj trafaj. Kvankam li ne travivis la socialisman epokon, eble li komprenis multon pri ĝi.

Esperanto en Albanio apenaŭ povus disvolviĝi ĉar ĝi bezonus korespondadon kaj ĉi lasta estis suspektinda..simile al la eksa Sovetunio dum la stalinisma epoko. Tamen unuopuloj sukcesis starigi lernokursojn en la kulturdomoj almenaŭ dum kelkaj jaroj pli kvietaj (1958-1961) kie partoprenis ankaŭ mi, nia aktuala prezidanto Shaban Hasani, kaj aliaj. Tiam ni sukcesis eĉ enkonduki esperanton tekston en filmo pri turisma urbo enlande, aperigi eldonon de libro tradukita en esperanto, sed kiel tion ni ekspektis laŭ ordono de kompartia sekretario de Tirana, oni malpermesis tion kaj sendis por kartonigi la libron ĉar ĝi estis skribite en sorĉa lingvo... Nia korespondado estis severe kontrolata de la sxtata sekreta polico, pro tio enirante universitaton mi ĉesigis ĝin. Tiutempe venis revuoj el Ĉinio, Vjetnamio, Laoso kun kiuj landoj amikis Albanio ne nur en la angla, hispana, franca, rusa lingvoj sed ankaŭ en Esperanto. Sed tio ne daŭris longe. Sekvis plua izoliĝo de la lando. Nur post la jaro 1991 nia movado revigliĝis.

Mi opinias ke depende de la severeco de socialismo en certa lando oni ekspluatis esperanton por propagando, por turismado, por internaciismo ĉiam sub la kontrolo de la partio-sxtato.Tiucele la sxtato povus eĉ subvencii mem la movadon (ekz eldonadon) kaj disponigi kulturdomojn ekzistantajn.. Jugoslavoĵ dum la Tito epoko povus moviĝi senprobleme en Eŭropo, dum la ceteraj civitanoj de orienta Eŭropo tra la socialisma tendaro, kio bezonus ankaŭ lingvan komunikilon krom la rusan..



Amike Bardhyl

El Nepalo

Tre kara kaj estimata Bardhyl Seiimi (Mezini)

Elkorajn salutojn.

Antaŭ ol ĉio mi volas elkore danki vin pro via reago respondante mian retleteron kion mi skribis dum Majo 2014 kaj kio estis nia invito al vi pri volontula instruado de Esperanto en niaj ligitaj lernejoj en Kathmanduo kaj ankaŭ en aliaj belaj urboj de Nepalo. En Kathmanduo, du grupoj entute 120 da niaj (mi dekstre kun membriĝkarto de TEĴA kaj S-ro. Nabin SUBEDI maldekstre, vic-ĉefo de SCHOLARS' HOME ACADEMY) gelernantoj kiuj lernis almenaŭ bazan nivelon de Esperanto ŝatas amikiĝi internacie:

<https://drive.google.com/file/d/0B5jwpZFihYŬeIRjWmxoTzZlc3c/edit?usp=sharing> kaj  
<https://drive.google.com/file/d/0B5jwpZFihYŬMtkZVFOOEx5dEU/edit?usp=sharing>

Ĉu vi bonvole povos amikigi geknabojn de via lando al Nepalaj ĉarmaj geknaboj? Ĉu vi aŭ iu el viaj bonkoraj geamikoj jam decidis vojaĝi al Nepalo kaj volontule instrui, lertigi niajn lernantojn flue konversaci en Esperanto. Se jes bonvolu informi al mi tiel frue kiel eblas ke en kiuj monatoj ĝi estos oportune por vi vojaĝi al Nepalo, do ni planu kaj aranĝu por vi senpagan tute oportunan loĝadon. Bonvolu skribi al mi se vi havos ia ajn demandojn.

Bonvolu akcepti miajn elkorajn bondezirojn por vi, viaj familianoj kaj geamikoj.

Amike via

Mian Salam SHANY

- Internacia Ĵurnalisto
- Volontula Esperanto-Instruisto
- Volontula Internacia Kunordiganto ĉe Southwestern State College, Kathmandu, Filosofiska Nepal, Pri Esperanto Kursaro, Kultur-interŝanĝaj & Stud-programoj.

<http://www.southwestern.edu.np/>

Poŝtelefono: 00977 [9843460851](tel:9843460851)

Retadreso: [m.s.shany@gmail.com](mailto:m.s.shany@gmail.com)

- Volontula Internacia Kunordiganto & Volontula Esperanto Instruisto ĉe Scholars' Home Academy, Samakhushi Marga, Samakhushi,

Kathmanduo, Nepalo. <http://www.shaeducation.com/>

Poŝtelefono: 00977 [9843460851](tel:009779843460851)  
Retadreso: [m.s.shany@gmail.com](mailto:m.s.shany@gmail.com)

## Informaĵoj

ESPLORGRUPO FILOZOFIO, SCIENCO KAJ TEKONOLOGIOJ – IFPR  
ELDONA KUNORDIGADO  
J.P.J. ELDONISTO

### **REVUO IF-SOPHIA**

PUBLIKA ALVOKO – ARTIKOLOJ

**ĜENERALA TEMO:** Filozofio

**TEMARA AMPLEKSO:** Historio; Ekonomio; Politiko; Sociologio; socia kaj politika Filozofio; kultura Antropologio; filozofia Antropologio; Senegaleciga Retoriko; Filozofio de l' Edukado; Edukado kaj novliberalismo; Sociologio de l' Edukado; Intervenaj Projektoj.

**LIMDATO POR SUBMETIĜO: 15-a de Aŭgusto 2014**

PRI LA REVUO

• Kontakto: poŝta adreso – Grupo de Pesquisas Filosofia, Ciência e Tecnologias – IFPR - Instituto Federal do Paraná – Av. Cívica, 475 – Centro Cívico – Assis Chateaubriand – Paraná – Brazilo – CEP.: 85.935-000

• Precipa kontakto: Prof-ro Mag. José Proveti Junior

Retpoŝto – [jose.proveti@ifpr.edu.br](mailto:jose.proveti@ifpr.edu.br)

Tel.: 44-8813-1127/ [44-3528-8558](tel:44-3528-8558)

Eldonisto: José Proveti Junior – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.

Kara sinjoro,

Mi estas José Proveti Junior, eldonisto de IF-Sophia revuo, dissciigilo de Esplorgrupo Filozofio, Scienco kaj Teknologioj el Federala Instituto de Paraná – IFPR.

Mi vin kontaktas objektivante peti vian apogon kaj helpon por dissemi la publika alvoko de artikoloj por publikigado en niaj unua eldono kaj numero.

Ni akceptos artikolojn por recenzo ĝis 15/08/2014.

Anekse, mi sendas informojn al aŭtoroj ke povas esti geesplorantoj, geprofesoroj kaj gelernantoj.

Mi vin dankas!

José Proveti

## Artikoloj

Fatbardha Demi

# Albanadevena minoritato en Azio

## De Dodono al Tibeto

*“Atlantidon, pri kies historio estas verkitaj 20 mil libroj, mi rememoris ĉar mi opinias ke la ilira raso el ĝi deveins”*

Ĝusepe Katapano<sup>1</sup>

### 1. La sonĝo de Hitler

Tiu sonĝo ekis en la dezerto, tie kie la grandiozaj piramidoj de faraonoj, staras kvazaŭ retiritaj malantaŭ la plej praa konstruaĵo- Sfinkso- verko de Atlantidoj, forsavintaj al la Diluvo.

\*\*\*

En la jaro 1938, danke al la gastamo de la Reĝa Albana Pordo de Egiptio<sup>2</sup>, la esploristo Ĝusepe Karapano decidis tagiĝi ĉe la dezertaj piramidoj, praa rito de la arbreŝoj<sup>3</sup> de Sicelio.

Ankaŭ post 45 jaroj, kiam li finis sian verkon “Tot parolis albane”, Gusepe rememoras ĉi magian fakton. “La lumo de la Oriento, dum ĝi surgrimpis al la ĉielo, disvastiĝis je pala rozkoloro plifortiĝante laŭgrade, prilumigante trankvile la Sfinkson, per tiuj dikaj nemoveblaj lipoj, tute konforme al la nomo, kiu, kiel ĉiuj aŭtentaj nomoj, elmontris sian esencon kaj funkcion”.

SFINGE. (SFJET + GJĚ, signifas « parolas nenion, silentas”, dismetita de la esploristo Bernardo Bilota (1843 - 1918) « Studime filologjike rreth parahistorikëve (Filologiaj studoj pri prahistorio) » Kastrovilar, 1915) (1)

La Sfinkso estas nomumita “la Tombo de Hermes”, konata en la Praa Egiptio per la nomo “Thot- Tot” (Diranto/ nin alparolas) el kies doktrino inspiriĝis la grandaj Iniciuloj de la Homaro: Rama (ariana ciklo), Kriŝna (Bramana inico), Orfeo (Dionisaj misteroj), Pitagora (Delfaj misteroj), Platono (Eleuzianaj misteroj) kaj Moseo (hebrea misio). (2)

Neniu povis ĝis hodiaŭ eniri en la tombo de Tot. La Sfinkso, tiel kiel la aglino de Iliroj aŭ de Romia Imperio, reprezentas la Lumon kaj La Scion ĝenerale (en la Ĉama<sup>4</sup> subdialekto, la vorto “di- -Mi scias” signifas “dije- scio” kaj “u bë dritë-estiĝis lumo”). (3)

La jaro 1938, hazarde, notus du iniciatojn kiuj rilatis al la konstruintoj de Sfinkso.

Unue, tiu de Ĝusepe Katapano, kiu malkovris la fonetikan alfabeton de la egiptaj hieroglifoj, helpe de la albana lingvo.

Due, la ekiĝon de la germana ekspedicio por malkovri la misterojn de la scioj de Tot, enŝlositaj en la eterna silento de Sfinkso.

Estis Himler (Heinrich Himmler), la fondinto de la speciala taĉmento SS, kiu sugestis tiun sonĝon al Hitler. Ambaŭ kapoj de la naziismo, esperis malkovri la sciencon de Atlandtidoj kaj aparte la magiajn

---

<sup>1</sup> Albanadevena linvisto loĝinta en Italio

<sup>2</sup> Egiptio estis regata dum 130 jaroj de albanadevenaj reĝoj, la lasta estis la reĝo Faruk

<sup>3</sup> Tiel nomiĝis minoritataj albanoj en Italio

<sup>4</sup> Ĉamerio- albana regiono en nordokcidenta Grekio ĉe la landlimo kun Albanio

formulojn, por ke la mondon regu la mitikaj Arianoj. Laŭ la germanaj filologoj kaj antropologoj el 19-2- jc, la germanoj modernaj devenis el la praaj Arianaj popoloj.

Ferdinand Ossendowski, en sia libro ( Ferdinand Ossendowski « Bêtes, hommes et dieŭ ») asertas ke kelkaj Lamaoj de Tibeto, estis parolinte lin pri iu kaŝita profunde loko nomata "Agati" (en la albana Ag/ lumo + Ati- Patro/ t.e. Dio- Lumo) kiel sidejo de la Monda reĝo. Eksterordinara reĝo kiu dum jarcentoj kontrolas la sortojn de la homaro.

Himler estis ravita pro Tibeto kaj estis konvinkita ke ĝuste tie, estis ja la origino de la ariana raso kaj tie saviĝis la praaj fortoj de la ŝtatpotenco.

La ekspedicio de la germanaj sciencistoj gvidata de biologo Ernst Šefer (ĉiuj SS membroj) ekiris de la marhaveno de Genova je 21-an de aprilo 1938, je direkto al la brita Indio por serĉi la "perdintaj radikojn de la germana popolo".



Ernst Schäfer (1910 - 1991)

Post ĉirkaŭ kvar monatoj da streboj por ke oni permesu ilin eniri en la "malpermesita urbo" budhista- Lhasa, la grupo de la germanaj sciencistoj finfine estis en ĝi. La antropologo Bruno Beger, estis ordonita de Hitler por malkovri la similaĵojn inter la kranio de la germanaj popoloj kaj tiuj tibetiaj. Laŭ Hitler, se tio pruvigis, ĉiu magia forto heredita de tibetianoj de la praaj Arianoj, apartenus ankaŭ al germanoj. Mem la ekspedicio estis nomumita "la Heredaĵo de Antaŭintoj" ( Héritage des Ancêtres ) .

Beger faris centojn da antropofaj mezuroj de la formo de la kranio, super brovoj, dimensioj de la vizaĝo, sed malgraŭ tuta akurateco de liaj serĉadoj, la karakterizoj de la germanoj ne similis al tiuj de la aziaj loĝantoj de Tibeto. La esploristo apenaŭ trovis tie eĉ loĝanton kun blondaj haroj kaj lazuraj okuloj. Ĉiujn sciencistojn torturis la demando: Ĉu ekzistis envere ariana raso kaj ĉu envere troviĝis en Tibeto la scioj kaj iliaj magiaj formuloj?

Tamen Šefer akiris la permeson por viziti la fortreson Orion- Burakan, konstruita de la unua Reĝo de Tibeto antaŭ 1500 jaroj.

Je granda miro de la germanaj sciencistoj, anstataŭ la magiaj scioj de la praaj arianoj, en Tibeto ili trovis sian nazian simbolon "Svastikon", je gigantaj dimensioj, etendita sur deklivaĵo de la monto je nomo "Kalaŝ".



La Sankta Budhisma monto Kalaŝ en Tibeto

El ties deklivaĵoj fontis la tri plej grandaj riveroj de la mondo.

La monto Kalaŝ konsideriĝis kiel sankta monto el la tri diversaj eklezioj de Azio kaj troviĝis je 1500 km okcidente de la urbo de Dalaj Lama en Tibeto. La komenciĝo de la Dua Mondmilito devigis Ŝefer –on ĉesigi la pluajn serĉadojn kaj reveni hejmen.

Nur post proksimume 50 jaroj ekde la germana ekspedicio en Tibeto, je 200 km for de la sankta monto Kalaŝ, oni malkovris la ruinaĵojn de praa tibeta regno. La ĉefurbo de la legendeca Regno Kuke estis elfosita komplete en la interno de la monto (4)


Ĉi tie ni forlasas la ekspedicion de Ŝefer kaj la perditan sonĝon de Hitler kaj komencos novan “ekspedicion”: La malkovron de la reĝo / Dio, kiu laŭ la tradicio de la praaj popoloj, nomumis la sanktan monton- Kalaŝ kaj al la mitika fama popolo el la pratempo.

### **Ii Kalaŝoj, ĉu soldatoj de Aleksander ?**

La angla kolonelo Robertson, estis la unua eŭropano malkovrinta je la fino de 19 jc, norde de la india duoninsulo, inter la montoĉeno de Hindokuŝ (Norda Afganio), Pamir (Taĝikistan) kaj Karakorum (Norda Pakistano / Himalajo), loĝantaron de la eŭropa raso vivinta je kompleta izoliteco disde la ĉirkaŭanta azia loĝantaro.

Valo de ĉi tiu montara areo kaj la ties blankhaŭtaj loĝantoj, nomiĝas same kiel la sankta monto de la tibetaj budhistoj: Kalaŝ.

Kalaŝoj loĝas en la montoj de Hindokuŝ en la afgana regiono de Nuristan kaj en tiu pakistana de Ĉitral en la nordokcidenta parto de Pakistano (en la valoj Bumburet, Rumbur kaj Birir). Estas ili gento sama al la loĝantaro vivanta en la valo de Hundêz de la altebenaĵo de Pamir.



La parolata lingvo, “buruŝaski” (albane: vira lingvo) havas nenian rilaton al la parolataj dialektoj en la India duoninsulo. Laŭ la lingvistoj, la lingvon de ĉi tiu loĝantaro, pro la proksimecoj, oni povas enkonduki en la familio de nekaŭkaziaj lingvoj (ne-caucasica) kie enestas la baska lingvo kaj la lingvo de la centra Kaŭkazio. La lingvisto Ilia Kazul (Ilija Casule) opinias ke la lingvo buruŝaski, esprimas la influon de iu praa eŭropa lingvo. (5)

La ADN analizoj de la kalaŝoj kaj hundĉezanoj, atestis pri ia genetika rilato ilia kun eŭropa loĝantaro.

Albanaj esploristoj, komparante la lingvon de ĉi tiu loĝantaro kun la albana lingvo, estas rimarkintaj ne nur komunajn radikojn, sed ankaŭ samajn vortojn uzataj de kalaŝoj kaj albanoj hodiaŭ. Tiu koincido elmontriĝas klare en la toponimoj kiel : La valo “Hundĉez’ (albane hundĉe- nazo); unu marĉejo nomiĝas “Baltor” (albane Balta- koto) kaj unu urbo “Balti”; la monton Bubullimating oni povas konjekti kun la albana vorto –bubullimĉe- tondro; la vorto Nuristan (albane nur- ĉarmeco, belvidaĵo, almenaŭ laŭ la Ĉama dialekto).

Ankaŭ la montoĉeno de Himalaĵoj, laŭ la esploristo Arif Mati<sup>5</sup> devenas el la albana (mal-monto)..(6)

Mem la nomo de la duoninsulo elfontas el la religia kredo kaj lingvo de pelazgoj<sup>6</sup>- albanoj: Hindi (albane- hyn, en la Ĉama subdialekto- hin- eniras) + Di, t.e. la loko kie alvenis / eniris Dio, nomo kiun havas ankaŭ la plej disvastigata lingvo en la Duoninsulo- Hindi.

Ankaŭ la filozofo Sami Frashĉeri (1850-1904) nomis ĝin Hindi.<sup>7</sup>

La fremdaj esploristoj ankoraŭ ne trovis la originon kaj ka lingvan signifon en la eŭropaj, aziaj aŭ prasanskritaj lingvoj de ĉi tiuj toponimoj kaj de mem lingvo “buruŝaski”.

La granda simileco de la kalaŝoj norde de la India duoninsulo al la albanoj de Balkana Duoninsulo, rimarkeblas ankaŭ en la historiaj kaj kulturaj tradicioj, en la ritoj kaj la simboloj de la religia kredo kaj

<sup>5</sup> Albandevana lingvisto

<sup>6</sup> Pelazgoj - praa eŭropa popolo

<sup>7</sup> Albana poeto - renesanculo el 19 jc



de ĉiutaga vivo ilia. “ La moroj pluviĝas ne nur dum jarcentoj- rimarkas G. Hahn<sup>8</sup>- sed ankaŭ dum miljaroj, ni havas eĉ (ankoraŭ hodiaŭ) malnovajn morojn, kies sencon ni ne scias” (7)

En la jaroj 20 de la pasinta jarcento, la usonanino Rose Lane vojaĝis al la Granda Montaro de Shala norde de Albanio. En tiu forgesita angulo ankaŭ de Dio, estis okazinta disputo kun aĝula montarano kiu insistis ke Filipino la Dua, la patro de Aleksander, devenis el la sama raso ilira kiel ankaŭ la ties edzino, Olimpia (Mirtali- pranepino de la reĝo de Mirmidonoj, Akilo).

Junulo aŭskultinta la kontestadon far la malproksima amikino, kiu verŝajne ne konis la “leĝojn” de la albanoj, sin esprimis:” la albanoj sin geedzigas al albanoj, Filipino la Dua edziĝis al virino el sia popolo, kiel estis ĉiam nia kutimo. Se li estus greko, neniu albana familio donus filinon al li” )8)

Tiu miljara tradicio estis rompita post la jaro 1945.

Sed la Hundĉezanoj ankoraŭ gardas fanatisme ĉi tiun kutimon. Ili ne geedziĝas al fremduloj.

Kalaŝoj ne entombigas la mortintojn, sed lasas ilin surtere ĝiskiam la korpoj solviĝas, kutimo trovebla ankaŭ en kelkaj albanaj regionoj. La loĝantoj en Karma kaj Galishta de la Norda Montaro de Albanio estis dirinta al la albanologo hungara Nopĉa, ke iliaj antaŭuloj lasis sur la tera surfaco la mortintojn kaj nur kiam restis la ostoj, entombigis ilin. (9)

Samkiel la iliro-albanoj, kalaŝoj- hundĉezanoj ne akceptis la subiĝon antaŭ la fremduloj kaj militis por sia libero. Laŭ la historiaj donitaĵoj, dum 900 jaroj, ili posedis sian princlandon kaj vivis sendependaj de iu fremda ŝtato, ĝis la jaro 1974.

La kalaŝaj gvidantoj, en la malnovaj tempoj nomiĝis Tsiam (Ĉam- la loĝantaro de Tesprotio), kio pli poste anstataŭiĝis per la titolo MIR (albane i miri / i urti – bona, saĝa).

La esploristo Gulliam Darling, asertas ke en la legendoj kalaŝaj “Tsiam” estas la naskiĝloko de ilia nacieco kien ili esperas reveni iutage.

Laŭ Aristidh Kola<sup>9</sup> la origina loko de kalaŝoj estas ĉe la praa rivero tesprota ‘Thiamis”, de kie venas ankaŭ mem la nomo de Ĉamĉerio. Tsiam signifas Ĉam (10)

La kaprino Amaltea, laŭ la Pelazga mito, nutris Zeŭson de Dodono per sia lakto en la insulo de Krito. Pri la adorado de kaprino en la albanaj teroj, estas skribinta la malnova Plin, Varon, Elian, Atheneu ka. La kaprinon ni trovas desegnititan en la paleolitika groto apud Butrint<sup>10</sup> (la groto de sankta Maria) antaŭ ĉirkaŭ 40 000 jaroj (11)

Ankaŭ por la kalaŝoj kaj hundĉezanoj la kaprino estas diina besto kaj oni gravuras sur la dompordoj du kaprinajn kornojn, kiel simbolon de ilia protekto far la Diino Dezau (albane dhias- kaprino- Zeŭs) kaj tenas neestingitan fajron je lia honoro en siaj hejmoj (12)

En la fig a estas skulptaĵo, el la fino de 19 jc de Kafiroj Baŝgali trovita en la Valo Kalaŝ de Pakistano. Estas skulptaĵo de virino surtrone kun du kaprinaj kornoj surkape. En la fig b la kapo de Zeŭso- Pelazga kun kaprinaj kornoj kaj fig. c la kapŝirmilo de la nacia heroo de albanoj, Gjergj Kastrioti Skanderbeg kun kaprina kapo (Muzeo de Vieno)

---

<sup>8</sup> Albanologo germana

<sup>9</sup> Albana historiisto

<sup>10</sup> Antikva urbo sude en la ekstrema sudo de Albanio



fig. a



fig. b



fig. c

Laŭ iliaj legendoj, la kalaŝoj kaj hundĉezanoj sin nomas posteulojn de la armeo de Aleksander la Granda- Iskandro, kio samas al la nomo de la nacia heroo de albanoj kaj estas sufiĉe disavastigata nomo ankaŭ hodiaŭ.

Sed ĉu envere la kalaŝoj, estas la viroj kaj la virinoj akompanintaj Aleksander la Grandan ĝis Indio? Mi opinias ke la supre menciitaj faktoj subtenas ĉi tiun originon laŭ iliaj legendoj. Sed la nomo Kalaŝ kaj la simboloj de la dikredo konservitaj ĝis hodiaŭ de ili, malkovras multe pli praan devenon ol la tempo de la konkeroj de Aleksander la Granda en Indio je la jaro 321 antaŭ Kristo.

### III Kalaŝ = Svastiko

Mi pritraktos ĉi tiujn du nomojn helpe de la albana lingvo, motivite de la fakto pri la simileco de la kalaŝa loĝantaro laŭ la lingvo, moroj kaj simboloj de la dikredo, kun tiuj hereditaj de la albanoj de nuntempo. Ne sencele mi metis la signon de egaleco inter la nomo de la monto Kalaŝ kaj la nomo de la simbolo Svastiko. Ĉi tiuj du nomoj, kiel ni tion ekvidos pli sube, ne nur atestas pri ilia aparteneco pelazga, sed ankaŭ havas la saman simolan sencon al la luna dikredo de Dodono dardana-tesprota.<sup>11</sup>

Ĉi tiuj du gentoj- (de Kosovo kaj Iperio), estis ne nur unu ĝenro (Titanoj = tanët , la niaj, nia sango en la albana), kiel tion montras ankaŭ la Mitoj, sed ankaŭ ili formis la institucion dikredon de la pelazgoj en Dodono.

Ĉidirekte helpas nin la materialo de du konataj esploristoj de la pelazga skribo, Luftulla kaj Liljana Peza, kiuj sin esprimas ke:

“Laŭ nia opinio, fosante en la signifo de la vorto Svastiko, rezultiĝas ke ĉi tiu vorto devenis de du pelazgaj / albanaj vortoj, kiuj pli poste estas luitaj de la sanskrita. La unua parteto de la vorto “Sw”

<sup>11</sup> Ambaŭ grandaj iliraj gentoj

(Swastika) devenas sameel la praa pelazga lingvo Su = Zu (Zeu). La nomo konsistas el du vortoj: Zeu- (Zeŭs) + ast t.e. “Zeŭsi asht (Zeŭso estas)” (albana gega dialekto). (13)

Mi aldonos ankaŭ la parton “Ka” – (Sw + ast (i) - + - ka), ne kiel finaĵo (en prahistorio ne ekzistis finaĵoj aŭ nodoj), sed kiel vorto esprimanta la sencon de la tuta nomumo kaj signifas “Zeu ĉshtë Ka- (u)” (albane: Zeŭso estas virbovo). La dismetiĝo de la supre menciita nomo sin apogas ankaŭ al la mito kaj la pelazgaj skulptaĵoj de Minotaŭro (fig.a).



a



b

(a) La Minotaŭro speguliĝas per virbova kapo. (b) La Minotaŭro kun ĉevala korpo kaj homa kapo.

Mi opinias ke la praa speguliĝo de Minotaŭro estis kun la virbova korpo, kiel tion atestas ankaŭ la nomo (fig.a).

La virbovo kaj la ĉevalo, kiel ni vidos pli sube, portas la saman simbolon en la luna dikredo de la pelazgoj. (fig.b)


Ankaŭ la nomo Kalaŝ havas la saman strukturon: Kal + ast (albane ĉevalo + estas) kio en la hodiaŭa lingvo faras Kalash (t) subkomprenante la nomo de la reĝo, kiel okazas ankaŭ hodiaŭ kiam ni diras “estas leono” ne dirante la nomon de la homo. La sama nomumo, rimarkeblas ankaŭ ĉe la nomo Deukalion, kiu kune kun sia familio saviĝis de la granda diluvo kaj kreis la novan homan rason: Deu / Zeu + kal + i on t. E. La reĝo n/ Dio - Kali ynë (albane: nia ĉevalo)- (aŭ Zeu kalorësi i jonë- albane: Zeu nia ĉevalrajdisto).

Laŭ la albanologo G. Hahn, ĉi tiu nomo devenas el la albana “dhe – u (la tero) (14)

Sed tiu esploristo ne eksplikas la ceteran parton de la nomo kaj ricevite kiel “dhe – u” ĝi ne havas sencon laŭ la mito. Plutarko kaj Aristoklo la legendon de Deukalion lokigas en la regiono de Dodono en Ĉamërio kaj J.G. Hahn sin esprimas ke :

“Mi kredas ke (ĉi tiu nomo- mia noto) estas tre malnova kaj la pastroj de Dodono estas uzinta ĝin en sia lando” (15)

La saman nomumon ni trovas kiel toponimon en Albanio- en Kalimash: Kal + im + ash (t) signifas Zeu / kal i jonë (albane: Zeŭso nia ĉevalo)



(a) Dio Apolono kun ĉevaloj kun aglinajflugiloj (b) La sankta Virbovo, Dio Api en la praa Egiptio. Liaj kornoj je arka formo portas plenumon, kiel luna Diino Isis, atestanta pri la pelazga dikredo en la praa Egiptio. (c) Virbova kapo trovita en la Akropolo de Mikeno, 16-a jc antaŭ Kristo.

Kiel tion rimarkas la esploristoj, en la dikredo de kalaŝoj, la ĉevalo havis apartan gravecon. En 20-a jc, kiam la eŭropanoj kolektis kaj restaŭris la objektojn de ties kultoj, la plejparto de la figuroj el ligno prezentis la ĉevalon. Ankaŭ en la arkeologiaj materialoj de iliroj, Dioskuroj, la ĝemeluloj de Zeŭso, sin prezentas ĉiam akompanataj de ĉevaloj.

En la pelazgaj mitoj, la ĉevaloj kun aglinajflugiloj kondukas ĉiujare Apolonon en lian landon Ipe – la borealoj- dardanaj gentoj de Kosovo (Ipe- laŭ la subdialekto Ĉama- aglino + neĝo t.e. la aglinoj de la neĝa lando) (foto supre)

La albanoj kultivis grandajn gregojn de rasaj ĉevaloj. Tion atestas ankaŭ Pukevil<sup>12</sup> “la teruraj hundoj (molosaj- mia noto) gardantaj la brutarajn gregojn kaj la famaj ĉevaloj de Albanio estas la plej bonaj en la Eŭropa Turkio, jen pro la korpa beleco jen pro kurada rapideco” (F. Pouqueville, Voyage dans la Grèce, Paris, 1820) (16)

En ĉi tiu punkto de nia “ekspedicio” ni devas klarigi du problemojn:

Unue: kial la nomo “ka- u “ = “kal –l” (“ka” estas la radiko) en la simbola senco de la pelazga dikredo?

Due: De kie originas la diina reĝo de Tibeto je nomo Kalaŝ?

Mi volas akcentigi, ke la klarigo de ĉi tiuj du punktoj, rilatas al la pli grava problemo de la eŭropa Historio de pratempo: la pruvigo per faktoj de la historia ekzisto de la Arianaj gentoj kaj ilia origina lando.

---

<sup>12</sup> Franca konsulo ĉe la kortego de Ali Pasha Tepelena, suda Albanio, komence de 19-a jc

Por ke oni klarigu la unuan punkton ni devas plongi en la profundecoj de pa prahistorio, en la periodo nkiam en la dikredo de la primitiva homo, ankoraŭ ne estis kreitaj la mitoj pri Dioj je homa aspekto.

#### IV Svastiko – la eterna energio

Por klarigi la unuan demandon, unue ni devas kompreni kion reprezentis la simbolo svastiko aŭ la rompita kruco, kiel ni konas ĝin hodiaŭ. Sendube svastiko estas unu el la unuaj geometriaj desegnaĵoj en la historio. Ĉi tiu simbolo estas trovita gravurite en la ostoj de mamuto (Gagarin) aparteninta al la lasta periodo de glaĉeroj, kiel simbolo de la unua dikredo de la primitiva homo. (17)



(a) Svastiko (rompita kruco) en la desegnaĵoj de la pelazga kulturo Vinka (neolitika periodo, miljaroj 6-5 antaŭ Kristo) (b) Ceramikaĵo trovita en Teba, jaro 680 antaŭ Kristo, Muzeo de Ateno - Britomartis (c) Etruska arto, jaro 700 antaŭ Kristo

Mem la dikredo, naskiĝis preter la disiĝo de la homo disde la besta mondo (Homo Paleontropo) kaj kiel sin esprimas M. Eliade:

“Vivi kiel homo, estis en si mem dikreda ago” (18)

Tio kio mirigis la esploristojn estis la ekzisto de la samaj geometriaj figuroj, kies signifo verŝajne restis neŝanĝita dum 30 000 – 9 000 jaroj, en spaco geografia, ekde la okcidenta bordo franca-hispana ĝis Siberio.

Laŭ la esploristoj Leroi- Gourhan, tiu neŝanĝiteco de la dikredaj simboloj, koncernas la disvastiĝon tra renkontiĝoj, de la sama ideologia sistemo, difinanta la “grotan dikredon” (19)



Ĉi tiun fakton konfesis ankaŭ la arbresa sciencisto Ĝusepe Katapano.

“Multjaraj studoj je grado filozofia, teofizika, historia, arkeologia, etnografia, mitologia, matematika, kemia, fizika kondukis en la konkludo ke oni devas renvesri la tradicion, kiu prezentas nur la neolitikan civilizon kiel kruciga frukto”. (20)

Ĉi tiu aserto klarigas kial la svastikon (preter la ceteraj simboloj) ni trovas en Eŭropo, Afriko, Proksima kaj Malproksima Azio, ĝis ĉe Aztekoj de Ameriko kaj kial ekzistas simileco en la simboloj, mitoj kaj ritoj en ĉi tiu geografia spaco. Ĉi tiuj studoj, atestas pri la tezo ke: La primitiva homo, moviĝante kontinuece dum miloj da jaroj en tre grandaj spacoj geografiaj, disvastigis (aŭ imponis al la lokanoj), la originan dikredon, la plej evoluintan tiutempe, de Eŭropo ĝis la Malproksima Azio, kiu disvastiĝis de gentoj je sama raso (kiel tion mi elvolvos pli sube.

Sed kion simbolizas la svastiko? La esploristo N. Stillo<sup>13</sup> traktas ĝin kiel literon de la linearaj skriboj plej praaj de Eŭropo. Ĉi tiuj literoj el la jarcentoj 6, 5,4 antaŭ Kristo estas trovitaj je 14 km oriente de Belgrado, en Vinka, (Serbio), en Argisa de Larisa, je 8200 jaroj antaŭ Kristo (Nuna Grekio), en Seklo de Magnezio, 8700 jaroj antaŭ Kristo, en la monaĥejoj de Ĉamerio 5508 jarojn antaŭ Kristo ka. (21)

Kiel estas jam pruvite, la primitiva homo, por esprimi la penson skribita per la hieroglifoj, estas akceptinta kiel modelon la figurojn el la naturo, samkiel la simbolojn de la dikredo, unu el kiuj estis ankaŭ la svastiko.

Ĝis hodiaŭ, ankoraŭ ne ricevis sciencan respondon la demando, kion tio esprimas en la dikredo kaj ne rare ni legas ke tio estas ia Suna simbolo. Konsiderante la arkeologian materialon, ni rimarkas ke ekzistis diversaj prezentiĝoj grafikaj de la svastiko, sed kiel spegulaĵo de unusola simbolo en la dikredo.



(a) La Baska kruco (b) Budho (c) La simbolo en la helikaformo ĉe la piedo de la leono en la praa Egiptio. Muzeo Egizio - Torino

<sup>13</sup> Albandevana esploristo





a



b

Hieroglyphen, Teotihuacan style, before 700

(a) Tapiŝo de la trono de Dalaj Lama. Estas simbolo de la dikredaj ritoj en Budhismo, Bön, Himalaja Ŝamanismo, Korea Budhismo kaj japana Budhismo (b) La hieroglifo esprimanta la svastikon en la kulturo Azteka nomumita “Teorihuacan”.



a



b



c

(a) Monumento de la Renesanco de Armenio. (b) Svastiko kaj la virbova korno, arkeologia muzeo Arle, Francio (c) Mozaikaĵo en la Baziliko de la urbo Tirana (jarcentoj 4-5).

Oni rimarkas ke la sama simbolo ampleksas preskaŭ la tutan Mondon kaj ĉie ĝi esprimas la saman ideon- la movon. Do, la svastiko ne prezentis la simbolon de la radianta Suno, sed tiun de la turbino dum la movo. N. Stillo rimarkas ke en la arvanita<sup>14</sup> vortaro ni havas la vorton “tërmboni” kaj en la neotoska<sup>15</sup> ni havas la vorton « türmboni » por la flugilo de la akvomuelejo, kiu en la greka signifas « turbino ». En ĉi tiu figuro ni trovas kiel simbolon en la brustŝirmilo de eolanoj kaj de Enea kiu konsideriĝas kiel la unua gvidanto kaj fondinto de la latinaj eolanoj. (22)

La akvo kaj ventomuelejoj ricevis la ideon kaj la modelon, el la simbolo kaj senco kiun havis la svastiko en la dikredo de la primitiva homo.

Kion esprimis en la dikredo la radiko “ka” (albane: virbovo), mi serĉos ĉe la pelazga loĝantaro, per kies lingvo (pelazgo-albana) estas nomumitaj kau, kali (virbovo, ĉevalo) kaj la svastiko. Nia “ekspedicio” pri la pratempo, ne prikonsideris la hodiaŭajn ŝtatajn limojn, sed ampleksos la tutan spacon kie loĝis ĉi tiuj gentoj. La respondo ni trovis ĝuste en la skriboj malkovritaj en Egiptio, kie estas sciite ke la unuaj plej famaj Dinastioj, havis pelazgan originon. Tion atestas ankaŭ la okulta

<sup>14</sup> Arvanitoj- albanoj en Grekio fuĝintaj tie antaŭ la XV jarcento kaj pli poste

<sup>15</sup> Toskoj unu el la du grandaj etnokulturaj albanaj loĝantaroj.

filozofio, laŭ kiu la praaj egiptoj estis Atlantidoj- Arianoj saviĝintaj disde la diluvo. (Il Glossario Teosofico di Helena Petrovna Blavatsky, ROMA)


Pri la radiko “ka”, trovita en la nomumoj Kalaŝ / Svastiko, en la libro “ La lecionoj de Ptahhotep” el la periodo de faraono Djedkare (miljaro 3 antaŭ Kristo), en la tiutempa dikredo oni diras:

“Maksimo 26 – Pri la prava uzado de la kreiva energio “ka”; Tio troviĝas ĉie, en la animaj estaĵoj kaj en senanimaj estaĵoj. Apartaenas al la saĝulo eklerni kiel uzi Ka-n” (23)

Do, la Svastiko, en ĉiuj ties formoj, simbolizas en la dikredo de la pelazgoj la kreivan energion eternan konatan hodiaŭ kiel “spirito”, kiun Dio estas enkarniĝinta ĉie en la Naturo. Do la sama radiko “ka” ĉe la nomoj de Virbovo kaj Ĉevalo, atestas ke ĉi tiuj bestoj estis diinaj estaĵoj kaj la simboloj de la sama dikredo. En multaj moneroj de la ŝtato de Epiro (de Aleksander kaj Pirro Molosa) prezentiĝas la virbovo dum la sturmo. La virbovon oni oferigis la la Diino Dhemetra, Zeŭso Tesprota<sup>16</sup>, Dioniso, Apolono ka. Kaj multaj toponimoj portis ĝian nomon. En la popolkostumoj de la diversaj distriktoj en Albanio, troviĝas stiligita la kulto pri la virbovo. (Gjirokaster, Tepelena, Berat, Kukës, Lezhë,ka). (24)

En la praaj mitoj de la popoloj kiuj havis la lunan dikredon de Dodono (Tesprotio), aŭ estas influitaj de ĝi, la “Kreivan Energion ni trovas ankaŭ je alia nomo: “Mana”. (F. Demi “Besimi hënor dëshmi e autoktonisë së Kombit Arbër”- La luna dikredo- atestaĵo de la aŭtoktoneco de la Arbëra Nacio)

La simbolon de la svastiko, ni vidas ankaŭ en la objekto de la kulto pri kalaŝoj (fig.a).



Ĉi tiuj du ĝemelaj skulptaĵoj el ligno (fig.a) dediĉitaj al la “Kulto pri la antaŭuloj”, kion atestas la karakteriza trono en la skulptaĵoj de la prahistoriaj Dioj. Ĉe la ligna piedo ni havas la simbolon de la “kreiva energio” – Ka” (bumburet)

<sup>16</sup> Tesprotio regiono en suda Albanio kaj norda Grekio)

Atestaĵo de la pelazgo- ilira origino de la kalaŝoj estas ankaŭ la lanĉapoj sur la kapoj de la statuoj, karakteriza nur de la iliro- albana vesto. Ĉe la (fig b) ni havas albanan montaranon, 20-a jc. Ĉi tiu skulptaĵo (fig.c) same estas dediĉita al du ĝemeluloj kun lanĉapoj, al Disokuroj, filoj de Zeŭso. La statuoj de la kalaŝoj (fig.a) estas dediĉitaj ĝuste al la pelazga mito de ĉi tiuj ĝemeluloj kun lanĉapoj, filoj de la Virbovo – (atestita de la svastiko).

Dum la pratempo, la vesto, la modelo de la haroj, la simboloj sur la armiloj, la ornamaĵoj ka. montris al kiu loĝantaro kaj dikredo ili apartenis. Por la iliro-romianoj, la kapo kaj la ĉevala vosto, estis la lokoj kie troviĝis “ka” kaj antaŭ la bataloj ili oferis ĝin al la milita Dio Marte. Ankaŭ sur la siaj kaskoj ili surmetis la ĉevalan voston, por ke Dio protektu ilin dum milito. (fig.a)

Ĉi tiun “ĉevalan voston” ni trovas ankaŭ sur la lanĉapo de la albanoj, atestanta pri la rilato al la Kreinto.



(a) Campo Marzio, Roma, jaro 100 antaŭ Kristo (b) La ĉevala vosto sur la lanĉapo en la albana kostumo, Shkodër, 20-a jc.

La virbovo, komence estis simbolo de kulto de la Luno (ĝiaj kronoj havis la ties arkan formon) kaj en la arkeologiaj trovitaĵoj speguliĝis kiel plena figuro aŭ nur la kapo aŭ ties kornoj, por esprimi ĉiamfoje la Lunan dikredon de iliro-pelazgoj.

Mi akcentigas ĉi nomumon de la dikredo ĉar estis ja la origina dikredo de la primitiva homo, plej longviva kaj plej potenca dum la Pratempo. La apero en la sceno de la Reĝoj / Herooj, kiuj instalas la ŝtatpotencon per la militista Forto, Leĝoj kaj Scio sur grandaj geografiaj spacoj, alportis notindajn ŝanĝiĝojn en la dikredo. La masklaj dioj de Eŭro-Azio starigitaj sen la Panteono de la Dioj (dum patriarĥato), ricevis de Diinoj, preter la trono, ankaŭ la simbolojn de la frua periodo (de matriarĥato) kiel la virbovon, la aglinon, la stelon / krucon, ka.

Kiel atestas Maria Gimbutas (“Il linguaggio della Dea”, p.25, Venezia, 2008) en la arto de Paleolitiko, Fero, kaj aparte Kupro, ni trovas la svastikon esprimantan en la primitivaj statuoj, kotaj



uoj, platoj, altaroj, ka kiel esprimaĵon de la ina figuro sanktigita. En pli postaj periodoj, la svastiko nomumiĝis kaj aliĝis al la masklaj figuroj.



(a) La luna diino de Dodono, Sellena kun du virbovoj. (b) La reĝo kun la virbovaj kornoj kaj la luno kun la stelo atestantaj pri la luna dikredo en Persio dum la 4-a jc. (c) Shiva kaj Uma sur la virbovo Nandī, skulptaĵo en Prang Song Phi Nong, Tajlando.

En la vortaro de zoteristo el 19-a jc., Helena Blavatski, ni legas ke en la alfabeto de hebreoj la Virbovo (𐤄) estas simbolo de la litero A (Aleph) per kiu komenciĝas ĉiuj alfabetoj de la mondo. Ĉi tiu litero havas grandan mistikan forton kaj esprimas la numeran valoron “unu”.

Ĉe la kristana Kabala ĝi reprezentas la Triopecon al la Unueco kaj estas konstruita de du Y je kontraŭaj direktoj- (⌘), (25)

Kio estas ja la Svastiko. Ĉi tiu fakto atestas pri la pravenco de la lingva dismetiĝo farita de ni, samkiel pri la praeco de la albana lingvo.

La Virbovo kaj la Ĉevalo, kiuj laŭ la pelazga dikredo esprimis la “diinan energion”, havis egalan simbolecan valoron. Multaj objektoj aŭ diversaj fenomenoj en la naturo, esprimantaj la samajn simbolojn en la dikredo, estas nomumitaj same aŭ havas la saman noman radikon. Tial la nomo de la monto Kalaŝ kaj de la simbolo de Svastiko sur la ties deklivaĵo, esprimas la saman portreton- la teran reĝon sanktigita de Tibeto.

Ĉu nur de Tibeto?...

## V

### La plej justa reĝo de la antikveco kaj la plej forgesita de historio

Ke la nomo Kalaŝ, apartenas al sanktigita tera reĝo, tion atestas Esiodo: “La Dioj kaj la mortebraj homoj havas la saman originon” (Le opere e i giorni, 108) . (26)

Fakto apogita ankaŭ de la nomo de la popolo "Kalaŝ" vivanta ankoraŭ hodiaŭ en tiu geografia spaco. La esploristo G. Hahn<sup>17</sup> skribas ke: "Oni ne bezonas alporti pruvojn ke multaj popolaj nomoj malnovaj estas la samaj al la nomoj de iliaj naciaj Dioj". (27) Kiel ekzemplon oni povas doni ankaŭ la nomon Alban de albanoj, kiel ni vidos pli sube.

La nomo en prahistorio estis "la biografio" de la homo, t.e. ĝi esprimis la kvalitojn aŭ la ties "verkojn". Tial la homo portis multajn nomojn, kiujn povus porti ankaŭ la aliaj homoj se ili sin distingis pro la samaj meritoj. Tiel ni renkontas kelkaj Zeŭsojn, Horosojn, Moisiejn, Herkulojn, Agamemnonojn, Dionisiojn, ka. Sed en la Mito, oni rememoris la plej faman, kies verkoj atingis ĝis hodiaŭ de la praaj aŭtoroj, arkeologiaj objektoj, lingvo kaj dikredo.


Por pli malpezigi la problemon, mi ne priskribas la vojon laŭ kiu la esploristoj kiel N. Stillo ("Etrusikishte - Toskërishte") sukcesis malkovri kelkajn el la nomoj, inventaĵoj kaj heroismaĵoj de la "plej justa Reĝo de la antikveco kaj plej forgesita de historio", kiel li estas nomuminta sian samnacionon prahistorian.

El la plej konataj mitoj de la pratempo estas tiu de Minotaŭro, kies foton ni prezentis en la komenco. Ĉi tiu nomo konsistas el: Mino + taŭr, t.e. Mino / kau (la virbovo) kaj laŭ N.Stillo oni temas pri la reĝo de Mikeno- Mino, konata ankaŭ per multaj aliaj nomoj. En la egipta praeco ni trovas per la nomo de la tera faraono Amasi kiun egiptologoj nomas Ahmore (1550- 1525 antaŭ Kristo). (28)

En la albana lingvo, por la Ĉevalo oni uzas ankaŭ la vorton At, kio estas same unu el la nomoj de Mino kaj en la suba foto (fig.a) li prezentiĝas kiel junulo- (en la dikredo), konata per la nomo Attis aŭ Atunis, kio en la albana lingvo dismetiĝas: At + un (is), t.e. mi..la Patro / Kal.

Laŭ Diodoro (Diodori 3, 70, 1) lin nomas "Ipokentaŭro", duonĉevalo kaj duonhomo, "ĉar ili estis la unuaj kiuj dresis la ĉevalon kaj konceptiĝis la mito ĉar naskiĝis duformaj" (29)

La "friga" ĉapelo de Attis aŭ Adonis (la unua ĉevalrajdisto) (30) estas la sama al tiu de Zeŭso (31) kaj de albanoj de Ĉamërio el 19-a jc. (fig.b)



<sup>17</sup> Germana filologo



(a) Skulptaĵo de Attis kun lanĉapo friga, 2-a jc. antaŭ Kristo (b) Albano el Joanino.

En la arkeologiaj materialoj, (fig.c) la faman reĝon Mino ni havas prezentitan en la kulmino de la aĝo, duonvirkapro kaj duonhomo, konata per la nomo PAN.

Pan aŭ lia plena nomo- Alpan, eksplicitas per la Ĉama subdialekto de la albana lingvo: A LË PAN, t.e. A ( la unua), LË (lëri – vuri – lasu, surmetu) PAN (panojn- velat- la velojn).

Laŭ la mitoj, li estis la unua kiu uzis la velojn en la ŝipoj, barkoj (32)

Lia nomo estas eternigita en la montoĉenoj de Eŭropo kaj Norda Albanio- Alpoj.

Ĉe la latinoj la litero 'p' transformiĝis al 'b' kaj hodiaŭ ni havas la nomon Alban, reprezentanta unu el la nomoj de albanoj kaj trovas kiel toponimo en multaj landoj dela mondo. Pan estis la reĝo- paŝtisto kiu jungis la virbovon..(33) kaj surĉevaliĝis.

En la mitoj ni konas ĝin kiel patron de Zeŭso de Olimpo, per la nomo Krono.

Lia vera nomo estas Momfeu, reĝo de Ĉamërio / Tesprotio (34)

Ĉi tiu lando, de la lokanoj nomiĝis Iperi (Shqiperi- Ipe en la subdialekto ĉama = aglino, la birdo de Zeŭso) kie, pro la skribistoj, du vokaloj estas interŝanĝintaj la lokojn – (i /e ) kaj restis Epir. En Iperio naskiĝis la unuaj mitoj de la mistero kaj multaj reĝoj kaj reĝinoj sanktiĝis kiel Dioj.



a

b



---

(a) Gerasa (Jerash), Giordania. Du svastikoj en ambaŭ flankoj de la leporo, kiu en la mito rilatas al la Luno, kaj maldekstre sin klare distingas la nomo PAN. (b) Pan kun kaprina kapo kaj la Virbovo en ŝturmado kun la suba skribaĵo: Thorius (la virbovo) - Albus. (35) Alban aŭ Pan, havis du ĝemelajn filojn, reĝoj- militistoj, inventistoj, leĝdonantoj kaj grandaj Pastroj: Nakon kaj Sharrian, kiujn la historiografio konas per la nomo *DIOSKUROJ* (36). Ili nomumiĝas Kabiroj (Cabir) (Ka + bir, en la albana lingvo: filoj de la Virbovo) kiel nomumiĝis ankaŭ ilia gento.

---

Laŭ Ĝ. Katapano, la pelazgo-iliroj, transpasinte Kaŭkazon, surgrimpis al la montoĉeno de Himalajoj ekde la Ŝtona epoko (37)

Danke al tiuj marŝadoj Orienten, la rokegaj gorĝoj de la montoj de Kaŭkazio, dum pratempo nomumiĝis “La Pordegoj de Alban” (38).

Ekde tiu tempo, ne ĉesis la migradoj de ĉi tiuj gentoj Orienten. Ĉi fakto sin apogas al la toponimoj, lingvo, mitoj kaj simboloj de la pelazga dikredo, kiuj havas siajn paralelojn en Azio, aparte en la dikredo kaj la sanskrita lingvo. (vidu Petro Zhei “Shqipja dhe Sanskritishtja” La Albana kaj la Sanskrita., II, Tiranë, Tertiumdatur, 2006)

La dikredo en la pratempa Azio, laŭ la tekstoj de Rig Veda, apartenis al pastra elito subigita al la militista aristokratio. Do, temis pri armeo kiu diktis al la aŭtoktonaj loĝantoj per de la forto. En la india Rig Veda, oni parolis pri loĝantaro je nomo “Pani” kiuj forŝtelis la bovinojn kaj ne akceptis la lokan dikredon..(39)

Por la plej granda konkerinto de ĉiuj tempoj atestas ankaŭ Diodoro: “La plej kulturitaj inter la indianoj rakontas miton (...) Oni diras ke en la plej praaj jaroj, tiam kiam la loĝantoj de ilia lando vivis disvastigitaj tra la vilaĝoj, alvenis Dioniso el la Okcidento kun konsiderinda forto. Li trairis la tutan Indion, ĉar ne ekzistis urbo grava kiu povus rezisti- (...) li fariĝis fondinto de la gravaj urboj resumigante multajn vilaĝojn kune en taŭgaj lokoj, li predikis al ili honorigi la diinojn kaj starigis leĝojn kaj juĝeojn. Kaj per malmulte da vortoj, per la multaj kaj apartaj faroj plenumitaj de li, oni kredis lin kiel Dio kaj li ĝuis nemorteblajn honoraĵojn.

Oni diras ke li portis kune kun la armeo, grandan nombron da virinoj, ankaŭ en la batalejoj, uzadis tamburojn kaj cimbalojn, ĉar ankoraŭ oni ne estis inventintaj la trumpetojn. (...) Li plenumis la plej glorajn verkojn ol iu ajn alia reĝo antaŭ li (...) (40)

Ke Diodoro parolas pri Alpan, reĝo de Tesprotio, tion atestas ne nur N. Stillo, konfesanta ke Dioniso kaj Ari estis same liaj nomoj, sed ankaŭ la nomo de la loĝantaro “Kalaŝ” de Hundëzo, de la monto en Tibeto kaj la simbolo de svastiko, kiuj kompreniĝas per la lingvo kaj mitoj iliro-pelazgaj. Neniu alia lingvo ne eksplikis ilin ĝis hodiaŭ.

Tion atestas ankaŭ la posteuloj de la iliro-pelazgaj gentoj: Albanoj aŭ Arbanoj hodiaŭaj (Albanio, Kosovo, Montenegro, Makedonio, Grekio kaj Diasporo), kiuj, kiel estis pruvite en la komenco de la materialo estas la sola loĝantaro similanta je lingvo, dikredo kaj tradicio al Kalaŝoj Hundëzanaj. Estas same la legendoj de ĉi tiu loĝantaro atestantaj ke la originon ili havis en Ĉamërio.

## **Konkludo**

La nomo de la legedendeca reĝo Kalaŝ apartenas al la Reĝo tesprota Alban (Alpan) aŭ Ari aŭ Joni, ka. La armeo postrestinta lin kaj la ondoj de la gentoj iliro-pelazgaj, kiuj daŭre iradis Orienten, kiel faris ankaŭ Aleksander la Granda, disvastigis en la fora Azio la kulton de la luna dikredo de Dodono. Ili “stampigis” lian nomon (svastikon) sur la sankta monta deklivaĵo en Tibeto kaj en la dikredo budhisma. Ĉi tiuj pelazgaj gentoj, estis la unuaj, malfermintaj la vojon inter Okcidento kaj Oriento, kiu pli poste nomumiĝis “la Silka Vojo”.

La Albana origino kaj la naskiĝloko en la historiaj teritorioj de Arbroj de la reĝo Ari kaj de la ties gentoj “arianaj”, legiĝas ankaŭ en la ties “pasporto”: La radiko “Ar” de la nomo, eksplikeblas nur per la lingvo kaj la mitoj iliro-pelazgaj (kio ne estas objekto de ĉi tiu studo).

---



Ĉi tiun radikon ni trovas ankaŭ ĉe la pelazga Dio de la milito, Ares. (la figuro supre) kaj ĉe latinoj Marte, kiu nomiĝis ankaŭ Pirro kaj Silvanus (kiu same rilatas al la praa historio de iliro-albanoj)- kiu havis kultan simbolon, preter la sago, la Ĉevalon kaj la Virbovon.

La Granda Reĝo de ĉiuj tempoj Ari, kiun serĉis ĝis la fora Tibeto la germana ekspedicio de Himler, perdis la vivon dum la batalo en Kosovo, kie hodiaŭ troviĝas la urbo de Prishtina, kies nomon ni trovas en la albana lingvo, montranta malfeliĉon. (41)\_

3. 06. 2014

### Literaturo

1 - p.44 Xhuzepe Katapano "THOT - i fliste shqip" (Tot parolis albane) Bardi Editore, Roma, 1984, ne shqip nga Botimet Enciklopedike, 2007

2 - p39 Xh. Katapano samloke

3 - p. 44 Xh. Katapano samloke

4 - Dokumentari [http://www.youtube.com/watch?v=0p2s9P\\_HP4](http://www.youtube.com/watch?v=0p2s9P_HP4)

5 - <http://it.wikipedia.org/wiki/Burushaski>

6 - p. 279 Arif Mati "Odisea e pabesueshme e nje populli para - helen" (la nekredebla odiseado de nehelena popolo) Tirane, Plejad 2007

7 - p. 448 Johan G. Hahn "Studime shqiptare" (Albanaj Studoj)

8 - p. 138 Rose Lane "Majat e Shales" (La Pintoj de Shala) Tirane 2004

9 - p. 187 Franc Nopça « Pikpamjet fetare, doket dhe zakonet e Malcise se Madhe, (La religiaj vidpunktoj, la moroj kaj kutimoj nde la Granda Montaro) Botimet « Eneas », Tirane, 2012

10 - Salih Mehmeti "Qytetrimi Pellazg ne Azine Qendrore" (La Pelazga Civilizo en la Centra Azio) Prishtinë, 07. 12. 2012 [www.pashtriku.org/?kat=45&shkrimi=1080](http://www.pashtriku.org/?kat=45&shkrimi=1080)

11 - p 138, 140 Dhimiter Pilika "Pellazget - Origjina jone e mohuar" (nia neita origino)

---

- 12 - p.69 Aristidh Kola "Gjuha e Perëndive" (La lingvo de dioj) Plejad, 2003
- 13 - Liljana dhe Luftulla Peza "Zeŭstika - Nje simbol i lashte pellazg"  
<http://www.pashtriku.org/?kat=45&shkrimi=2516>
- 14 - p.446 J. G. Hahn samloke
- 15 - p. 446 J. G. Hahn samloke
- 16 - p. 180 Veis Seiko « Mbi elementet e perbashketa ne epiken shqiptaro - arbereshe dhe serbokroate » v. 2002
- 17 - p. 31 Mircea Eliade « Storia delle credenze e delle idee religiose - Dall'eta della pietra ai misteri eleusini » BUR Saggi, 2013
- 18 - p. 7 M. Eliade samloke
- 19 - p. 27, 28 M. Eliade samloke
- 20 - p. 7 Xh. Katapano samloke
- 21 - p. 184, 185 N. Stillo "Etruskishte - Toskerishte" West Print
- 22 - p. 163 N. Stillo samloke
- 23 - p. 33 Mesimet e Ptahhotepit (Libri me i lashte i botes) Logoreci, 2006
- 24 - p. 218, 219, 221 Dh. Pilika samloke
- 25 - FI Glossario Teosofico di Helena Petrovna Blavatsky ROMA
- 26 - p. 277, 278 M. Eliade samloke
- 27 - p. 322 G. J. Hahn samloke
- 28 - p. 294, 297N. Stillo samloke
- 29 - p. 111, 127 N. Stillo samloke
- 30 - p. 308, 70, 230 N. Stillo samloke
- 31 - p. 130 N. Ceka "Archaeological Treasures from Albania", bot Migjeni vol I, 2012
- 32 - p. 203 N. Stillo samloke
- 33 - p. 287N. Stillo samloke
- 34 - p.7, 9 N. Stillo, „Iliriada“Athine, 2005
- 35 - L. THORIVS - BALBVS Ag Ø 17 - 22 mm 3, 25 - 4, 15 g 105 a. C. <http://www.antiqua.org/Monetazione%20IV-III%20Sec%20aC.htm>
- 36 - N. Stillo samloke
- 37 - p. 124 Xh. Katapano samloke
- 38 - p. 55 Edwin Jacques "Shqiptaret" (Albanoj), 1995
- 39 - p. 219, 216, M. Eliade samloke
-

---

## Batali kontraŭ drogaĉoj kaj alkoholemo

*Artikolo publikigita per la brazila ĵurnalo "A Tribuna", vendredon, la 22-an de februaro 2013.*

• Paiva Netto

Internacia Tago por Batalado kontraŭ Uzado kaj Neleĝa Trafiko de Drogaĉoj. Elstarigi tiun daton, kiun oni celebras je la 26-a de junio, estas altvalore por sano ĝenerale, aparte por la sano de niaj gejunuloj. Ekde frua aĝo oni devas lerni kiel kruela estas la destino, kiun drogaĉoj kaj alkoholo proponas al homoj.

Bedaŭrindaj konsekvencoj klare aperas antaŭ ĉies okuloj. Sufiĉas vidi, kiom da viktimoj meze de aŭtomobiltrafiko, la malfeliĉon ene de familioj, la ege multekostajn elspezojn al la sanservo. Se menciis nur alkoholon, laŭ Ministerio de Sano, oni kalkulas, ke la kvanto da dependantoj estas inter 10% kaj 15% el la tutmonda loĝantaro.

Iniciatoj, kiuj celas homece prizorgi tiujn, kiuj falis en tiajn kaptilojn de pasikutimo, aŭ klopodas preventi tiujn malbonaĵojn, meritas plenan apogon kaj stimulon. Ankaŭ batali kontraŭ tio, kio malbonfaras al homoj estas aŭtentika karitato.

### **PLI SEVERA LEĜO KONTRAŬ DRINKADO**

Estas oportuna la nova Leĝo Kontraŭ Drinkado, kiun subskribis prezidento Dilma Rousseff, fine de la jaro 2012. Laŭ la fakuloj pri komunikado el la Nacia Departamento de Trafiko (Detran), ili estas pli severaj reguloj, cele al malpliigo de mortoj kaj trafikakcidentoj kaŭzataj de drinkado.

Je la 29-a de januaro 2013, per *Oficiala Ĵurnalo de la Respubliko [Brazilo]*, la Nacia Konsilantaro pri Trafiko (Contran) publikigis rezolucion 432/13, kiu starigas, laŭ informo de "Agentejo Brazilo", gvidlinioj por plenumado de pli severa Leĝo Kontraŭ Drinkado: "Se la spirtesto montros kvanton egalan aŭ pli altan ol 0,05 miligramo de alkoholo en ĉiu litro da aero, tiam oni punos la stiranton, kiu juĝrespondos pro gravega delikto, pagos monpunon de R\$ 1915,40, transdonos sian stirdokumenton por retenado, ricevos malpermeson stiri dum 12 monatoj, kaj krome oni arestos lian aŭtomobilon. Antaŭ tio, la limo estis 0,1 miligramo de alkoholo en ĉiu litro da aero."

Homaj vivoj dependas de respektado al tiu Leĝo. Kiom da sufero eblos ev






- **John Kennedy**

**BONIFÁCIO, KENNEDY, SHAW KAJ LA NEVIDEBLA MONDO**

John Fitzgerald Kennedy (1917-1963), en sia parolado antaŭ la Parlamento, je la 28-a de junio 1963, en Dublin, Irlando, diris, ke "George Bernard Shaw, parolante kiel irlandano, sugestis novan perspektivon al la vivo. 'Luj homoj', li diris, 'vidas aferojn kaj demandas: Kial? Sed mi revas pri aferoj, kiun neniam ekzistis — kaj mi demandas: Kial ne?'".


Kaj kiel posteulo de irlandaj enmigrintoj, JFK plu diris: "Tia estas la kvalito de la irlanda popolo: rimarkinda kombino de espero, konvinkiteco kaj imagemo — kiun oni devas havi, pli ol iam ajn. Mondajn problemojn ne povas solvi skeptikuloj aŭ cinikuloj, kies horizontoj limiĝas al evidentaj realaĵoj. Ni bezonas homojn, kiuj povas imagi tion, kio neniam ekzistis kaj demandi: 'kial ne?'".



- **George Bernard Shaw**

Nu, tiaj estas ankaŭ kvalitoj de nia bona brazila popolo, kiun prilumas espero, eĉ meze de plej malfavora cirkonstanco. En momento de kontentiĝo, ekkriis la inda José Bonifácio de Andrada e Silva (1763-1838), la Patriarko de Sendependiĝo: "Brazilanoj estas entuziasmuloj pri belaj idealoj, amikoj de sia libereco".

Post eldirado de ĉiuj tiuj aferoj, estas klare, por tiuj kiuj "havas videmajn okulojn kaj aŭskultemajn orelojn", ke lernado en ĉi tiu mondo estas ankoraŭ nekompleta. Hodiaŭa kompreno pri la Spirita Vivo similas la komprenon pri Leĝo de Universala Gravito, de Newton (1643-1727), kune kun la nuntempaj kontribuoj de Einstein (1879-1955). Nur kiel argumenton, ni povus diri, ke ne sufiĉas simple nei ĝin, ĉar nia nuntempa scienca kono ne plene atingis ĉiujn leĝojn, kiuj regas ĝin.



- José Bonifácio de Andrada e Silva  
Efektive, necesas insisti pri tiu instruo: socia reformado komenciĝas per Spirita Reformado. Tiun vidpunkton ni konstante pridiskutas kaj elvolvas okaze de klarigoj pri la Evangelio-Apokalipso de la Evangelio de Jesuo, laŭ Spirito kaj Vero, je la indiko de Lia Nova Ordon, "Vi amu unu la alian, kiel Mi amis vin".

---

\***José de Paiva Netto** estas verkisto, ĵurnalisto, radikronikisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV) kaj efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter). Li estas membro de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Ŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radikomunikantoj de Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ Akademion de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri konceptado kaj defendado de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *"lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko, Honesteco, Frata Amo"*.

## El la revuoj esperantistaj

### Opinio

Traleĝinte la numron 168 de La Gazeto, mi raviĝis, kiel ĉiam, pro la riĉeco de la ideoj spegultaj en ĝi. Ekde la unua paĝo, oni konatiĝas kun majstreca priskribo de la diferencoj, ofte drastaj, inter la enhavoj de la libroj-romanoj kaj la ties surekranigitaj filmoj. Eugen de Zilah, profundigis ĉiĝojn en la analizado de la filmo "For Kun La Vento", kiun mi persone bedaŭrinde ne spektis. Tamen mi samopinias al li ĉar mi trovas multajn pruvojn el la aliaj filmoj kies subjektoj estas ĉerpitaj el la romanoj. Fojfoje mi konstatas paralelojn kun la tiel nomata "Metodo de la Socialisma Realismo" sekvata kaj aplikata kiel regulo kaj devige ĉe ni dum la periodo 1944-1991. Laŭ tiu metodo, la aŭtoroj devis evidentigi ĉiam la "pozitivan heroon" kiu sin dediĉas al la bono de la patrio –kompartio-socialismo. Tiucele por li estas "fremdaj" ĉiuj sentimentoj burĝaj, egoismaj, individuaj, diversaj.

Sed hodiaŭ mi volas reagi precipe al la reportaĝo kun vojaĝimpresoj de amiko Sen Rodin en la skribo "Du tagoj en Hraŝĉina".

Temas pri unika verkista renkontiĝejo en Kroatio, ĉe bieno de s-ino Spomenka Štimec, konata kroata verkistino, kiun mi havis la plezuron vidi dum kelkaj minutoj en Zagreba stacidomo somere 1996. Ĉio estas interesa en la artikolo kie la aŭtoro sincere rakontas pri sia vivo pasinta kaj nuntempa, same pri la gastiganto kaj la gastoj.

Min atentigis nur la frazoj kie li priskribas la eksan Jugoslavion, la interrilatojn ene de ĝi kaj la kialojn de ĝia disfalo.

Kiel albano, mi estas interesita ne nur ĉar la eksa Jugoslavio estis najbarŝtato al Albanio, unue amika (1944-1948), poste malamika, kvankam je sama ideologio komunisma, kaj nun kelkaj ties partoj estas ankoraŭ najbarŝtatoj al ni. (Montenegro, Makdeonio). Krome en la eksa Jugoslavio loĝis en siaj propraj teritorioj almenaŭ 3 milionoj da etnaj albanoj (nome en Kosovo, Montenegro, Makedonio, Serbio) kiuj konsistigis la trian popolon laŭnombre en ĝi (post serboj kaj kroatoj) sed ne ĝuis propran respublikon.

Kiel sciite, la eksa Jugoslavio estis kreaĵo de Rusio kaj Francio cele al la stariĝo de ŝtato slava kontraŭgermana, do iel artefarita ŝtato, konsistanta el diversaj popoloj kaj etnoj (ne nur slavaj), sub la dominanteco de serboj.

Ekzistis en ĝi grandaj diferencoj kulturaj kaj ekonomiaj, religiaj kaj historiaj. Ekzemple la ekonomia nivelo de slovenoj estis double pli alta ol tiu de serboj kaj sesoble pli alta ol tiu de albanoj de Kosovo.

Josip Broz Tito kun sia klano slovena-kroata, klopodis ludi internacian rolon mondscale gvidante la tiel nomatan organizaĵon de la landoj de "Tria Mondo", ne engaĝitaj en la militistaj traktatoj de NATO-o kaj Varsovio, sed praktike kontribuante al ambaŭ ili, ricevante rekompence helpaĵojn kaj monon notindan de ili.

Ene de la lando, la eksa Komunista Ligo de Jugoslavio subpremis ĉiun moviĝon por libero, homrajto, etnorajto, far siaj civitanoj ne nur albanaj, tiel la politikaj prizonoj estis plenplenaj.

Kiel ajn, Tito sukcesis iel bremsi la naciismajn tendencojn, aparte deflanke de serboj kiuj kontrolis la armeon, kompilante konstitucion de la jaro 1974 kiu certigis pli da naciaj rajtoj kaj pli da respublikanaj kaj regionaj aŭtonomecoj.

Post lia morto, la ŝtatpotencon forkaptis la serba naciisma klano de Miloŝeviĉ kio kaŭzis fortan reagon de kroatoj, slovenoj, nelaste de albanoj. Rezulte, post la disfalo de komunismo en la Orienta Eŭropo, kreiĝis la kondiĉoj por plena sendependiĝo de la respublikoj, kion antaŭvidis ankaŭ la konstitucio. Sed tion ne volis toleri la serbaj naciistoj. Ĉi lastaj estis decidemaj eĉ militi sangume kion atestis la historio de la jaroj 1991-1999. Nur en Bosnio masakriĝis pli ol 200 000 homoj! En Kosovo dum la jaroj 1998-1999 mortiĝis pli ol dek mil. Pro tio, la internacia komunumo intervenis energie eĉ per bombardado de la militistaj bazoj de Miloŝeviĉo.

Laŭ amiko Sen Rodin, la kaŭzoj de la disfalo de la eksa Jugoslavio estis tute aliaj. Mi citas lin ĉar mi pensas ke multaj homoj samopinias al Rodin:

" Por ni ili estis "jugoslavo" (sudaj slavo) kaj punkto. Tute same kiel, se hodiaŭ usonano vizitas Italion, li ne interesiĝas ĉu la novaj italaj amikoj estas sicilianoj, aŭ napolanoj, aŭ torinanoj. Italoj ili estas, kaj tio sufiĉas al li"

Por amiko Rodin ne gravas la nacio, la lingvo, la religio, la historio...Kiel oni povus kompari la eksan Jugoslavion, tiun "prizonon de la popoloj" kiel estis antaŭe la eksa Sovetio, kun Italio, fondita kaj unuigita 150 jarojn antaŭe, danke al ĝia milito.

“Poste, en 1980, mortis la Esperanto- parolanto Josip Broz, alinome “Tito” (1892-1980). Kaj ĉio renversiĝis. Ardaĵ deziroj, dum jardekoj bremsataj, ricevis liberan vojon.

Unue Usono: ĝi arde deziris renversi la lastan komunistan eŭropan ŝtaton, por tie instali siajn militbazojn.”

Tio estas, laŭ mi, neprava. Usono subtenis la eksan Jugoslavion ekde la dua Mondmilito kaj aparte post 1948 jaro, kiam Tito disiĝis de Stalina politiko. Dekojn da miliardoj da usonaj dolaroj estis enverŝintaj en tiun “neengaĝitan superŝtaton”. Ankaŭ Sovetunio liveris grandajn kvantojn je armiloj diversaj. Usono intervenis kiam evidentiĝis ke la “Buĉisto de Balkanio- Mil;oŝeviĉ” endanĝerigis la pacon ne nur en la regiono kaj fariĝis nekontrolebla.

“Due la serbaj-kroataj generaloj: ili arde deziris fine ekpafi, post duonjarventa paco mortenuiga (por ili)”

Laŭ mi, la kroatoj rajtis vivi sendepende de serboj ĉiuaspekte. Ili havis longan historion de sia memstara ŝtato, kulturo, religio. Kroatio, same kiel Slovenio kaj Bosnio, longtempe havis intimajn rilatojn al la okcidenta mondo. Estis la serbaj generaloj tiuj kiuj pretis militi kaj pafi kontraŭ iliajn eksajn sancivitanojn..

“Trie Vatikano: ĝi arde deziris restarigi katolikan ŝtaton en la slava mondo”

Katolika ŝtato en la slava mondo estas ne nur Kroatio (mi menciis Pollandon), sed certe tion ne povus imponi Vatikano mem. Tia akuzo estas envere perversa, laŭ mi. Cetere Vatikano ankoraŭ ne rekonis la sendependecon de la Kosova ŝtato, ĉiam por ne kolerigi la serban eklezion...

“La sumo de tri deziroj estigis katastrofon”

Mi estas scivolema: ĉu tio estas la opinio de mem amiko Rodin aŭ tiel opinias la itala preso aŭ itala politiko? Aŭ la eksaj kaj nunaj serbaj amikoj de la aŭtoro?

**Bardhyl Selimi**

## **Beletraĵoj**

**Sali Bashota**



Kolekto de poezioj

### **La Ŝtono de la amo**

GURI I DASHURISË

Mi apenaŭ vin forgesis

Dum multe gravuris

Mia ŝtono

Nun kion mi aldiru la patrinon

Kiam la okuloj ne plu vidas

Mia ŝtono

Sur la montaro de Kosovo

Somerpinte la neĝo

Blanka ĉapo

Kiom multe mi estas gravurinta

Ne forgesinte

Mia morta ŝtono

(El la libro "Ŝirita albumo", 1986)

### **La ŝirita albumo**



## ALBUMI I GRISUR

Kiam vagas sencele, kio vin atendas

Traborita ŝtono aŭ lirika poeziaĵo

Longjare mi trafoliumas la ŝiritan albumon

Manĝante la ekzilan panon

Ĝiskiam el la okuloj sango aspergas

Ĉu oni skribos tutan historion

En la ne plenumita tempo

Aŭ la bebo forgesos la patrinan mamon

Denove estas tondrante

Ne hardita hakilo

En la sortaj arboj

Kaj longjare mi trafoliumas la ŝiritan albumon

Ĝiskiam vin trompos la bluaj okuloj

(El la "Ŝirita albumo", 1986)

**La mortigo de la inspiro**

VRASJA E FRYMĔZIMIT

Subite iun ĉasadtagon  
Mi estas malbeninta per ĉio  
La Kukolon de la malĝojo

Strange la vero vekigis kvazaŭ vampiro  
Por sangumigi la ruĝigintan sunon  
Super la blankhariĝintaj kapoj

Kial vi ŝatis la vivon, falsa pentraĵo  
La trotadon de la Trojaj ĉevaloj  
La sorton de la memmortiganta Jesenino  
Kaj la malfidelan virinon  
Kiu mordas la korojn de la plenkreskuloj

Kelkiu erigas la jarojn la jarcentojn  
En mia forlasita biblioteko  
Katina miaŭado  
Korvara grakado  
Lupara ululado

Subite iun promenadan tagon  
Mi estas mortiginte ankaŭ mian inspiron  
Ububu, kiel nun mi kresku

(El la libro “Ŝirita albumo”, 1986)

## La malbenita domo

SHTĚPIA E NĚMUR

Estas ie Malbenita Domo

Kun sep pordoj

Ĉiu pordo

Havas ĉesoje ŝtonon-dornon

Sangumitan dum jarcentoj

Neniu malfermas ĝin

Nek profunde endormigu

La timon alkroĉitan interne

Sur ties sep fenestroj

Vekriadas pnur unu kukolo

Nokton oni ne forgesendas

Nek la infanoj vidi tristajn songĝojn

Ne endas

Estas ie Malbenita Domo

Kun sep pordoj

Kiu ne atendas homan manon

(El la libro “La birdo je aŭtuna profilo”, 1989)

## **La birdo je aŭtuna profilo**

ZOGU ME PROFIL VJESHTE

Se oni mortigas tiun birdon

Je aŭtuna profilo

Kion mi aldiros la patrinon

Matene kiam vekigigas la infanoj

Tintas la murhorloĝo

Kaj la patro trinkas la doloron de miaj poeziaĵoj

Neniam ni aŭdas la paŝojn

Sur la renversita koro

Nek la lastan malbenon de la kanzono

Kiu ritme le epokon vekas enpace

La paŝojn premantaj la tagmezon

La ruĝiĝintaj stratoj paciencplene

Pro la entombigita silento en la ĉielo

Kaj pro ĉi tiu taga kampano ne ĉesanta

Se oni mortigas tiun birdon

Je aŭtuna profilo

Ĉu la patrino

Kovros mian animon per sunfloroj  
La sangon per iom da printempo  
Kaj noktomeze kiam mi vekigâs delire  
Ĉu la patrino

(El la libro ‘La birdo je aŭtuna profile”, 1989)

### **Enŝaltu la sorĉan lampon**

NDIZ LLAMBËN MAGJIKE

Enŝaltu la sorĉan lampon  
Sanktigita mano  
Vian langon estas suĉantaj la araneoj

Enŝaltu la sorĉan lampon  
Ke ni vidu la belajn okulojn  
Ĉi tie prudente ni ne povas morti

La sorĉan lampon enŝaltu  
Alie la paŝon ni mortigos  
Kiel dum kvincent jaroj

(El la libro “La birdo je aŭtuna profilo”, 1989)

### **La ekzilo de la spirito**



## EKZILI I SHPIRTIT

Kiel mi alnajligu Boa-n ĉar noktiĝis  
La spiritan ĉasaĵon surmeti enmane  
La korvo promenas sur la sekaj pupiloj  
Du mil jaroj la libero alfrapiĝas muron

La ekzila vundo la pulmojn nigriĝis  
En sankta tago kiam la versumado ploras  
La eltombigan solenaĵon forglutis la sonĝo  
Kiam sangumita litero la larmon sekigas

Mian tristecon trafas la mortotago  
Kiomfoje mankaptas ĝi arde brogas  
Forĵeti la ventron sed renversiĝas la mondo  
Liberiĝas la animoj restintaj vivaj

Kiel mi alnajligu Boa-n ĉar noktiĝis  
La spiritan ekzilon denove la aŭtuno flavigas  
Ĝis krias la poeto la preĝaŭguro finiĝas  
La turbano en la sino ĉu ruĝiĝas per kelkaj vicoj

(El la libro "Vundo", 1994)

## Vundo

PLAGOMĚ

(Al Mitrush Kuteli por la Kosova Poemo kaj Sanktadaŭmo)

(Mitrush Kutelit, për *Poemin Kosovar* dhe Shëndaumin)

Mi vidas la poeton kun bebaj kadavroj surbrake  
La Tero la Akvo la Animo gargaras la Pekaĵon  
Ĉu portebblas la senkapigitoj antaŭ la sunaj diskaj diris min  
Kiam la spiritaj molekuloj sufokigas la ties paŝon

La urbo dormas kun ĉapo el lagaj ondoj  
Kial la eklipso kovras la gratenitajn korpojn  
La bestieco enfermiĝas en la fabela mimetiko  
Se vokas la karavano en la terurigita tago

Mi vidas la poeton kun bebaj kadavroj surbrake  
Kosovo kaj viva Sankta Naumo enpremas la polusajn aŭrorojn  
La fetoraj juĝistoj langon eligas en ĉasado  
Vi freneza vundo neniam elfosu tombojn

(El la libro "Vundo", 1994)

## La Blinda Borheso

BORHESI I VERBUAR

Borheso raspas sian haŭton por ripari  
La hundoj albojas hundojn en poezio patriama  
La fantomo monstreca krio en la prononco  
Fermas la feran tagon en kaĝo de soleco

La poeto estas kaptilo kiun ne plu trafas la nokto  
Patria portreto sub nigra ĉielo  
La bela malĝojo ĉu ĉiam diletas sur glavoj  
Kiam la pafmortigitaj versoj brulas en libero

La blinda Borheso dormas sur mia spirito  
Ĉi tiu versaĵo estas frenezaĵo sorĉo puno  
Korva grakado vidas nur sangon  
Kun flora procesio entombigita en la sojlo

La kreeca angoro la inspiron vekis

Dormoĉambro denove songon trompas  
Tuta doloro elvolviĝas kiel la turbano en la sino  
La arta kolero punas miajn karulojn

La soleca Borheso nun la sangon kolektas en arbaro  
La eterneco enŝlosas la cerbon per vakso  
(El la libro "Vundo", 1994)

## La renaskiĝo de la poezio

### RINGJALLJA E POEZISË

Kiel vekigis la songoj

Kaptitaj per la vorta sorĉeco

Super via blua ĉielo

Kiel vekigis la songoj maltrans la libereca sojlo

Kie same

Dum la longa tago de aŭroro ĝis krepusko

En la lasta nokto de la barbareco

La malreviĝoj de la funebro

Tiel renaskiĝis la poezio la arto en teroro

Estiĝis rŭgiĝinta pulvoro de la doloro en la mondo

Diina menso lumiganta tutan spiritecon

Sed apenaŭ oni deŝiris la fadenojn la faltojn la versojn

Nek sur (l) lirio<sup>18</sup>

Jam ekde miljaroj

La piramido K pligrandiĝis je sango ostoj kaj haŭto

La respubliko ne faltiĝas kiel la malsekiĝintaj spektantoj

lamtempe

Inter la feraj pordoj eniris la patroamo

Illyricum immortale nek la Albana Nokto

---

<sup>18</sup> Ilirio- lando de iliroj, liria= libereco, l lire = libera

Pratempa ŝtono de la neskribita pacienco

Vekiĝanta kun la venkoimaĝo

Survizaĝe

(Ĉerpita el la libro "Vundo", 1994)

**Tiam la poeto diris**

ATĔHERĔ POETI THA

Mi lasas ĉi testamenton per la lasta vivospiro

Sur la Libro pri la Perdinginta Generacio kiu ne sukcesis verkiĝi

Manĝas la birdoj siajn okulojn, samkiel la rampuloj la Nigran Patrion

Tiam la poeto diris:

Ĉiuj pekaĵoj pezas sur la racio de la homa spirito

En la akvo de eterneco estas alfiksita la tranĉilo de la malbeno

La ĉambro transformiĝas en mallumaj serpentoj kaj maĉas la lumon

Tiam la poeto diris:

Ĉu kovras la teron la larmiĝinta okulo aŭ mortas renverese la fiereco de la vortoj

Ĉi tiu nigra novaĵo nun tondras tie kie la spirito diletas

Plorado de la beboj apenaŭ scias kio estas la homara historio

Tiam la poeto diris:

Revenas el Eterneco la amikoj de la renaskita verso  
En la Kunveno de Poezio por eltrinki la albanan doloron  
Tamen la vojaĝo tra la ĉiela firmamento longas kaj longas dum jarcentoj

Tiam la poeto diris:

Kaj estiĝis la spirita spiro lampon enŝaltitan en la ilirika<sup>19</sup> memoro  
Jen Arbërio<sup>20</sup> ankoraŭ elfiltrigas siajn korpajn partojn jen kiel bruliĝas nia sorto  
Denove la sama vundo kaŝas la disigitan sangon

Tiam la poeto diris:

Dio mia ne mortu la soleco en la ĉambro de la kreado  
Nek la fantomoj blukoloraj promenu sur la libroj de la timo  
La skribarto estiĝas pli aminda figuro de la ne alvenanta ofero

Tiam la poeto diris:

Kion faru kun la lingvoforgeso la florojn envane mi sekigas surfenestre  
La blankiĝintan harfadenon kiun la junulinoj deŝiras  
Kie estas la viva kadavro la osto la tordita karno  
Ensonĝe ni manĝas unu la alian dumtage kvitas kun la pekaĵoj

Tiam la poeto diris:

Mi vidis birdon kiu pepis sur la mia bela skeleto  
Nenion vorton kial tiun miraklon mi ne ĉiam kredis  
La savpeton kiu signos kiu la mortovenkon

---

<sup>19</sup> Iliriko- province ilira enkadre de Romia imperio

<sup>20</sup> Arbërio- tiel nomis sin la albanoj dum Mezepoko



Tiam la poeto diris:

Mi lasas ĉi testamenton kun la spiro de la vivofino

Kaj volas viva nur la cindron de mia vorto

(Ĉerpita de la libro “Eliro disde la tristeco”, 1999)

## **La vivo sen morto**

JETA PA VDEKJE

La poeto invitas la muzon en la inicpunkto

Kio estas ĉiuj ĉi tiuj serpentoj grimantaj al la muro

La soleco ridkrevas en la malkovrita sekreto

La fenestroj fermiĝas la ĉambro turniĝas en fantomon

La virgeca sango promenas tra la orfeca lito

La katoj moviĝas sur la malsanaj sonĝoj

Estas nokte

La bestioj povas sangumigi la kreadan fonon

Kara mia vi estas sola

Ene la vorto bolas kaj empremiĝas

En la cerbo gargarita disde la pekaĵoj

Ekstere la hundoj bojas mordas la homan solecon

Kara mia vi surmetas la florojn min en la tablon invitas

En la unua ludo baptita la Provo de la Libero

Ĉio komenciĝas ekde nokta inico inter la mortovivo

La Edena Ĝardeno La virino La serpento

La mordita pomo estiĝas Unu

Dio mia auŝkultu vian bonan vekrion  
Kiam mi eldormiĝis oh kiam mi vidis Lumon  
En la libro de la terneco oni skizis mian portreton  
Kaj la vivon sen morto inter la ĉielo kaj la tero.

(Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”, 1999)

### **Ĉu mortas la poeto**

A VDES POETI

Se mortas la poeto  
En la Sankta Monto  
Kurtigante la hararon al la Feino

La morto havus alian sencon

Se mortas la poeto  
En la ĉelo de la patria prizono  
Tranĉante la ferkradojn

La morto havus alian sencon

Se mortas la poeto  
Kun la Prometea fajro enmane  
Komence de la doloro

La morto havus alian sencon

Se mortas la poeto

En la la ĉambro de la kreado de la soleco

Kuracante la vunditajn birdojn

La morto havus alian sencon

Ĉar ne mortas la poeto

(1997)

(Ĉerpita el la libro "Eliro de la tristeco", 1999)

### **La dormema belulino**

BUKUROSHJA E FJETUR

Nun dormu

Sur la mola lito el birdaj plumoj

La vizaĝon kovru per la nepriskribebla eburo

La vangoj ruĝiĝas kiam elglitas matura rideto

La hararon etendu sur la kuseno plene de sortaj songoj

La lipoj oh lipoj facile fermiĝas per unu kiso

La mamoj ardbrulas dum la unua akto de ĉirkaŭpreno

(Sed la noktomezo mortigas la dormon kaj ĉiun stelon en la ĉielo)

Nun dormu

En la ĝardeno de la soleco deŝiriĝas la violfloro  
Naskiĝas la amo venas la vivaj homoj  
Kun la melankolio de la freneza atendo  
Ĉi tiu tago la malbonan aŭguron ne toleras  
Denove la voĉo ĝemas en la nigra pluvo de la malĝojo  
La arbofolioj falas kiel velkitaj memoraĵoj  
En la florigardeno kie vi naskiĝis  
En la lasta priploranta aŭtuno  
Susuras la emocioj kaj la tago estingiĝas atendente  
Kiu manĝos la pomojn sur la griza tablo de la malamo  
La nigra kesto putriĝis kie do restis la cidonio de la deziro  
La araneoj teksas la longan tolon de la trompeco  
Ankoraŭ ne sonorinta la nekonata kampano de la nacia funebro  
Tra la okupita spaco de la penso  
(Sed la noktomezo mortigas la dormon kaj ĉiun stelon en la ĉielo)

Nun dormu

Mia solvita spirito

(Ĉerpita el la libro "Eliro de la tristeco", 1999)

### **La dimensio de la reduktiĝo de la patrio**

PËRMASA E ZVOGËLIMIT TË ATDHEUT

Kio estas ĉi tiu abelujo kun elŝiritaj okuloj

Kiam reduktigis min je kvarono

De la mia iama natura granda

Kiel eksplikas Faik Konica mem  
Ĉu tion scias Gjin Bua Shpata  
Kiel oni ligas la umbilikon al Arbërio  
Epirus signifas stereo, seka tero  
Ne populaciita de iliroj  
Kiam la kadavroj ĉiuj estas jam putriĝintaj  
En la mortintejo lavita per nigra koloro  
Nur la lingva sango ankoraŭ elfiltriĝas  
Sur tiu rustiĝinta testamento  
Kiam reduktigis min je kvarono  
De la mia natura grando  
(  
Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”, 1999)

## **La melankolio**

### MELANKOLIA

Mia leganto  
Maturigas la malĝojaj pomoj en la ĝardeno  
La Edeno tiu la sama pratempa galoplana  
Kiu manĝos la nematuritan pomon  
La Nigra Suno ellasas la radiojn de la paradizoinfero por varmigi  
Tutbrile la transtempaj estaĵoj kun la animo en la gorgo  
Kelkiu frotas la vizaĝon per rustiĝinta tranĉilo  
La domo akiras la formon de Iliono pratempaj diletas la korpoj

La korto pleniĝas per enverŝita sangomaro la infanoj revenas  
Kun la pendita surmure nigra turbano kun la nigra sonĝo  
Kun la nigra serpento subkusene enfermita en ĉambro  
Kun la nigra kesto surŝultre kie ŝiriĝas la manuskriptoj  
Plene de sangumitaj paperoj mia viva leganto ronddancantaj  
En vitraj boteloj animas la kanzono la nia osto pergamenoj  
Estas birdo en la kaĝo nur por unu preĝo pri nia tero  
Maturiĝas la malĝojaj pomoj en la ĝardeno  
La naturo turnas la sezonojn laŭ sia ritmo  
(Ĉerpita de la libro “Eliro de la tristeco”. 1999)

### **La versaĵo kiu estis mortanta**

VJERSHA QË PO JEPTË SHPIRT

Albulena diris: ne ŝiru

Estas poeziaĵo pri la unua sopiro

La angoro kaptos ankaŭ la patrinon

Besiana diris: ne bruligu

La doloroj de la animo ne havas finon

Kelkiu poste priploros tion larme

Doruntina diris: ne vundu

Estas pekaĵo mortigi la verson

Ĵus ĝi krie naskiĝas



Etleva diris: ne sangumigu

Sonoros ĉiuj kampanoj de la tristeco

Savorto ne plu estos

Rozafa diris: ne entombigu

La versaĵon kiu volis iom da patrio

Por sia spirito

(Ĉerpita el la libro ‘Eliro de la tristeco’, 1999)

### **La alia formo de la doloro**

FORMA TJETËR E DHEMBJES

Mia muzo

Mi ne mortos ĉi tie

En la malĝoja mateno

Kovru mian vizaĝon per Kosova doloro

Per sango de la mortigitaj infanoj per la tomba ĉemizo

La herbaj folioj faldiĝas sur la vundo

Kiam ĝermas la floro de la malbeno

Mia muzo

(Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”, 1999)

### **La lasta preĝo**

## LUTJA E FUNDIT

Mi estas liginta la spiriton  
Per nigra rubando  
Por ke ĝi ne estu kolerigita  
Kun la morto

(Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”)

### **Prishtina la nokton de la 31-a de marto 1999**

PRISHTINA NATËN E 31 MARSIT 1999

Lasta nokto de la doloro  
Kiu alfiksos surkape la tomboŝtonon  
Sesio de la naŭza dormoforgeso  
Ĉu sekiĝas ĉe la poetoj la vizaĝo ĉu rustiĝas la vortoj  
Dispecigante la versojn ligitaj de la malbeno  
Korvoj korvoj korvoj flugas super Kosovo  
La kovrita per sango asfalto la inferaj spuroj brilas  
La vundita futuro kvazaŭ tranĉilo briletas  
Prishtina enfermiĝas en prizono kiel sni avi la kapon  
Ĉu vivas vi miaj amikoj alvenas la morta trajno  
La sango fluas vermoj kaj pedikoj nin formanĝos  
Kie ni entombigos la blankajn harojn  
La fingrougojn la priploron de la infanoj  
La lastajn susurojn ĉar krevis nia koro

Malbenitaj rifuĝintoj kiu portas surdorse la ŝarĝon de la libero

Atendante la ĉerkon sen albana skribo

Malsekiĝintaj pro la marta sangumita pluvo

(Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”, 1999)

### **Nenies tero**

TOKË E ASKUJT

En la nigra koto de Bllaca

Mian karnon mi brulvarmigis mangôs

Kiel ŝtoniĝintan panon de la puno

En la nenies tero mi fariĝas terura besto

Maĉante la liberon kiel frenezan kadavron

(Ĉerpita el la libro “Eliro de la tristeco”, 1999)

### **Ankaŭ nun oni bruligas la librojn**

DHE TANI DIGJEN LIBRAT

(Skizo por poemo)

Ankaŭ nun oni bruligas la librojn

La patrino priploras la finon de mia spirito

En la paradizo kie dormas la tristeco

Eniras la barbaroj trenante la patrion  
Adiaŭ mortpafitaj versoj  
Bruligitaj literoj sangumitaj manuskriptoj  
Fotoj de la perdita infaneco  
La infero pli belas  
Ol la vivo  
Adiaŭ tristeco  
Ankaŭ nun oni bruligas la librojn

(ĉerpita el la libro "Eliro de tristeco")

## **Bela testamento**

### TESTAMENT I BUKUR

Kiam vi enŝaltas la memorojn  
Veku la solecon  
Mia animo estas Vi

Kiam vi vundas la vivon  
Sufokigu la silenton  
Mia tombo estas Vi

Kiam vi mortigas la revon  
Kuracu la timon

Mia renaskiĝo estas Vi

(ĉerpita el la libro “Malbenita beleco”, 2006)

### **Balado pri la bruligita manuskripto**

BALADĖ PĚR DORĚSHKRIMIN E DJEGUR

La barbaroj ne plu venos

Trenante la patrion

Krias la bruligita manuskripto

En la sepa tago de la renaskiĝo

Ĉe la Placo de la Respubliko de la Leteroj

Nur la lingva sango ankoraŭ elfiltrigis

Sur la rustiĝinta testamento de la vorto

Kiel roza ĉemizo malsekiĝis la perdita spirito

Poste venas la sezono de la mortigita rideto

Tra la subteraj revoj

Per la fajro de la perfekta tristeco

La Tero La Akvo La Animo gargaras la ties pekaĵon

Maĉante La Nigran Guton de la puno

La morto ululas kun la doloro en la ĉerko

Ĝiskiam la blanka cindro de la versoj estiĝas malbenita libero

La barbaroj ne plu venos

La patrion trenante

Estas ie tiu maljuniĝinta soleco

Kiu bruligas la kandelojn super la malĝojaj junulinoj  
Sin mezurantaj kun la unua matena ombro  
La vortojn kovras la fatalo brila diademo  
En la transtomba mondo antaŭ la malestimo de la revoj  
Mi estas la infero diris la malbenita poeto  
Ununura kokolo poste kukuas  
Kiam oni vokas la nomojn Tagon de la Juĝo  
Kovrite per la blanka tolo de la malnova kuraĝo  
Ĝiskiam la Teruroj sanglavas la manuskriptojn  
Iun melankolian tagon kiam okazas la disigo disde la spirito  
Por demandi la plej belan morton  
La barbaroj ne plu venos  
La patrion trenante

(Ĉerpita el la libro “Malbenita beleco”, 2006)



**Adem Demaçi**



## **La sangovenĝaj serpentoj**

**Romano**

**Ligo de la verkistoj de Kosovo**

**Prishtina**

**2012**

**La unua eldono**

**Jeta e re**

**Prishtina 1958**

*Ne- al tiuj kuraĝuloj*

*kiuj krimelpafas,*

*sed- al tiuj bravuloj*

*kiuj etendas la manon de la repaciĝo..*

**La aŭtoro**

## I

Juliofrue. La suno enverŝas la varmon harbruligante ĉion sub si. La grundstrio ĉerande de la Seka Torento, en Koliq, turniĝis en preskaŭ senhaŭtigaĉita teraĉo disde la herbo, aspektas ĝi kvazaŭ la haŭto de skabieca bovino. Sur la terbordo trans la Seka Torento, kies ezofaga livlado apenaŭ aŭdiĝas, dum la rarigitaj herbofadenoj estas perdintaj la verdan aspekton; tiuj obskurumitaj, flaviĝintaj, estas alfiksitaj al la tero nur por gutto da akvo, kiu, ankaŭ mem malriĉa, nur elmontras siajn lipojn gratenitajn kaj fendetitajn. Ĉi tiuj fadenoj, luliĝantaj tien - ĉi tien sub la inerta venteto de antaŭtagmezo, similas al kelkaj malfortikaj kreitaĵoj, kiuj, anime peziĝintaj, staras gratigitaj surtere kaj kun la rigardo direktita al la firmament, kvazaŭ diras: "Akvo, ĉielo mia! Akvo, guton da akvo, ĉar eĉ la lastaj fortoj estas ellasantaj nin!". Iom pli fore, sur la tero kie la plugila dento neniam sukcesis alfiksiĝi pli ol manplaton, la malalta maizherbo aperas kun la polvorizitaj folioj. Ĉi tiuj folioj, kiuj pli similas al kelkaj malfortikaj manoj de malsaniĝinta bebo, moviĝas je direkto de la suno dirante: "Suno, patro nia! Nur unu pluvo estas bezonata por ke ni satiĝu je akvo, nur unu kaj poste via okulo fariĝu broganta, eĉ ruĝa karbardaĵo!". Kaj ankoraŭ iom pli alte, la arbofolioj de la arbareto preskaŭ tute ne moviĝas. Ankaŭ ili, per mallertaj sibiloj, preĝas al la ĉielo, sed ĉi tiu, kvazaŭ senlima rokego, blua, brila, staras senvorte kaj forte miras kiel ĉio surtere atendas ke ĉi tiu kompatu, preĝas ke ĉi tiu lamentu, por ke poste la tero ĝojiĝu kaj laviĝu per la ties ĉagrenaj larmoj.

Dum la suno bakas kaj bruligas ĉion kuraĝanta kaplevi, maltrans la Seka Torento aŭdiĝas la kampanetoj de la sovaĝaj ĉamoj, sopirantaj por la deklivo de ĉi tiu arbustara monteto, kiuj elmanĝas delikatece foliojn kaj dornaĵojn. Ĉerande de la arbustara monteto, ĉe borde de malvarmakva fonto, levas la malaltaĉan korpon, etendas siajn longajn branĉetojn foliodensajn, formante dikan ombron sub si, unu maljuna blanka kverko. Sub la dika ombro de la blanka kverko, ĉe la flanko de la Seka Torento, kuŝas kelka ŝafaro, dum ĉe la flanko de la grundrimeno, ĉirkaŭ la akvofonto, sur la malgranda ebenaĵo pavimita per herbo iel mola, klinitaj ĉiu sur sia laboro, restas kelkaj knabinoj, junaj paŝtistinoj de la vilaĝo. Fronte de la arbustara monteto, kun malvasta strio de grundo intere, etendas la spinon la densa avelujo, ekde kiu egale al la bordeto de la Seka Torento, iras kaj ĉe la unua kubutumo perdas la spurojn iu malvasta piediranta vojstrio, duoniganta la grundstrion, detranĉanta la Sekan Torenton kaj, preterpasinte la maizkampon, soras al tiuj obskurigitaj montopintoj, ĉiuj en rarigitaj vaporoj.

Transe, el la aveluja dorso, direktita per kelkaj fingroj moviĝantaj mallerte, aŭdiĝas sonoranta fluta voĉo. Kiam la voĉo tro proksimiĝas al la gorĝo, kie komenciĝas la grundstrio, la fluto ĉesas kaj elpafas la elfiltrita kanzono:

*Bonulino kun hararo ĝisbrake,*

*Por mi, kisi vin ŝajnas peke!..*

La knabinoj ĉe la akvofonto interrigardas sin kaj, sur iliaj lipoj nur gaja radio videblas.

La kanzono interrompiĝas kaj ree ekas la fluto. Kiam, ĉe la gorĝo de la grundstrio aperas Ymer, ruĝvanga junulo, grandokula kaj nazorompita, la fluto denove haltas kaj bruegas la alia kanzono, laŭ la ties melodio:

*Venu defie*

*Al la knabinoj,*

*Al la knabinoj, mia panjo, panjo*

*Al la knabinoj!..*

Ĉe la knabinoj, kiel senzorgaj knabinoj, krevis la gajeco. Ĉe Gjyle, vangoj kvazaŭ granato, pliruĝiĝis, dum al Feride, plej intima amikino de Shega, ekfulmis la raraj sed blankaj dentoj kaj ŝiaj grandaj okuloj, kvazaŭ tiuj de sturnulino, dum momenteto ili eligis kelkajn neeksplikeblajn fajrerojn, kiel tiujn de la silica ŝtono. Post tio, la sindediĉitaj amikinoj interkrucigis la trembrilajn rigardojn kaj malbride ekridegis. Natura ridego, gravurita, kiel tiu de la livlado de la akvofonto en la printempo. Sed la rido de la akronaza kaj kurtkola Kade, iel freneza, elĉerpita, plenkreskita kaj fajfanta, kovris ĉiujn..

Kiam Ymer, per malfermaj piedoj, atingis la maldikan vojstrieton duoniginta la grundstrion disde la avelujo, kvazaŭ elgutinta el la ĉielo, aperis Ajet, la frato de Gjyle, junulo ĉirkaŭ deksejara, vestite per linaĵo, ruĝhara, je konduto iel prudenta kaj orgojla. Tuj post li, videblis Shahin, junulo je tro granda kapo kaj vestite per ŝnuraĵo, kaj post ili, Malush, Beha kaj Zeka, - la amikoj de Ajet.

Kiam la ruĝvanga junulo dorsoturnis al la knabinoj kaj ekkantis alian kanzonon, kies melodion pli bone konis, Ajet, kun birdstango enmane, alkriis:

- Vidu la mungulon kiun elmanĝis la Diablo, ne scias li ion alian krom flusaliviĝi per tiu fluto!...Haltu ĉar ci tute detruis niajn orelojn!..

Ymer, kun ĉiam ŝvelitaj vangoj, movis sian rondforman kapon kvazaŭ li volis diri:

“Iel ajn, se mi vidos, mi sciigos!”- kaj haltis kun la vizaĝo direktita al la mornaj pintoj.

Shahin rigardis al la arigitaj knabinoj kaj kriis ridete:

- Eu, mia grenventumaĵo granda!

Kaj Zeka, kvazaŭ malice:

- Bone, bone, ludu per tiu fluto, sed kial do defie al la knabinoj?!..

Ajet koleriĝis.

- Ne ŝercu, Zek’- trurnis li sin al la knabaĉo kaj poste, eligante flusalivaĵon el la buŝo, alparolis Ymer, kiu kvankam nun ŝanĝis malfacile la fingrojn, ne ĉesis ludi per flaŭto.
- Filo de kverelemulino! Kial ci ne ĉesas, alie pereos ci kun la fluto?!..

La ruĝvanga junulo, legis, en la aldirektitaj okuloj, ke temis ne pri ŝercaĵo.

- Kial do, vi koleriĝas ke mi kantas je la okuloj de la knabinoj, ĉu ĉar inter ili estas ankaŭ cia fratino, ĉu?
- Ĉxesu, mi diras vin, ciganido!...  
Donu min tiun aĵon!  
Kaj li orkaptis la fluton rabiece kaj plejforte forĵetis ĝin al la avelujo.  
Ymer ekgapis tien, kien la fluto kunfrapiĝis tra la branĉetoj kaj, per voĉo espriminta ankaŭ malesperon kaj samtempe koleran kuraĝon, movante la manon kvazaŭ li ludis per ĉiftelio<sup>21</sup>, turnis sin al Ajet:
- Cimilimilime!..Sed ci, forĵetinte la flaŭton, la buŝon kaj la manojn apenaŭ povas forĵeti, dume oni faros por mi alian fluton!

---

<sup>21</sup> Dudrata albana muzikilo

- Eu, kial provokas min ke mi bastonegu cin, oh pekaĵo!- diris la ruĝharulo, freneziĝinte kaj sin ĵetis al la ruĝvangulo por kapti lin per la gorgo.

Sed Beha, kiu ĝis tiu momento staris malvarmsange, eniris inter ili.

- Idiotoj, ĉu vi envere volas interbatiĝi?!

Eniris intere ankaŭ Zeka kaj Shahin.

- Ci ja estas freneziĝinta, kial oni povas interbatiĝi pro tio?!..riproĉis Zeka al Ajet.
- Gardu vin, Zek'! Lasu min, Shahin! Lasu min!- klopodas liberigi sin kaj krias kolerigite Ajet.

Sed ili tenas lin, Ymer kuraĝiĝas. Ĉirkaŭiras, vidas kaj kaptas la birdstangon, kiun ellasis iom pli frue Ajet, retiriĝas kelkajn paŝojn malantaŭen, kaj lipokrispante kaj svingante la dikan birdstangon, kriegas minace:

- Ellasu lin, ellasu, kaj ni vidu se li kuraĝos ekbati min!..Mi frapos lin per birdstango tiom forte ke li neniam plu intencus ĉesigi la kanzonon al iu ajn!..
- Al kiu, do!..Ĉu ci, ĉu? Uh!..Ellasu min! Ellasu min, je Dio!- kriis Ajet kaj eksaltis tuj soren, ellasante ŝaŭmon el la buŝo. Zeka krispis la siajn lupajn okulojn, rigardis unufofoje al Ajet kiu baraktis per la tuta forto, poste proksimiĝis al Ymer, kaptis ties ĉemizon kaj, premante la dentojn, minacis malestime:
- Silentu, do, ankaŭ ci, sufiĉe bojis! Ne estas ci kapabla timigi eĉ la katinon disde la pankaco, aliflanke ŝajnis la bravulon!..
- Ne, ne,- krias la ruĝharulo- ellasu vi min kaj mi elmontros al li kiel li ludu sur la fremda dorso!..

La ruĝvanga junulo kvietiĝas. Dum la ruĝharulo ankoraŭ bolas..

Beha, bruna kaj rompbarba junulo, akriĝis la parolojn:

- Neniel eblas, je Dio, ke vi interbatiĝu hodiaŭ ĉi tie! Restu kvietaj, ĉar dum Beha estas ĉi tie, li neniel lasos vin tion fari!

Ĉi tiuj vortoj elĉerpigis la paciencon de Ajet. Dum Shahin kaj Malush liberigis Ajet-on. Ĉi tiu nur acidelsputis surteren kaj staris surloke.

Finfine, la knaboj kvietiĝis. La suno enverŝis fajron...

La junuloj, envicigitaj, unu apud la alia, komencis denove la ludon pitpidak...<sup>22</sup>

- Ymer, stariĝu malrapide ĉar ĉi tiu cia lignero restis ĉe via nazo!- diras Ajet kaj ekridetas.

Kondukita per la mokridoj de la ceteruloj, Ymer stariĝas, kolektas la bastonetojn kaj la birdstangon de Ajet kaj ĵetas ilin antaŭ la piedoj, dum la sian stangon, je tuta ties longeco, surmetas laŭlarĝe antaŭ ili.

- Oh, atentu, Ymer "Katravella", alie restos eĉ sen viaj oreloj ĉi tie!- aldonas Ajet akre. Ĉiuj frapas per bastonetoj kaj stangoj surteren.- Ymer "Popovci", diras,- la stango de Shahin frotas tiun de Ymer- viro larĝa, brava kiel feino, pankaco por manĝi!..
- Valora kiel abelo- returnas ankaŭ Beha- kun kokinoj eĉ li estus dorminta!

---

<sup>22</sup> Ludo kun bastonetoj

La ruĝvanga knabo, stare, kun manoj ligitaj malantaŭe, rigardas atenteme la bastonetojn kaj la stangojn frotantaj laŭvice sian stangon kaj elglitiĝas ĉiu pli fore ol la alia kaj turnas sin minace al tiuj sidantaj:

- Ne gravas, do, fraĉjo, ankaŭ mi havos iam la okazon por venĝi kontraŭ vin!
- Ne, ne- returnas Ajet eksvingante la blankan stangon- nun faru “cimilimilime”...
- Ne, ja, Ymer- aldonas ankaŭ Zeka, krispante la lipojn kaj la frunton- ĉar trafis cin ĉi tiu malbono, pli dece estus ke ci surdorsiĝu la lupon kaj allogi la bovojn!...

Ĉiu ekridegis.

- Ohre, ohre...- saltas la bastono sur la bastono - la ĉemizon ŝnure!..
- Linajn tolojn,- la alia stango nur iomete tuŝas la ekstremon de la bastono de Ymer- la musan voston!
- O, je Dio, ne frapis ĝin!- envane ekkrias la grandkapulo.
- La lanan kapuĉon,- la stango ŝovas de la loko la etenditan bastonon – malfermu, knabo la orelojn!
- Malfermu knabo la okulojn- la bastonoj kunfrotiĝas- kaj ne demandu ke mi mortigu cin..

La bastono de la ruĝvanga knabo estas foriĝinta ĉirkaŭ dek paŝoj disde la knaboj envicigitaj ĉeflanke de la Seka Torento.

La ĉielo briletas pro la varmego.

Neatendite, eble ĝuste ĉar ĝi estis alĵetita per troa matureco, la blanka stango de Ajet misorientiĝis kaj sin direktis al la torento.

- Oh!- ellasis Ajet pinĉece, sed vidinte junulon kun duonsako ŝargite surdorse, kiu ankoraŭ kelkajn paŝojn enirus en la torenton por eliri maltransen, iel konsoliĝis.
- Ymer ne hezitis eldiri per gajvoĉo:
- Fraĉjo, Ajet, elsputu al la piedoj nun!
- Ne, je Dio, elsputas li al Ymer!
- Hundon fariĝu mi, se ne vole, tamen perforte faros!...
- Ĉu nun, do, ĉu?
- Nun, do.

Ajet dentopremis.

- Ne gravas, ekscios homoj kiu ja estas Ajet Goxhufi- laŭtdiris poste, preskaŭ ordoneme kaj sin turnis al la ŝarĝita knabo, kiu ĵus proksimiĝis ĉe la rando de la torento:
- O ci, amiko, bonvoli alporti tiun stangon, mi petas!

Ankaŭ la aliaj frapis per siaj bastonoj, sed neniu trafis tiun de Ymer.

La ruĝvanga knabo eksaltis soren kaj kriis:

- Nun, Ajet Goxhufi, elsputis ci la piedojn pro la bezono!...

La ŝarĝita knabo eliris el la torento sen stangon..La ruĝharulo tuj rekapabliĝis kaj, kvazaŭ harbruligita, eksaltis surpiede. Ŝoviĝis kelkajn paŝojn haste kaj iris antaŭ la ŝarĝita knabo, kiu, ne, kaptumante ien ajn, daŭrigis tien al la avelujo.

- Kial do, amiko, ne alportis min la stangon, kion mi petis?!
- Kial do, amiko, mi alportu ĝin al vi, ĉu mi estas via dungito, ĉu?- rediris la knabo kaj haltis.



- Jes, jes, tre ci orgojlas, mi frapu la nazon vian per pugno!..

Ĉiuj knaboj ariĝas ĉirkaŭ la knabo, ŝarĝita per duonsako surdorse.

“Povra mi, trafis min kverelaĉo, povra mi” pensis la knabo mallevante surteren la flikitan sakon kaj rigardante malespere ĉirkaŭ si. La rigardo haltas ĉe la disigitaj kaj ruĝiĝintaj okuloj de Ajet, kiu, per manoj ligitaj malantaŭe, rigardas lin kolere. La knabo, nun ĉirkaŭita de la ceteruloj, eksidas sur la ŝarĝo kaj sin turnas al la ruĝharulo per svenita voĉo, pro la timo:

- Bone, filĉjo, kial vi gapas min tiel?
- Mi gapas, ĉu?..Mi volus pugnobati kaj deŝiri vian kapon!

“Povra mi, verŝajne oni volas bastonegi min hodiaŭ”, pensis la junulo englutante. El la sekigita buŝo spontane eskapis la vortoj:

- Vidu, je Dio, mi povas diri: ne tuŝu la vespon per lignero, alie ektuŝos vian malfeliĉon!...

Ĉiu ekridegis senbride.

- Vidu, vidu, kia orgojlulo!
- Ĉi tiu, je vorto estas bravulo, sed fakte estas nur malfortulo!
- Vidu ci la forgesitulon!
- Oh ĉi tiu soren pretendas do, diabla ido!
- Lyna!
- Nuklano!
- Ckonlano!
- Panravelo!<sup>23</sup>
- Ĉi tiu estas ia “Raciviri”...
- Ĉifonulo!

“Oh, povra mia, kiom humile oni traktas min”, pensis la etokula kaj dorsnaza junulo kaj, el lia granda buŝo, elfluis la kortremantaj vortoj:

- Ne faru tion, fraĉjo, ne humiligu min, alie, se la sango atingos mian okuloj...
- Kion ci farus, kion, kiam la sango atingos cian okulon?- demandis Ajet kolere kaj sin ĵetis al la junulo, kies genuoj tremis pro la timo, sed la forta krio de Ymer haltigis ĉiujn, kvazaŭ enŝtonigintus ilin:
- Haltu, do, mi volas diri ion!

Ĉiuj sin turnis al la ruĝvanga knabo. Ajet aldiris malestime:

- Kion do ci volas, kion?!

Ĉe la knabo kun sako, la sango iel revenis en sia seka kaj harbruligita vizaĝo pro la suno.

Ymer estiĝis la reganto de la situacio:

- Li timas de ni pli ol de ci...Vidu kiel vi estas sieĝinta lin: li ne scipovas kien sin turni unue. Kaj ci, se havas ion kun li, eliru sur la batalplaco kiel viro!
- Kion, kiel viroj?!
- Jes, ja, kiel Gjergj Elez Alia<sup>24</sup> kun tiuj batalantoj el Istanbulo...

---

<sup>23</sup> Lokaj mokaj idiomaĵoj

Ĉiuj ekridis. Kelkiu krias:

- Sed ĉi tiuj ne havas ĉevalojn, nek armilojn!...
- Oni ne bezonas ĉevalojn, ankaŭ sen ili la afero funkcias, kaj, anstataŭ la armilojn, ni donos al ili po unu stango!...
- Kaj poste...
- Poste, kiu estas pli forta, li mildigu la partneron!
- Lasu tion, fraĉjo, ĉar riskos damaĝi la kapojn kaj okazos malfeliĉo...
- Bone, oni povas fari aliel- intervenis Ymer haste, manfrotante: - ili interkaptiĝu unu kun la alia...Kiel Muja<sup>25</sup> kun...
- Lasu min, fraĉjo kaj mi iru mian vojon...- parolis la fremda knabo- mi do ne estas el tiuj kiuj solvas la aferojn en la batalplaco...
- Kion vi diras, kamaradoj, ĉu per stangoj aŭ sen stangoj?
- Malrapide, unue ni demandu ĉi tiun amikon- eksaltis Shahin- kion vi opinias, do, filĉjo?
- Mi diras ke vi lasu min pluiri mian vojon!
- Ne, ne, sen iu matĉo en ĉi tiu batalplaco hodiaŭ, ci ne povas foriri!- rediris Zeka laŭtvoĉe.

La knabo hezite rigardis ĉirkaŭ si.

“La patro estas dirinta ke mi nenium toleru humiligi min- pensis li- sed ĉu eblas rezisti. Ĉiujn ĉi tiujn! Se ili alĵetas min, certe formanĝos min ankoraŭ nematurite...Sed la patro estas ankaŭ dirinta: Ĉiu gardas sian kapon...Tamen estas ili multaj, mi aŭguru ke ili ne komencu, alie mi ege embarasiĝos. Tamen eĉ mi mem kulpas, kial mi ekiris antaŭ la patron! Kaj li, kie ja estas nun, kvazaŭ estus debila! Neniam plu mi ekiros survoje sola, eĉ se mi sciis ke ni mortaĉus pro ĉi tiu maizo, eĉ se venos la fino de la mondo”, pensis li aldirektante siajn briletajn okulojn trans la torenton, espereble ekvidi la patron.

- Ĉu per stangoj, ĉu per interkaptiĝo, kion ci deziras!—ekkriis Shahin.- Elektu!
- Kaj se mi nenion elektos?

La knabo apud la ŝarĝo movis la kolon iel fierece, okulangule rigardis la minacantajn vizaĝojn kaj la duonfermitajn okulojn de la fremdaj knaboj. “Povra mi, estas mi enirinta en la kaprina korno kaj riskos pereji kiel Hasan Karcelli”<sup>26</sup>, pensis li tremante kiel la vergo en la akvo. Impete - impete ŝajnis kvazaŭ la koro eksaltis ĝis la kapopinto, tiom forte batis la tempioj. La sango foje bolis, foje glaciigis en la vejnoj.

- Ĉu vi parolos, aŭ ni faru cian dorson pli mola ol la ventro!
- Lasu fraĉjo, ke mi transpasu la vojon kaj ne vi freneziĝu, ĉar...

La knabo kun la ŝiritaj vestoj levis la pantalonojn kaj viŝis la nazon per antaŭbrako. “La patro estas dirinta ke la bojanta hundo ne mordas. Estas li dirinta ankaŭ ke de la hundo sin ĵetanta al vi, ne eskapu, sed returniĝu kaj postsekvu, alie ĝi damaĝas vin”. La okuloj, nevole, haltis ĉe tiuj de Ajet, tute ĉirkaŭite per sango.

- Parolu, parolu, alie ci finiĝos en la putu!

Ankaŭ Ymer intervenis:

- Parolu fraĉjo, ci ne havas alian alternativon!

---

<sup>24</sup> Nacia albana mitologia bravulo

<sup>25</sup> Alia mitologia albana bravulo

<sup>26</sup> Personaĝo loka

La lipoj kaj la manoj de la povra knabo tremiĝis. “Povra mi, ĉi tiuj estas jam decidintaj dispecigi kaj bastonegi min”, pensis kaj la buŝo denove malfermiĝis:

- Per stangoj- tute ne, kaj..
- Parolu do, vin formanĝu sepcent diabloj! Ne iros ci en la infernon: aŭ faligos iun , aŭ cin oni faligos kaj la afero, per tiom, finiĝos! Vin interkaptiĝu, Ajet!- kriis Zeka ĝoje frotante la manojn.
- Ne, je Dio- eksaltis Ajet- post kiam mi faligos lin kun dorso surteren, li certe iros kaj prenos la stangon ĉe la torento!

La deŝiritulo, tro konfuzite, nur estis malferminte la okulojn kaj la buŝon kaj tremis kiel la vergo en la akvo.

Ymer alproksimiĝis kaj, kaptinte lin per brako, demandis:

- Kiel ci nomiĝas?
- Elez.
- Elez, tute ne timu, nur gardu cin ke li ne rompu cin en la talio. Ĉu ci kapablas interkaptiĝi?
- Nur iomete.
- Venu, foriĝu iom pli transe, demetu tiun sakon, Ymer, kaptu!- parolas Malush, rondirante jen tien. jen ĉi tien, movante per manoj kaj piedoj. –Ajet, venu, interkaptiĝu!..

Ajet elspulis surteren, rigardis la knabinojn, kiuj, stare, rigardis ĉi tien kio estus okazonta, levis iomete la linajn kalsonojn kaj alproksimiĝis al Elez, kiu ankoraŭ ne moviĝis:

- Jen, ĉi tie, filĉjo! Starigu la korpon, starigu la korpon!

Elez hezitis, sed, finfine, krispis la lipojn kaj interkaptiĝis. La duelo komenciĝis...

Ambaŭ knaboj, per arigitaj fortoj, rondiradis ĉirkaŭ unu la alia. Ĉe Ajet, la sango bolis en la vizaĝo, dum ĉe Elez la vizaĝo restis, kiom plenbuŝo kaj sen guto da sango.

- Kuraĝu, viraĉo!- kriis Ajet.

La svelta knabo nenion diris. Ĉe lia flanko nur Ymer estis, dum la ceteruloj, ĉiuj ĉeflanke de Ajet. Ymer bruigis kiom tri personoj.

- Malfermu la piedojn, Elez, malfermu la piedojn! Ne perdu la atenton, alie li ĵetos cin en la korbon, gardu cin!

La aliaj kriis nur impete-impete:

- Ajet, ne hastu, stultulo, alie formanĝos cin la Diablo!
- Ajet, malfermu la okulojn!
- Rompu ĉe la talio, Ajet!
- Ajet, nun movu, ĉar li estas en la malbona pozicio!

Nek la ruĝvanga knabo ĉesis paroli:

- Elez, kuraĝu do!..Kie vi estas Shegoj<sup>27</sup> kie! Malfermu la piedojn, malfermu la piedojn! Premu, porkaĉo, do! Forigu la piedojn, nigra porko, do, ĉar tre kapablas ci!..Ah, kie vi estas Muj, kie!

---

<sup>27</sup> Alia mitologia bravulo

- Premu, Ajet, bravulo!
- Kuraĝu, kuraĝu!
- Ne malkuraĝu Ajet!
- Distordu forte, forte!
- Oh, eskapis li do, fripono!
- Jen nun, rompu, rompu ĉe la talio, do!
- Forte!..

La ruĝvangulo kriis per la tuta voĉo:

- Ah, kie vi estas drako, kuraĝu fratego, ĉar ci aspektis kvazaŭ malfortulo sed rezultiĝis tre kapabla! Kukavu, kukavu, preskaŭ li rompis cin, kaj kuku!...falko! Oni preĝu por ci!..

La knaboj rondiradis. Ĉe Ajet, la ŝvitbutonoj elfluis abunde. Ĉe Elez la buŝo turniĝis al rimeno.

Tie transe, ĉe la torento la gapantaj knabinoj, apenaŭ sentiĝis vivaj. Ĉe Feride la ruĝiĝo survizaĝe, foje venis, foje iris.

Ĉi tiuj, la ceteruloj, krom Ymer kiu ne ĉesis kriadi, nur ilin intervidiĝis en si, kriante rare:

- Ajet, rezistu, bravulo!
- Ne toleru, Ajet!

Ajet, impete-impete krispis la lipojn, premis la dentojn, elsputis surteren, dum Elez enpiris pene. Ambaŭ estis elĉepiĝintaj, ili ripozis atendante iun alies eraron por ke finu la duelon.

La ruĝvanga knabo bolis kiel la bovlo:

- Ah, kie ci estas Elez Dibrani, do!
- Ĉi tiu estas rezistanta eĉ pli, ĉar...Eh, filĉjo! Kie vi estas Ajet, kuraĝu se vi povas!..

Ĉe Elez, la vestoĉifonoj, fariĝintaj pecpece, eksaltis vee dum li rondiris frezeziĝinta.

Ĉe Ajet, pro la granda deziro por venki kaj pro la singulto, la spiro estis ĉesante. “Se ĉi tiu faligos min, neniam mi kuraĝos aperi antaŭ la aliaj paŝtistoj,- pensis li- sed ĉu povas faligi min ĉi tiu homaĉo. Mi devus faligi lin jam. Je dio, sufiĉe longe li ja rezistis! Diabla ido!..”. Ĉiuj estis gapante!..” Oh, povra mi, kiom laca mi estas!..”

Al Elez, pro la troa laciĝo, briletis ĉio ĉirkaŭ si. En la oreloj ripetiĝis la estingita voĉo de sia patro: “Kiam oni tordas vin, nur malfermu la piedojn kaj ne enspiru. Se li klopodos stumbligi vin, nur foriĝu disde li kaj tordu lin ĉebrake..Kaj ne singultu! Kaj ne singultu!..” Verŝajne ne estas laciĝante, ĉi tiu ruĝokululo, pensis Elez impete-impete, auŝkultante la fortan krion de Ymer.

Dum momenteto, ĉiuj silentis kaj tuj Ajet sin trovis sub la nudaj genuoj de Elez. Ĉiujn kaptis ia ne eksplikebla sento, dum Ymer, saltante soren, ekkriis kiel malatentulo:

- Oh, kie ci estas Elez, fraĉjo, kiom bone ci faligis lin!

Al Ajet tio ŝajnis neebla, dum al Elez, revo.

La knabo kun ĉifonitaj vestoj, sian sekan vizaĝon turnis kvazaŭ en oleo, vidis la alian sub si, alfiksis la rigardon al la ruĝaj kaj alkroĉitaj okuloj kaj ekstariĝis sen ia akcentita orgojleca signo. Ajet, ankoraŭ surtere, viŝis lace per antaŭbrako sian vizaĝon sufokitan pro la ŝvito, kaj krispante la okulojn, rigardis la brogantana sunon kaj poste ankaŭ li ekstariĝis kaj, kvazaŭ viŝante la polvon de la linaĵoj, mallevkape, kiel talpo, ne dirante ion, sin turnis al la torento.

Elez rigardis, foje, soife, al la torento, kie Feride ĝojflugis, kaj post kiam elsputis surteren, iris kaj eksidis sur sia ŝarĝo, dorse al la torento, sub la plena suno.

Ymer postsekvis lin. Post momento, ankaŭ la aliaj gratulis la fremdan knabon, kun bruna vizaĝo kaj ĉifonvestoj..

- Eu, kiom bone ci mallevis ties voston, do, fraĉjo!- diris Ymer al la knabo sur la sako, dum li tuŝadis la ties brakon, kalkansidante apud li.- Estas ci faliginte miracle, kvazaŭ per rekomendo!..
- Ne, je Dio, ne laŭrekomende, sed laŭmerite- kiel mortaĉinton!..Stultulo li, kial liu volis interkaptiĝi, dum li tute ne kapablas!
- Lasu tion, li facile ja faligis Ajet-on, sed ne ripetu la vortojn de Ymer!- diris Zeka, tuŝante la kamaradon per kubuto.Kiu, ĉu facile?!..Ne diru tion!
- Kia facileco, fraĉjo!- intervenis en ĉi tiuj vortoj ankaŭ Ymer.- Tio ne estas afero postulanta nur forton, sed ankaŭ majstrecon!..Se li faligis la alian unufoje, povas faligi ankaŭ tridek fojojn!...
- Silentu ci, porka grenŝelulo!- eniris en la konversacio ankaŭ Shahin.- Kiam do fariĝis ankaŭ cia tenilo por konsili nin..
- For ci!- rediris Zeka al Shahin kaj alparolis knabon sidanta sur la sako: - Kiu estas cia patro, fraĉjo?
- Ĉu mi?
- Jes, ja.
- Estas Abaz.
- Kiu Abaz?
- Abaz Gjuka.
- Uh, tion la tuta Gallap ne kredus, fraĉjo, povraj ni!- kriis Ymer kaj tuj ekstariĝis.
- Eu, kion ci jam diris!
- Ci, la filo de Abaz, povraj ni!
- Jes, ja!- respondis Elez haste malfermante siajn etajn okulojn.
- Uh, kaj mi pensis tute alie, sed ci...
- Lasu tion! De kie vi venas?
- De Llapi.
- Ĉi tiu devenanto povas esti iu povrulo de Llapi. Estas li aŭdinte la nomon de Abaz Gjuka, kaj tiel..
- Ĉu ĉi tiu ŝajniĝulo estas la filo de Abaz?...Hi-hi-hi!...
- Kuku, je la nomo de Abaz!...

Dum la fremda knabo rigardis, foje unun kaj foje la alian fiparolantan, ne povante ion diri por konvinki ilin ke li ne mensogis, el la flanko de la akvofonto alvenis forta ina krio:

- Foriru, onklo!..

Ankoraŭ ne povante movi eĉ la etan fingron, kolera frapo per stango trafis la kapopinton de Elez, kaj faligis lin surteren..

- Ah, Ajet- aŭdiĝis la voĉo de Shahin- bravu al vi, bone ja agis!

Kaj tuj post tio, ankoraŭ forta voĉo:

- Foriru stultuloj, ĉar trafis nin la malbona horo!

Kaj la knaboj, tiel konfuzitaj, forkuris tuj, perdiĝis kvazaŭ ilin estis ellasinta la tero...

Nigra kaj densa sangotrombo algluis la tonditan kapon de la kuŝanta Elez. La sango elfluis tre abunde.

- Onklo! Povra mi, trafis vin malfeliĉo! Mia onklo! Kuku, mia onklĉjo!

La knabino, je grandaj okuloj kaj raraj dentoj, alproksimiĝis la kuŝulon kaj, ĝemante, kaptis lin per la sangumita kapo, poste per la maldekstra brako kaj turnis sin akurate. Ŝi, terurigita, skuis lin kaj kriis lamente:

- Kuku, onklo, por mi! Ku-ku, kio trafis cin hodiaŭ! Kuku...- kaj alĵetis rigardon tien ĉe la

akvofonto. Tie estis nur Gjyle, ĉagrenita.

- Gjyle, fratino, venu kaj helpu min konduki ĉi tiun ĝis la akvofonto!- kriis Feride kun larmoj survange.

La nigra sango, post kiam ĝi forlavis preskaŭ la tutan kapon kaj la vizaĝon de Elez, komencis dikiĝi, fariĝi koagulon. Feride nur ploradis. Ŝi rondiradis kaj haltis ne havante forton por vidi la fremdan knabon.

Feride, finfine, iom proksimiĝis, ĉesigis la lamenton kaj alparolis Gjyle-n:

- Gjyle, fratino, mi petegas, alportu tason da akvo por ke mi lavu ĉi tiujn okulojn!...

La sangofluado de Elez, post iome, haltis. Li malfermis la okulojn kaj komencis rekonsciiĝi. Ĵus alvenis Gjyle, kun la kruĉo plenigite per akvo, ŝi mankaptis lin kaj proksimigis la kruĉon ĉe la sekigita buŝo. Feride tenis lian kapon, dum la knabino kun la kruĉo en unu mano kaj per la alia en la manoj de la falinto, rigardis lian kapon, lavite per sango. Densa kaj certa voĉo venis de la flanko de la paŝtejoj.

- Oj, Trashe!...Gjyle-oo!..
- La knabino, je bluaj okuloj, kiel la ĉielo, baraktadis kiel la homo kies haŭto bezonis gratiĝi, dum la manoj siaj estis okupitaj kaj embarasiĝis en si. "Forlasi ĉi tiun, mi ne povas, ne forlasi, nun venas la patro kaj vidos min... Vidos ĉi tiun povrulon tiel", pensis ŝi, ne povante movi eĉ la etan fingron.
- Gjyle!
- Oj?
- Kial ci ne respondas, do?- diris la flavliphara viro per tepida voĉo, sed li tuj rapidigis la paŝojn susurante:- Vidu-vidu, kio estas okazinta, ĉu? Kiam atingis la akvofonton, li snufis foje per nazo kaj demandis gapante per siaj bluaj kaj grandaj okuloj:
- Kio okazis ĉi tie, paĉjo?!...

Gjyle, teninta enmane la kruĉon, nur retiris la brakojn kaj ĵetis la okulojn surteren. Elez rigardis dentopremante, dum Feride balbutis:

- Frapis lin la paŝtistaĉoj per stango al la kapo...

- Kiu, do?

Tiun momenton, voĉo je metala sonoreco, sed iel necerta kaj tremanta en si, interrompigis la interparolon:

- Kiel vi fartas, Sejdi?

La flavlipharulo, ankoraŭ ne parolante, kvazaŭ time kapturis subite kaj fronte de si vidis malaltstaturan kaj dikan viron, grizliphara kaj duonfermita okululo.

- Kiel vi fartas?
- Bone, dankon, ĉu vi? - diris la viraĉo kaj, klopodante reteni la tremon, surgenuiĝis antaŭ la knabo kuŝanta, kiu tiun momenton fermis la okulojn. Feride murmuris internaze:
- Onklo!

La viraĉo elpoŝigis la takakujon kaj, per tri fingroj prenis iom da tabako el ĝi, levis la kapon de la knabo per unu mano kaj per la alia surmetis la tabakon en la sangumita loko de la filo. Poste, eligis el la zono kafkoloran mantukon kaj ligis per ĝi la knaban kapon.

Gjyle rigardis sian patron. Ĉe la flavlipharulo, la profunda silento surdigis la orelojn kaj senigis lin je buŝo. La rigardo de sia filino preskaŭ sufokigis lin kaj malheligis la okulojn. La koro leviĝis ĝis la gorĝa kavo.

Ie, meze de la markotejo, sonoris tintileto kaj post iome aperis kaprino, poste ankaŭ kaprido.

Elez konsideriĝis mortinta. La viraĉo estis mallevinta la rigardon kaj oni ne sciis kion li vidis: la teron aŭ la kuŝinton. La flavlipharulo forkaptis subite la maldikan kaj palan manon de sia filo, premis la vejnon, kaj post kiam revenis la spiro, ne vidante la grizlipharulon, alparolis al Gjyle per elĉerpita voĉo:

- Kiu faris ĉi tiun fiagon?

La knabino alĵetis la okulojn surteren kaj retiris la brakojn.

- Kiu, mi diras?! - kriegis la dorsnazula viro per ardiĝinta voĉo, sonorebla kaj kvazaŭ eligita el la fusilo.

La knabino retiris la malsupran lipon:

- Ajet.
- Kio, do? - diris la viro, kalkansidanta kaj lia nazo, paliĝinta tujtuje, ŝajnis kvazaŭ eligis flavajn fajrerojn en la momento kiam ĉi tiu eksaltis surpiede kolere kaj ekdemandis la buliĝintan knabinon.
- Kien li iris?

La knabino kun la kruĉo enmane, flugigis la okulharojn kaj kudris la buŝon.

- Kien li iris, mi diras al vi? Parolu, porkidinino, alie mi disŝiros cian buŝon!
- Soren, al la markotejo...

La viro je vizaĝo pli pala ol la flavaj lipharoj, snufigis brulige la nazon, alpafis la okulojn kiel du etaj pecoj da vitriol, je direkto de la surgenuiĝinta viro antaŭ la sia kuŝanta filo, kaj post kiam kolere dentopremis, sin pretigante aliri al la arbustejo, murmuris:

- Hodiaŭ estas antaŭdestinite disrompi tiun fiulon, povra li...



La surgenuiĝinta viro deŝiris la rigardon disde la knabo kaj turnigis la duonfermitajn okulojn...

Sejdi apenaŭ faris du paŝojn, kiam potenca mano algluiĝis ĉe lia brako.

- Sejdi, haltu!
- Ĉu mi haltu?! Lasu min, amiko...
- Silentu, ne ĵuru do!- diris la viraĉo, krispante la dikan lipon kvazaŭ ridete.
- Mi fariĝu hundo...
- Vi fariĝu hundo, ankoraŭ paŝon pli, kaj ni rompiĝos!- diris la viraĉo retirante la dikajn unufingrajn brovojn kaj kaptante la manon perforte.
- La viraĉo ellasis la alies manon kaj iris kaj eksidis piedkruce sub la ombro de la blanka kverko, apud la kuŝanta knabo, kies kapon ankoraŭ tenis Feride.

La flavlipharulo restis glaciiginta. Hezitis kelkajn momentojn kaj poste iris kaj eksidis apud ili krispante la lipon kvazaŭ je acida gajeco.

- Eu, vi ja ne lasis alian aliron, ni ne vidu pli malbone!..
- Lasu, vi- diris la viraĉo etendante la tabakujon, - ĉu la viro agu laŭ la menso de la infanoj? Tre junaj ja ili estas!...Prenu, Sejdi, mi ne scias ĉu plaĉos al vi ĉi tiu tabako, ĉar estas tre akra kaj ankoraŭ ne bone sekiĝis...La tabako de Gollak, oni diras estas pli bona, tamen eĉ ĉi tio taŭgas kiam ne estas io alia...
- Sejdi kapskuis kaj etendis la makuletan manon...

Ambaŭ viroj, kaŭrante, interŝanĝis rigardojn inter si: la bluaj okuloj de la makulhara viro komencis promeni tra la mokasenoj pretigitaj bugarece, tra la flikitaj tirq-oj<sup>28</sup>, mitano pecpece, paktuko ĉirkaŭ la grasiiginta felto: poste sur la malhela vizaĝo, granda buŝo kun dikaj lipoj, griziĝintaj lipharoj, nazo anasbeka, sur la frunto kun la sulkoj laĉ-laĉe, brovoj unu fingron dikaj kaj haltis sur la duonmalfermitaj okuloj sen iu precipa koloro en si, sed briletantaj, penetrantaj, el kiuj fontis ia fiereco neeksplikebla, sed ankaŭ ne deflankigita dubo. Dume, la duonmalfermitaj okuloj ne longe rigardis, ili ekiris de la plata felto kaj kaptuko el blanka randrimeno kiel la pira floro, malsupren al la larĝa kaj ebena frunto, blankiĝintaj brovoj, al nazo kiel kokina skapolo, vangopintoj ruĝaj, lipharoj frizitaj zorgeme, eta buŝo kun maldikaj lipoj; poste tra la kotona ĉemizo, brunaj tirqoj kun po tri fingroj da galono, sur la ŝtrumpoj el la blanka lano kaj haltis sur la mokasenoj kun kusenetoj faritaj per rara majstrec...

Post kelkaj momentoj, la rustiĝinta kesteto kaj kupronikela kesteto, pleplene kun tabako, restis inter la du viroj. La cigareda fumo leviĝis trombe, dum la interparolo apud la rigidigitaj knabinoj kaj la kuŝanta kaj silenta knabo komenciĝis.

Ambaŭ viroj havis inter si ian konversacion, sed Sejdi ne certis ĉu estis ĝuste tio pri kiu li pensis, dum la brunlipharulo ne volis forte” alfiksiĝi”, ĉar ne permesis lin la fiereco, nek la ĉasteco.

La kaŭrantaj viroj interfrapigis ankoraŭfoje iliajn rigardojn, poste la flavlipharulo malfermis la buŝon ĵetante tre zorgeman rigardon al la kuŝanta knabo:

- Verŝajne la mieno pliboniĝis ĉe li, aŭ tio nur ŝajnas tiel?..
- Ĉu vi timas ke trafos malbono lin? Lasu fraĉjo, ĉar el malriĉeco kaj povreco li devenas!..Nenio trafos lin!..

La flavlipharulo nur kaptordis, dum la lipo retiriĝis iomete en gajeco. “Li estas envere, sed denove oni ne scias, ĉu mi eraras”- pensis ĉi tiu kaj turnis sin al la grizlipharulo:

---

<sup>28</sup> Lanaj longaj pantalonoj

- Ĉu vi bonvolus diri min, kiu vi estas kaj de kie venas?

La viraĉo unuafoje retiris akurate la lipon en gajeco kaj respondis ĵetante tabakon trombone:

- Kion vi volus scii, Sejdi? Malriĉulo el Llapi...
- Malriĉulo estas la Diablo, viro, sed lasu tion ĉar la koron kaj paciencon vian mi ne povus interŝanĝi per ĉio mi havas. Se mi vidus mian filon tiel kiel vi vidas la vian, nepre mi estus freneziĝinta.
- Oni diras ke la gefilo estas la anima karbardaĵo, sed kial ni enuiĝi kiam lastlaste ne la mia tio estas..Ne estas, ĉar Tiu kiu estas donacinta lin, Tiu mem decidas pri la ties sorto...Tiu ankaŭ reprenas lin kiam tion konvenas al Li...
- La veron dirante, kiam mi vidis lin, en tia stato, konsideris mortintan, sed...laŭdata estu Li, ĉar Lia kompato estas ja granda!..
- Ĉu vi havas kvar aŭ kvin gefilojn?
- Ne, longe vivu vi, ses!
- Ĉu ses filoj?
- Kvin filoj kaj unu filino. Sed..

La viraĉa lipo ekridetis kaj la malpeza kapskuiĝo lia signifus senheziteme: “Kio, sed?...Ĉu vi ne estas feliĉa?...”

La flavlipharulo, kvazaŭ la kato sentanta la musan odoron, aŭdis la voĉon de ĉi tiuj nediritaj vortoj envolvitaj per tiu rideto, kondukita per tiuj preskaŭ mokantaj kapskuiĝoj, tial li daŭrigis tie, kie li lasis:

- Sed, laŭkalkule pli bone estus sen ili!..

La duonmalfermita okululo ne movis eĉ okulharon.

- Vidu vi...antaŭ du monatoj mi edzigis mian filon, Mustafa-n. Estas li la tria filo..Sed, antaŭ tri semajnoj oni varbis lin soldaton...
- Eh?- diris Abaz kaj montris intereson.
- Jes. Kion mi faru? Pro embaraso, mi serĉis anstataŭulon, elpagis al ĉi lasta la duonon de la mono kaj mi estis ege ĝoja (ĉar envere nun estas tre malfacile trovi anstataŭulon, eĉ ankaŭ per ruĝa mono, ĉar okazas multaj militoj!). Kaj – tiel ĝoja mi revenis hejmen kaj rakontis tiel kaj tiel, sed ĉu vi scias kio okazis al la homo, kiam la maljuniĝo malplisaĝigas lin, laste mi diris, nur ŝerce: filĉjo, ne zorgu, ĉar la patro, estas certiginta vin resti ĉe la virinaj roboj!..
- Eh?- la viraĉo ekgapis kaj eligis tabaktrombon el la nazo.

La flavlipharulo iom ridete daŭrigis:

- ...Kion mi vidu, mi ja eraris, la filo ĉagreniĝis, la mieno ĉe la ties vizaĝo tute variigis; foje unu mieno iris, foje alia venis. Sed neniun vorton li diris, nur subite ekstariĝis kaj ekiris ien, kvazaŭ malsatulon, kaj mi ne plu vidis lin.
- Strange, strange! Jes.
- ...La morgaŭon venis ĉe mi lia patrino. Li estis dirinta ŝin: diru al la patro ke mi lasas al vi prizorgi tiun edzinon, kaj ne enuu por mi, ĉar mi foriris!
- Ĉu? Kien?
- Atendu!..Post kvar tagoj de lia foriro, alvenis la anstataŭulo. “O, Sejdi!” “Ohoja! Kio okazis tiel?” “Jen, je Dio, mi alvenis”, “Kial do vi alvenis?”...diris mi. “Je Dio, diris, alvenis Mustafa mem kaj revenigis min”. Ĉu?”, “Je Dio!”...” Kaj kien oni sendis ilin, ĉu vi sciiĝis?”

demandis mi. “Tien, al la urbego”, diris.”Ĉu en la militon”, “Jes ja, en la militon”...Komprenu, virĉjo, ekde tiu momento, mi ege ĉagreniĝis! “En ĉi tiu mondo, ekde tiu tago, mi eĉ ne povis dormi kiel la aliaj homoj, nek manĝi, nek resti kiel homo!...La tero moviĝas sub mi, kredu min, la kapĉapo rondiras kaj mi preskaŭ freneziĝas...

- Eu, eu!...Lasu tion, ĉu la viro enuiĝas pro ĉi tiu afero?!
- Unuflanke, la mono por la anstataŭulo foriris, aliflanke, la filo perdiĝis kaj la novedzino restis suspende!...
- Kio perdiĝis, lasu tiujn vortojn!
- Jes- tiel, kiu estis vi, bonvole, diru min!
- Bonvole, Abaz.
- Abaz Gjuka, ĉu?
- Jes, li mem.
- Eu, feliĉa vi estas, feliĉa!...Similis vi al mi iomete, sed mi ne kuraĝis diri la nomon, ĉar timis erari...- La okuloj de la flavlipharulo ekbriletis, la lipo retiriĝis en gajeco, kvazaŭ en lamento, kaj enspirinte profunde, li daŭrigis.- Auŝkultu, do Abaz, mi alparolas vin, kvazaŭ vi estas sepfoje mia frato, se mi ne konsideris la honton kaj la onidirojn de la popolo, mi ne sciis kion mi farus!..Mi ne sciis kion mi farus, fraĉjo!
- Lasu tion, ĉu vi konsideras sin viro aŭ ne?!
- Sed, ĉu la ido ne estas “la anima karbardaĵo”?...
- Se mi ne havus lin tiom juna, ne gravus, ne ege dolorigus min, ĉar la afero diferencas, sed li...ĉu dek fojojn li estas razinta sin aŭ ne?!...lasu tion, povra mi, lasu!..
- Sed la soldatiĝo por viroj ja estas! Ankaŭ li transpasos tion, kiel la aliuloj...
- Neniun soldaton mi havis ĝis nun, kaj...
- Ĉu por ĉiu filo vi trovis anstataŭulon, ĉu?!
- Por ĉiuj...ankaŭ por mi mem. Mia piedo trans la Gorĝo de Gallap ne jam piedpremis!..
- Kion vi diras, ej?!
- Mi ĵuras, mi ne mensogas!

La viraĉo, ĵetis okulstrabe la rigardon al la kuŝanta knabo, ĉe kiu nun revenis la vizaĝo de la vivulo kaj, post kiam tiu fermis la okulojn dum momenteto, ekparolis kvazaŭ la homo kiu foje forgesas kaj poste rememoras kion li volis eldiri:

- Ne, mi mem, ĉion ampleksanta Llapi kaj Gallapi, estas piedpremita, de unu kaŝangulo al la alia kaŝangulo...
- Eh...- parolis Sejdi, kvazaŭ al si mem, krispante la maldikajn lipoj,- ankoraŭ mi ne forgesis mian zorgon, jen ĉi tiu etulo venas kaj timigas la ĉevalon!..- iom poste daŭrigis:- Ĉu vi scias, Abaz, ke nur via braveco savis nin, alie oni tenus la fusilojn kaj damaĝis unu la alian!..Jes, ja, nur via toleremo, alie oni sangovenĝus...Ĉu vi scias, Abaz, se mi estus en via loko kaj vidus la filon en tiu malbonstato, certe ne povus min deteni! Kaj, se mi restus viva, eĉ kanonon mi uzus, ne sciante kion mi faras!..

Abaz, nur gajludigis la lipon, envolvis la alian cigaredon kaj ne eligis vorton. Iom poste li diris:

- Lasu tion, ĉar infanojn ja ili estas!..Ĉu oni kulpigas la infanon?..
- Kia infano, ĉu?!
- Etuloj, do, Sejdi!
- Kiu estas etulo, ĉu knabo deksejara, ĉu ne? Envere, nenion mi tolerus!

Dume, proksimiĝas al la akvofonto viro, grandkorpa, larĝskapula, iom klindorsa kaj kun dĵurdi<sup>29</sup> surbrake.

- Kiel vi fartas!- diris la grandkorpulo kaj preteriris mallevante la kapon kiel talpo.
- Dankon, je Dio, kaj vi, kiel vi fartas?- rediris la viroj, preskaŭ unuvoĉe, kaj, iel mire, rigardis unu la alian. Abaz, turnite kvazaŭ ĉebrake, ne povis vidi ion, krom dum la kapturniĝo li sukcesis distingi la alies densan kaj griziĝintan barbon. Sejdi vidis bone, sed diris nenion.
- Kiu estis ĉi tiu, preteririnta, amiko?- demandis Abaz, pli por malfermi iun novan interparolon ol pro la scivolemo.
- Emin Maloku.
- Ĉu, kiel li ne haltis almenaŭ iomete?
- Envere, tion mi ne scias!
- Mi estas dubante, iomete!...
- Kial?
- Vi estas koninte Jetullah de Rama... Vi estas akriĝinta kelkajn vortojn kun la frato de Emin pro iu montodekliveto..Kaj leviĝis Jetullah, jam forpasinta, bravulo estis, la nokton de Bajramo<sup>30</sup> kaj enbuskas kaj pafmortigas lin! Post naŭ monatoj, leviĝas ankaŭ la filo de Emin, la plejaĝa, enbuskas kaj same pafmortigas...ne gravas, la sangovenĝoj estas ebenigitaj kaj tiu afero estis fermita, dum ĉijare oni kvereliĝis kun la frato de Jetullah, Selman...
- Kaj poste?
- ...Kaj estis kondukintaj vortojn al li la filoj de Emin: "Vendu teron kaj la domon kaj foriĝu de ni, alie vi ne povas plu vivi!.." Kaj li, povrulo, kompreneble restinta sen apogo, kaj kun multaj infanoj, estis devigita vendi la teron kaj la domon, kaj eliris en la urbegon...
- Jes, envere, mi memoras tiun tagon, kvazaŭ estis hodiaŭ. Fakte, mi kaj Mustafa estis kondukinte lin ĝis fore..kaj la povrulo, tre ĉagrenita estis!..
- Kaj poste?
- Tiom! Nun mi supozas, ĉu Emin ankaŭ kun mi estas kolerigita!..
- Kial, kiajn rilatojn vi havas kun Selman?
- Kuzo mia estis!
- Ĉu vere? Mi neniel povus tion scii!
- Estis, fakte, malproksima kuzo: niaj avinoj estis duavicaj kuzinoj!
- Tamen, vin tio nenio tuŝas! Nenio! Ne gravas ĉi tiu afero, nenion..
- Ne, ne, mi diras al vi, ke mi ne scias...Tamen, ie estas dormante la leporo!...tio estas la vero..
- Se mi ne eraras, kun mi li estas iomete malkontenta..
- Kial?
- Jen, alvenis li en mia hejmo por svati mian filinon kaj mi revenigis lin sen respondo, ĉar mi ne havis iun por doni..ĉu oni enmanigas jam ankoraŭ infanon Abaz, kiel vi pensas?
- Interese. Kaj poste?
- Poste, mi aŭdis ke li restis malkontenta iomete...

La du knabinoj restis, kvazaŭ paralizitaj je piedoj, manoj kaj buŝoj. Elez, kuŝinta delonge, estis malferminta la okulojn kaj aŭskultis la interparolon de la viroj, ne eligante vortojn kaj ne movante nek la etan fingron. Kelkaj muŝoj rondflugadis super lia kapo, envolvita per la kafkolora viŝtuko.

Abaz direktis la sulkitajn okulojn al la suno, poste rigardis la kuŝantan filon kaj, ridetante, diris:

- Kiel vi pensas, porkido, ĉu ni ekstariĝu?

---

<sup>29</sup> Nigrakolora supra vesto de viroj, el kamloto

<sup>30</sup> Sankta islama festotago

- Ni ekstariĝu,- diris Elez, klopodante rideti ankaŭ li.
- Mi dezirus ke vi alvenu ĉivespere ĉe mia hejmo, malgraŭ mi ne scias viajn aferojn..- diris Sejdi, snufante per nazo.
- Oh, Dio donu vin bonojn kaj havu vi ĉiam rikoltaĵojn!..
- Vi plezurigus min, kaj..
- Venu, helpu min Dio, diris la viraĉo kaj tuj eksaltis surpiede.
- Eu, tre facile vi ekstariĝis, feliĉa estu vi!...Kiom jara vi estas, ej?
- Kvindekdu, ĉu multe, ĉu malmulte!
- Envere, mi estas enviante vin...
- Kaj vi, kiom da jaroj ruligis?
- Ho-ho-hoo! Ĉu mi ruligis, ĉu?..Plene sesdek kvin!

Dume, Elez sin pretigis surpiede, ankaŭ la knabinoj ekstariĝis. Ĉe Feride, ĝojekflamis la grandaj okuloj kaj sekvis ili la blankan hararon de Gjyle, briletantaj kiel la silkaj fadenoj.

Abaz kaptis la filon per unu mano ĉirkaŭ la ties zono kaj ekiris al la soligita ŝarĝo, je direkto de la avelujo. Ankaŭ Sejdi, kun la bastono enmane, ekiris tuj post ili. La knabinoj restis sub la ombro de la blanka kverko, silentemaj, ne povante malfermi la buŝon.

Post kiam foriĝis kelkajn paŝojn, disde la akvofonto, la viraĉo rediris al la viro, malantaŭ la piedkalkanoj:

- Sejdi, ĉu vi revenas?

Dorsonazulo, ne respondante, eligis aliajn vortojn:

- Eu, Abaz, estu vi frato en ĉi tiu kaj en la alia mondo, vi ja savis nin!
- Lasu tion, kian saviĝon, fraĉjo, sed revenu!
- Abaz! Ĉu vi estis koninta la filojn de Voci?
- Jes, bone.
- Ĉu vi memoras ke ili, pro unu kverko, okazigis kvar sangovenĝojn!.. Nur pro unu kverko!...Do, ankaŭ ili pretendis je ia braveco tre granda!..
- Lasu tiun aferon, fraĉjo Sejdi, sed revenu nun!
- Malrapidu vi, ĉar mi ne lasos tion!..Kaj pri la filoj de Liz, ĉu vi aŭdis ke estis intermurditaj, nur pro kokido?..
- Ĉu, envere! Kio Sejdi?..
- Kaj pri tiuj de Prapashtica, kiuj estis intermasakritaj, nur pro lokopaŝo?!

La viraĉo haltis kaj, aranĝante kvazaŭ majeste la dikajn brovojn, mallevis la sakon disde la brako kaj etendas la manon al la flavlipharulo.

- Mi ĵuras, neniun paŝon pli vi faros maltien!

La flavlipharulo haltis kaj ĵetis rigardon malantaŭen. La longiĝinta ripo de la avelujo kaŝis malantaŭe la grundstrion kun la folioplana blanka kverko kaj la malvarmakvan fonton.

Ambaŭ viroj ĉirkaŭprenis reciproke kaj interŝanĝis la lastajn salutvortojn de la disiĝo, poste patro kaj filo ekiris malsupren, dum la dorsonazulo, per facilaj paŝoj iris soren.

Post kelkaj paŝoj, Abaz haltis kaj ekkriis:

- O, Sejdi, se mi aŭdos ke vi eĉ tuŝetis Ajet, certe malplezurigos min, mi ĵuras je tio!..

Ĉe la flavlipharulo, la lipharo iomete ĝojmoviĝis kaj ne parolis.

Patro kaj filo sin kaŝis malantaŭ la aveluja kubuto...

- Paĉjo, kial vi malfruiĝis?- demandis Elez, forte kaptinte per unu mano la manon de sia patro kaj irante per necertaj paŝoj.

“Ne prokrastiĝu la morto al la patro”, sin malbenis la viraĉo kaj poste respondis:

- Jen, mi renkontis iun, filĉjo kaj restis..

Abaz mensogis, ĉar la vero estis fakte alia. Ĝuste, en la momento kiam estis interkaptitaj Elez kaj Ajet, ĉi tiu sin ellasis en la Seka Torento kaj tie haltis. Deziro neeksplikebla okupis lian animon, por vidi kiel finiĝus tiu interbatiĝo. Restis li surloke kaj kaŝrigardis de tie ĝisfine. Kiam Elez faligis la kontraŭulon surteren, tiuj adstringoj kaj bruliĝoj, ĝis tiu momento nekonataj, kiuj incitis la koron, tuj ĉesis. Pro la ĝojo, li ekridetis. Poste li vidis Ajet-on, kiu sin ĵetis alkure al la torento; vidis lin ankaŭ kiam li prenis la stangon en la torento; vidis ankaŭ kial li ekiris kun la kolero en la koro, je direkto al Elez, sed io bridis la sian langon, voĉo eliĝinta el la esenco de la vira fiereco, kio ofte estas pli forta ol la voĉo de la animo kaj de la koro, diris: “Ne enmiksiĝu en la infanaj aferoj!..”

- Ĉu ci kapablas iri aŭ volas ke mi portu cin surdorse?
- Ne, paĉjo, mi kapablas, ĉu la vundo estas tro granda?

“Oh mi, povrulo, pli bone ke mi blindiĝu en ambaŭ okuloj, estas ja tre peze vidi vian idon en tia stato!..kaj se ci mortus hodiaŭ? Certe ci venenigus ankaŭ ĉi lastajn miajn tagojn!...La tago nigriĝus por mi...Ne hastu, do, viro, ĉar la morton oni ne lamentas dum la homo estas viva!..”- Elfluis ĉe Abaz la pensofadeno.

- Kion, paĉjo?- diris la filo emfaze.
- Kion, paĉjo?..
- Ĉu la truo estas granda?
- Ne, filĉjo mia, tute ne granda, ne..

Post kelkaj paŝoj:

- Oh, paĉjo!
- Kion, filĉjo?
- Kiu estas pli forta, paĉjo: Muj Bylykbashi aŭ Gjergj Elez Alia?<sup>31</sup>
- Ambaŭ estas ja fortaj, filĉjo.
- Jes, jes, sed kiu el ili estas pli forta?
- Mi opinias ke estas Muj, eble..
- Kaj la madzon estas ĵetinta pli foren Gjergj Elez Alia, ĉu paĉjo?
- Jes, filĉjo...Jes...diru al mi, kial li frapis cin per stango?
- Ĉar mi faligis lin surteren, pro kolero..
- Jen, jen, ĉu ci faligis lin surteren?!- ŝajnis sin la grizlipharulo.
- Mi, do!
- Ne, ĉu vere?...ĉe la viro la lipharoj ridis.
- Jes, mi jŭras por la ostoj de la patrino!...


---

<sup>31</sup> Albanaj mitologiaj bravuloj

- Oh, feliĉa estas mi por ĉi tiu filo! Ĉi estas por mi bravulo! Alvenonte hejme, mi pafos tri foje per fusilo por ĉi... - diris la viraĉo kaj gapis siajn duonmalfermitajn okulojn je direkto de la vojserpentigo, kies maldikiĝinta vosto perdiĝis malantaŭ iu dekliva senarba kampeto.
- Transe, ĉe Llapi, kelkaj blankaj nubaj tromboj, kvazaŭ ridegaĉis al la harbruliga suno, kiu jam estis dorsoturninta al la antaŭtagmezo kaj rigardis je direkto de okcidento.
- Abaz aranĝis pli bone la ŝarĝon sur la maldekstra brako, dum per la dekstra mano, ne deŝirante la okulojn, amece premis la talion de sia filo kaj rapidigis la paŝon...

## Rakonto

**Dritero Agolli<sup>32</sup>**



## **Sovaĝeco**

Ĉi tiu rakonto estas verkita en la jaro 1964, dum la periodo de la totalisma reĝimo, enkadre de la libro "Bruoj de la iamaj ventoj", sed la cenzuro tiutempe malpermesis la publikiĝon.

---

<sup>32</sup> Dritero Agolli estas unu el la elstaraj albanaj verkistoj nuntempaj, eksa prezidanto de la Ligo de Verkistoj kaj Artistoj de Albanio dum la totalisma reĝimo

*La vivo iamfoje estas terura, mia amiko. Kelkajn dumvive trafis pli malfeliĉega sorto ol tiujn falintaj dummilite, mia amiko... (ĉerpita el iu konversacio)*

1

Mia ĉevalo haltis antaŭ la pordon je alta flankmuro. Ulo varmiĝanta sub la sunradioj kune kun granda sed maldika hundo, vidis min timigite kaj leviĝis.

-Mu-mu-mu!- eldiris li ion nekompreneblan kvazaŭnaze kaj puŝis la pordon. Ankaŭ la hundo postsekvis lin kaj sin kaŝis malantaŭ la pordo. Post iome, la pordotabulo denove malfermiĝis kaj mi ekvidis vizaĝon malrektiĝintan kaj longan langon elstarinta tra du dikaj lipoj kiel hepaton.

-Mu-mu-mu,- faris du dikaj lipoj kiel hepaton. Ankaŭ la hundo eligis sian malbelan kaj dormeman faŭkon kaj ĵetis sur min indiferentan rigardon.

- Kiu estas ĉi tiu salutanta min tiel delikatece?- diris mi al la akompananto, elĉevaliĝinta jam kaj ridanta.

-Gani, Gani! Ĉi tiu kamarado volas forŝteli vian hundon!- alparolis la akompananto al la homo kun hundo.

-Vi demandas kiu li estas?. Ĉu vi ne aŭdis jam pri Gani Bredhi?- turniĝis li al mi- Gani Bredhi estas fama ĉi tie.

Kaj tiam, tra tiu malnova pordo je putriĝinta pordotabulo, alfiksis per ladaĵ pecoj, antaŭ miaj okuloj ekfluis vivo je tiom da perturbaĵoj kaj kortremaĵoj. Kiom mi mem hezitas priparoli, ĉar ĝi verŝajniĝus terura, nekredebla fablo..

Okazis tie! Dum vintro ŝarĝita je neĝo, ĉi tien oni rimarkis kelkajn nekonatojn.

Komence, ili aperis kaj malaperis tra la pordo de tiu domo ŝoviĝinta je la rando de la monto, poste perdiĝis. La sama pordotabulo, dumvespere krakis kaj tra ĝin eliris homo kun sako surdorse. La homo surgrimpis la monton kaj revenis, kiam ankaŭ la monto ekplonĝis en la mallumon, same la domo kun kortomuro, kaj la pordo je putriĝinta tabulo.

Iutage alvenis antaŭ la pordo tri viroj kun aŭtomataj fusiloj, ili venis tra neĝo kaj vento. Ili frapis sur pordotabulon mordiĝinta de vermoj. Virino je flava vizaĝo kaj okuloj je viola cirklo, demetis la bolton kaj la viroj kun fusiloj eniris internen. Apud la fajrejo varmiĝis viro, kiu ekstariĝis ekvidinte la ĵus alvenintojn. Li estis altstatura kaj havis grandajn manojn. Restis silenta kaj malvarmsange.

-Je la nomo de la popolo vi estas arestita!- eldiris unu el ili.

La virino kaj knabo 12 jaraĝa, rigardis foje la viron, foje la triopon. La pordo malfermiĝis. La viroj kun fusiloj kaj la viro je manoj ligitaj malaperis en la blankeco de la neĝo disĵetiĝinta fare de la vento.

Pasis nelonge kiam la triopo kun fusiloj kaj la viro, ĉifoje je manoj liberaj, denove aperis ĉe la pordosojlo.



-Povas esti eraro!- diris unu el ili al la virino en la teraseto, dumtempe la aliaj du estis sidiĝintaj kun la dommastro apud la fajro, povas esti alia homo kiu alportis panon al diversantoj<sup>33</sup>. Tamen ni estis informiĝintaj ke ekzistas persono en la vilaĝo kiu ĉiun vesperon eliris el ĉi iu pordo kun sako surdorse..

La dekdujarulo aŭskultis kaj rigardis foje la patron, foje la anojn de Sigurimi.<sup>34</sup> Juĝante laŭ la lia mieno li ne estis kontenta ke okazis tiel. Li ion volis eldiri, ion kion li eble delonge pripensis, sed silentis. Tio vidiĝis en lia konduto, en lia atitudo, en lia vizaĝo. Rigardante lin, vi povus konkludi ke li ne estis simple dekdujarulo, sed matura knabo, je logiko kaj voloforto. La dekdujarulo diris: - Mi jam scias kiu estas la viro eliranta kun sako surdorse ĉiun vesperon; mi scias. Li enmetis en la sakon ankaŭ ŝafinaĵon, eĉ buĉitan virŝafon. Tiu estas ja mia patro. Mi komprenis jam. Li vivtenas la diversantojn per mano.

La viro ekstariĝis, tuj forkaptis la spadon kiu estis ĉe la angulo kaj sin ĵetis al la infano. Aliaj du kaptis lin. La edzino glaciĝis surpiede. Liaj manoj denove kateniĝis..

## 2

Ok jaroj pasis en la korto de tiu domo ne sentante la voĉon de la dommastro. Same en aŭtuno, kiam fagoj ekfaligis la foliojn sur la malnovan tegmenton, unu el la pordotabuloj malfermiĝis kaj en la korton eniris la viro. Li estis maljuniĝinta, la okuloj estis profundiĝintaj kaj la kapo estis tondita. Revenis li de la prizono. La knabo, jam dudekjarulo, ĉirkaŭbrakis lin, la virino ridetis. La viro staris malvarma. Ok jaroj for de la propra fajrejo, ok jaroj!

Nature tio estis ĝojo, li revenis en sia kameno, fajrejo, eksentis la agrablan bonodoron de la hejmo samkiel la haladzon de la kverkaj brullignoj en la fajrejo, eligintaj dolĉan fumon.

Dum la vesperoj li sidis apud la fajro plenigante kaj malplenigante la cigaredujon, pensante kaj memorante ion foran. Li parolis malmulte kaj ne rigardis la filon rekte al la okuloj.

Li kaŝis en si koleron kiu bolis sovaĝe, furioze, kaj atendis la okazon por eksplodi, eĉ se tiu kaŭzo estus malgranda. Iamfoje, indiferenta fajrero falis sur la stakon de seka herbo kaj ekbruligis grandan fajron, kiun eĉ se la tuta vilaĝanaro ariĝu, ne povis ĝin estingi.

- La tonditaj haroj estas kreskiĝantaj, patro!- diris al li iuvespere la filo, sidante kun li apud la kameno. La patro ne parolis, nur levis la brovojn. Kiam la virino ekridis, li kriis:
- Ne faru ŝercon kun mi! Ci ne ridetaĉu!-diris li al sia edzino ne rigardante la filon.

Ekpluvis. Guteto da pluvo ekfaladis mezen de la grundo. La patro staris apud la fenestro, rigardante la pluvon falanta kaj sentante la frapeton de la pluvero sur la bolkruco kiun la dommastrino estis metinta tien por ke la grundo ne akvumiĝu. La viro sin turnis al la filo, ne rigardante lin per okuloj.

- Dimanĉe mi vendos la ĉevalon en la bazaro. Ni bezonas ripari la domon- diris li.
- Sed baldaŭ kooperativo<sup>35</sup> disdonos la enspezojn al siaj membroj- diris la filo,- do ni havos monon, kial ni vendu la ĉevalon?
- Ah, atendu azeno ĝis ekaperu la herbo! Diamanĉe mi vendos la ĉevalon!- ripetis la patro per nediskutebla voĉo.

<sup>33</sup> Temas pri albanoj kontraŭstariĝintaj al la nova komunisma reĝimo, parte trejniĝinaj eksterlande kaj enirintajn la patrion malkaŝe por saboti kaj renversigi la ŝtatpotencon.

<sup>34</sup> Sigurimi –ŝtata sekreta sekurecforto

<sup>35</sup> Kooperativo- agrikultura kolektiva labororganizaĵo kiu ekspluatis la laborfortojn de la vilaĝanoj dum la tempo de socialismo

- Sed mi estas promesinta doni la ĉevalon al kooperativo- diris la filo.  
La viro tuj sin turnis al la filo.
- Mi jam diris ke mi vendos la ĉevalon dimanĉe. Finite. Senvorte.,-diris li.
- La ĉevalo estas ja la mia,-diris la filo.
- Kiu do estas dommastro ĉi tie, mi aŭ vi?- konstriktis la rompiĝintajn dentojn la patro.
- Ne interesas tio al mi. La problemo estas: mi petas vin lasu la ĉevalon,- diris la filo.

En la ĉambro aŭdiĝis nur la akvero falanta en bolkruĉon. Patro kaj filo rigardis unu la alian en la okuloj kaj dum momento silentis, eĉ ne enspiris kelkajn sekundojn.

- Kanajlo!-ekkriis la patro denove kaj premis sur la cigaredujon per forta mano.  
La filo denove ne respondis.
- Kanajlo-kriis la patro triafoje.- Mi estas farinte la kapon vian, ci volas konduki kun mi laŭplaĉe. Ok jarojn mi restis en la prizono pro ci! Ci igis min ne aŭdaci rigardi la homojn en la okulojn..
- En la prizono ne enigis mi, sed via kapo,- diris la filo, ekrigardante sian patrinon, kiu estis stariĝinta kaj rigardinta terurigita. Tiu rigardo demandis apogon en la okuloj de la patrino.
- Kanajlo!- kriis ankoraŭfoje la altstatura viro.
- Sufiĉe, ĉar la tuta kvartalo eksciis nian aferon,- diris la filo kaj tentis eliri eksteren.

Sed la patro kaptis lin je la jakmanikoj per dika mano kaj skuis lin. La filo klopodis eskapi de tiuj potencaj brakoj. La maniko restis en la manoj de la patro. La patrino sin ĵetis mezen de ili por apartigi ilin. La viro etendis la brakon kaj forkaptis longan stangon, kiu staris ĉe la ĉambroangulo. Li levis ĝin kiom li povis kaj ĵetis sur la kapon de la filo, sed tiu lasta iomete moviĝis, tiel la stango frapis ties dekstran brakon. Aŭdiĝis peza eksplodeto, kvazaŭ io rompiĝus. La filo falis surteren senkonscie.

Aŭdiĝis nur la akvero falanta sur la bolkruĉon...

..Tutan semajnon, kuŝanta sur matraco, li ne parolis. Post semajno, li komencis ellasi sensencajn sonojn. Unu brakon kaj unu kruron li apenaŭ povis movi. Se vi manĝigus lin, li manĝis, kontraŭe li ne manĝis mem. La patrino manĝigis lin per kulero.

- Mu-mu-mu,- respondis la filo.  
Alveninta kuracisto, vizitis lin, kaj diris ke la filo plurestos tutan vivon idioton. Pasis malmulte da tempo, kiam lia afabla vizaĝo komencis ricevi alian vidon.

3

La patro forlasis la vilaĝon kaj laboris monaton en la arbaro. En tiu arbaro patro trinkis dekojn da kilogramoj da tabako, poste li iris labori kiel ŝtonrompiston en foran ŝtonejon, pretiganta ŝtonerojn por pavimi la stratojn. Sed finfine, li revenis hejmen, ankoraŭ pli faltiĝinta, ankoraŭ pli nubiginta, ankoraŭ pli silentema. Li absorbis la cigaringon en la kameno. La idioto flusalivplena sidis en la angulo de la ĉambro kaj faris "mu-mu-mu".

-Ni riparu la alian ĉambron. Mi ne povas kunsidi kun ĉi tiu,-diris la edzo al sia edzino. – Mi ne povas!

-Mu-mu-mu,-faris la idioto.

La vento frapis sur la vitrojn. La lampo bruliĝis en la rando de la kameno. La idioton kaptis la dormo tie, ĉe la angulo de la ĉambro. Li kuŝis surdorse, estis malferminta la buŝon kaj el ambaŭ lipoekstretoj eliris flusalivo. La viro fumis. La violkoloraj cirkloj de la okuloj de la patrino fariĝis pli grandaj.

La geedzoj estingis la lumon kaj endormiĝis. La filo murmuris dumdormo:

-Mu-mu-mu!

La patro fermis la orelojn permane.

- Mi ne povas plu aŭskulti lin!-kriis li.
- Mu-mu-mu!- respondis la filo.

Kaj tiam li eksaltis de la matraco, sin vestis kaj ĝis mateno sidis apud la kameno. Li dezirus iri al kelkiu amiko, por babili, fumi kune, sed en la vilaĝo ĉiuj estis abandonintaj lin. Eĉ, kiam li eliris sur straton, la virinoj rigardis lin el la fenestroj kaj flustris:

-Jen li!

Kaj li ja sciis ke la homoj ne prikonsideris lin, ne amis lin. Lin penigis ilia silento, kiam li renkontis ilin hazarde surstrate. Tio estis sovaĝa, malesperiga, trista, maldolĉa silento. Ili silentis kaj konsideris lin fiulon. La veron dirante, estis ankaŭ aliuloj kiuj estis dirintaj rekte al la okuloj ke ili malamamis lin kaj eĉ ne volis pluvidi lin en la vilaĝo.

Iutage li malaperis. La loĝantoj de la vilaĝo ne vidis lin plu eliri sur la stratetoj de la vilaĝo. Lin estis vidinta nur la arbargardisto, kiu estas trovinta lin pendigita sur iu pratempa fagobranĉego per la rimeno de siaj pantalonoj. Li pendigintis sin. Tiel finiĝis tiu historio, la historio de Gani kaj ties patro.

Ni surĉevaliĝis kaj nin kaŝis en la densa arbaro.

## Enesperantigis Bardhyl Selimi

### Vojaĝimpresoj

## Unu semajnon ĉe la Kabo de Sounio


Pasiginte kun mia edzino kvin tagojn en la plaĝo de Durrës, mia filo, Genti, proponis nin semajnon da feriado en la plaĝo de Sounio (Grekio), je 50 km for de Ateno.

Kiel ankaŭ aliajn fojojn, la vojaĝo iro-reveno estiĝis per aviadilo, ĉifoje per "Olimpik" kiu post la bankrotiĝo de la albana flugkompanio "Belleair" estas notinde kreskinte la prezojn (almenaŭ 40 %)!



Genti kaj lia edzino elmontris grandan zorgon por ni kaj du gepatroj de la novedzino.

La golfo envorte limiĝas de la Kabo de Sounio, monteto enigita en la maron, ĉe kies pinto stariĝas la antikva templo, tiu de Poseidono, kio eble pli famigis kaj faris alloga ĉi tiun plaĝon.




Lokano rakontis min unu el la mitoj temantaj pri tiu monteto, kie dumvintre blovegas fortaj ventoj: patro estis petinta sian filon, Arkileon, ke tiu revenante per lia boato, antaŭsignu per flamoj. Sed la filo forgesis plenumi tiun peton kaj tiel la patro pensis ke la filo dronis. Pro malespero, la patro sin ĵetis malsupren de la rokego. Insulo vidata defore en la maro portis la nomon Arkilea.


Ĉiun vesperon dekoj da turistoj ariĝis sur la monteto apud la Templo por observi la sunan malleviĝon, kio estis envere belega spektaklo.



Sur la montetoj ĉirkaŭe, iam nur kun arbustaĵoj kaj erikoj, pinarboj kaj olivarboj, nun staris la turismejo "Grecotel", kun dekoj da vilaoj unuetaĝaj sur la terasoj, je plena komforto, kelkaj ekipitaj per naĝejoj, alireblaj tra serpentumaj stratetoj asfaltitaj kie moviĝis pluraj Klubĉaretoj.



La retoracio kaj la oficejoj estis apud la marbordo, ĉe kelkaj malnovaj ruinaĵoj atestantaj pri antikva loĝloko. Same tie, estis ankaŭ komplekso de naĝejoj je marakvo.



Mem la golfeto, protektata de du bariloj el rokaj ŝtonoj ĉirkaŭis basenon je varma akvo kaj kun profundeco laŭgrada. Ĉirkaŭ 200 m fore oni povis ankri diversspecajn skafojn alportintaj turistojn, studentojn, tagajn feriantojn, esplorantojn.

Apude pasis la aŭtovojo kondukanta al Ateno kaj Lavrion, kie videbliĝis alta nombro de busoj.

Ĉi tiu turisma komplekso, same kiel tiu de "Costa Novarino" en Peloponezo kiun mi bonŝancis ĝui du jarojn antaŭe, estas ankaŭ bonega praktikejo por la studentoj de hotelumado kaj turismado. Surtute, tie oni konstatas tion kio mankas en la plejmulto de la albanaj hoteloj, la bona komunikado kun la klientoj, prizorgado ĝisdetale, plifacilaĵoj de la vivo dum la restado tie.



Inter la tieaj laborantoj estis ankaŭ albano el Suhodolo de Dibra, s-ro Lami, kie ege ĝojis ke li renkontis ankaŭ albanojn en ĉi tiu luksa turismejo. Unu posttagmezon li alportis en la suntendon kie ni restadis, pletegon plena je fruktoj, je liaflanko..



Ni renkontis albanojn ankaŭ en la aliaj lokoj, kiel en la taverno de la fiŝo "Ilias", kie ili konsistigis pli ol la duonon de la laborantojn.

La tempo pasas bele apud la maro, des pli kun niaj gefamilianoj. Ĉifoje mi havis okazon kunludi kaj konatiĝi pli bone kun ambaŭ miaj nepinoj, Dea kaj Dana. Dea baldaŭ fariĝas kvarjara. Ŝi bone kapablas nun naĝi kaj por mi estis malfacile postsekvi ŝin. Post kiam ŝi estis malkovrinta jam la subakvan mondon danke al la masko kaj aertubo, Dea apenaŭ deziris forlasi la maron..Mi alportis por ŝi kelkajn ilustritajn revuojn same libron kun figuroj pri la 36 literoj de la albana alfabeto. Tutan tempon ŝi babiladis rakontante pri ŝiaj impresoj diversaj el ŝia sperto..Dum Dana, ankoraŭ ne fariĝis dekmonata, naskiĝinta antaŭtempe, baraktadis marŝi per siaj propraj piedoj. Suferis ŝi pro la novaj dentoj formiĝantaj grupgrupe.., tamen tutan tempon gajis kaj dolĉeridis.



Nature, la krizo ankoraŭ ne ellasis Grekion, pro tio pli suferas la enmigrintoj, inter ili ankaŭ la albanoj. Multaj el ili nun laboras nur sezone. Tamen la turismo estas bonega monfonto por ĉi tiu bela lando. Ĉijare oni ekspektas ke Grekion vizitos 20 milionoj da turistoj, krom la lokanoj kiuj frekventas la sennombrajn hotelojn en la kontinenteca parto kaj en la insuloj. Nur la 1-an de aŭgusto ellasis Pireon 30 mil homoj! Ĉiuj hoteloj estas plenplenaj.

Revenante al aeroporto de Ateno, ni pasis tra Lavrion, pri kiu rakontis mia patro



Li estas restinta tie kvar jarojn kiel politika elmigrinto el Kosovo (1945-1949), antaŭ ol forveturi Germaniun kaj Aŭstralion. Tie li lernis la grekan, deĵoris en iu usona militista bazo. Mi ne scias ĉu li revizitis iamfoje Lavriononĝis li mortis en Perto de Aŭstralio frufebruaire 2001, sed certe li havis belajn memoraĵojn el Grekio.

**Bardhyl Selimi,**

fruaŭguste 2014

